

BULGARA ESPERANTISTO



0861—8—7

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



40. JUBILEA KONGRESO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ

40. JUBILEA KONGRESO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ



Esperantistoj en Svisŝtov manifestis la 24an de majo (vd. paĝon 21).



Amasa Pedagogia E-Konferenco en u. Polski Trambes la 1an de junio



ENHAVO

Haim Levi. La plej granda, la plej impona . . .	1
Hr. Gorov. El la priagada raporto de CE de BEA	4
Sava Dălbokov. Per Esperanto por paco en la mondo (salutparolado) . . .	7
Станка Шопова. Испитан път на доверие и разбирателство (приветствие от името на ЦК на ДКМС) . . .	8
Александър Фол. м-р на народната просвета. — Голяма и благородна роля. (Приветствие) . .	10
* Телеграма до Нац. комитет за защита на мира . . .	10
* Телеграма до ЦК на БКП . . .	11
* REZOLUCIO de la 40a Jubilea Kongreso de BEA	12
* Centralno rĥovodstvo на BEC. Centralna Kontrolna Komisia, Бюро на Центр. рĥоводство на BEC. . .	14
Nikola Aleksiev. Glora Kvindekjaro (1930—1980)	15
* Arda adepto . . .	17
Tinka Lakova. En la fajro de l'batalo . . .	18
Arima. 70-jarojn ekde la naskiĝo de Hristo Kozlev	20
Todor Sošev. Renkontiĝo de ia blindaj e-istoj . .	21
Minko Conkovski. Aktiveco antaŭ la 40a . . .	21
* 50-jariĝo de BuLEA . . .	21
D-ro Bl. Tošev. Efeka E-manifestacio en Svisŝtov	21
* Portreto vespero pri Hristo Gorov . . .	22
K. V. Celebroj de Nevena Nedelčeva . . .	22
H. R. Ĉe amikoj . . .	22
Tempesto. La sepa tradicia E-renkontiĝo en Samokov . . .	22
* Distingo de Anton Antonov . . .	23
N. N. Ni pruvu, ke reklamo valoras . . .	23
Nikola Janev. Ĉiuj ĉeestantoj parolas en E-o . .	23
* Kion montras la literatura konkurso de „BE“	24
* REZULTOJ de la literatura konkurso de „BE“	24
* Nova literatura konkurso de „BE“ . . .	24
Arturs Kubulnieks. BENITA. (Unua premio) . .	25
Dimitro Dimov, Emil Dimov. AL BULGARIO (dua premio) . . .	28
Nevena Nedelčeva. Ĉu vi scias? . . .	29
Dimitro Haĝiev, Kunčo Vălev. Libro timiganta, libro avertanta . . .	29
Dmitrij Pervalov. Renkontiĝo apud Moskvo . .	30
T. Ŝuvajev. E-ekspozicio en Nijnevartovsk . .	30
* Diskoklubo „ESPERANTO“ . . .	30
Mihail Ohotin. En Sebastopola E-Klubo „VELO“	30
Enn Ernits. Esperanto kunligas urbojn . . .	30
Kunčo Vălev. E-teatro en Lenigrado . . .	31
* De lando al lando . . .	31
N. N. E peranto-humuro . . .	31
D-rino Marjorie Boulton. El „Poemoj pri Hiroŝima“ (1953) . . .	III
Se ni malsukcesos? (1953) . . .	III
Inĝ. Nikola Uzunov. KRUCVORTENIGMO . . .	III
* ABONU „BE“ . . .	IV

Redakta komitato:

Kunčo VĂLEV (ĉefredaktoro),
Vasil BOROVSANI, Evgeni
GEORGIEV, Dimitro DENČEV,
Dimitro HAĜIEV, Krăstju KA-
RUCIN, Haim LEVI (vicĉef-
redaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi Garev
Korektis: Rajna Konstantinova
Sofio, p. k. 66 Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ —
fondita en 1919. Eldonkvanto 6100.



LA PLEJ GRANDA, LA PLEJ IMPONA



**НА БЪЛГАРСКИТЕ ЕСПЕРАНТИСТИ
ПЛОВДИВ 12-14 ЈУЛИ 1980 г.**

La bulgara E-movado, naskita en la unuaj jaroj post la kreo de la senmorta verko de la granda humanisto d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kreskinta kaj hardiginta en malfacilaĵoj kaj bataloj, notis en sia biografio multajn glorajn eventojn kaj datojn. Tia evento, kiu por ĉiam restos hela pinto en ĝia historio, estis la okazinta je la 12-14 de julio en urbo Plovdiv 40a Jubilea Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio. Tiu kongreso estis potenca manifestado de la vivkapablo de Zamenhof-afero, impona demonstro de la forto de la bulgara E-movado — unu el la avangardaj taĉmentoj de la tutmonda E-movado.

La antikva kaj eterne juna urbo Plovdiv, konata pro siaj multjaraj tradicioj en la E-movado, triafoje fariĝis dommaŝtro de E-kongreso. 2339 bulgaraj kongresanoj — delegitoj kaj gastoj — venis tien ĉi el ĉiuj anguloj de la lando por atesti sian amon kaj fidelecon al la nobla esperantista afero, al la internacia lingvo E-o, kiu tiel bonefike kontribuas por kreo de pli fortaj ligoj inter homoj kaj popoloj, instigante ilin al utila kultura interŝanĝo, al amikeco kaj komprenigo, al tutmonda paco. Cielokaj

impersantaj afiŝoj bonvenigis la kongresanojn jam ĉe la fervojstacio kaj akompanis ilin tra la tuta urbo ĝis la kongresejo — la Palaco de Kemio kaj Metalurgio en la Foiru Urbo, tereno, kie ĉiujare okazas la fama Internacia Foiro de Plovdiv.

En la palaco mem, situanta sur la bordo de rivero Marica en bela ĉirkaŭaĵo el parko kaj lago, bolis streĉa laboro: la dommastroj renkontadis la kongresanojn, enmanigis la kongreslibron kaj aliajn kongresajn materialojn, enloĝigis ilin en hoteloj kaj komunloĝejoj, afable informis, direktis.

La 12 de julio. Jam la 17 horo. La grandega halo plenplena. La prezidantaro okupas lokojn sur la podio. En ĝi estas ankaŭ karaj gastoj — reprezentantoj de sociaj kaj kulturaj organizaĵoj, gastoj el eksterlando.

Junpioniroj, vestitaj en originalaj Botev-uniformoj, anoncas per siaj fanfaroj la solenan inaŭguron de la 40a jubilea. Eksonas sinsekve la bulgara nacia himno de la esperantista himno, plenumitaj de la Horo de Sofiaj E-istoj. Ĉirkaŭ 2400 homoj aŭskultas starante.

Sonas la voĉetoj de junpionira E-grupo, veninta por saluti siajn gepatrojn kaj gefratojn. Ilia versoforma saluto emociis aparte forte la ĉeestantaron.

GRAVA EVENTO

La solenan malfermon faris k-do Kunĉo Vălev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“. Li bonvenigis la kongresanojn kaj koncize skizis la gloran vojon de la plovdiva esperantistaro, menciante kun estimo kaj danko la nomojn de tiaj E-pioniroj kaj veteranoj, laborintaj multjare kaj obstine por E-o en Plovdiv, kiel Georgi Oreŝkov, Petko Stoev, Dimitro Malĉev, Ivan Batakiev k. a. Aparte li substrekis, ke la 12a de julio — la dato de la kongresa inaŭguro, feliĉe koincidas kun alia grava evento, okazinta la saman daton antaŭ 50 jaroj — la fondo de Laborista E-Asocio en Bulgario. Ĝia societo en Plovdiv estis unu el la plej aktivaj. En ĝi edukigis famaj antifasistoj, pereintaj en la batalo, kiel la partizankomandantoj kaj politikaj

partizantaĉmentaj komisaroj Georgi Jeĉev, Rajĉo Kirkov, Dimitro Petrov, Ivan Filev, Kosta Atanasov, Argir Stojlov, Stojan Miĥajlov, Rajĉo Germanov, Spiro Veselinov k. a.

Kun granda intereso kaj atento la kongresanoj aŭskultis la saluton de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, faritan de k-do Sava Dălbokov — ĝia unua vicprezidanto. Interesajn salutparoladojn faris ankaŭ k-cino Stanka Sopova, sekretario de CK de Dimitrova Junkomunista Unuiĝo, kaj ĉefa scienca kunlaboranto Georgi Mavrov, kiu legis la salutadreson de la ministro de popola klerigo prof. Aleksandro Fol.

En la nomo de Universala E-Asocio salutis la kongreson d-ino Flora Sabo — membro de la estraro de UEA. En la nomo de la nacia Komitato de Sobrero salutis k-do Kostadin Kopanarov. En la nomo de la blindaj e-istoj — k-do Todor Soŝev.

Sekvis aparte kortuŝa momento: laŭ propono de la CE de BEA la kongreso proklamis kiel honorajn membrojn pro ilia multjara kaj sindona laboro por E-o la veteranojn: Radoslav Triĉkov — Vraca, Ivan Vasilev — Pazarĝik, Atanas D. Bojaĝiev — Ŝumen, Vasil P. Markov — Loveĉ, Evstati Cifudov — Sofio, Irina M. Ĉukova — Stara Zagora, Vladi Vălĉev — Dimitrograd, Simeon M. Simeonov — Sofio, Kosta Konstantinov — Pazarĝik, Ivan Sivarov — Plovdiv, Anka Prahova — Plovdiv, Stojan Todorov — Plovdiv, Asen G. Matev — Loveĉ, Boris Nedkov — Sofio, Simeon Hesapĉiev — Sofio, Todor Todorov — Sofio, Mihail Danĉev — Plovdiv.

Per honora atesto kaj insigno „Aktiva membro de BEJ“ estis honoritaj la junaj kamaradoj Stanĉo Stanev kaj Plamen Vasilev, membroj de E-Societo „Albatroso“ — Varna. Ili trairis piede pli ol 400 km de Varna ĝis la kongresurbo.

VIGLA LABORO

La dua tago de la kongreso komenciĝis per konciza ekspono de la prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov pri la agado de la asocio kaj ĝia Centra Estraro, pri la estontaj taskoj. La tuta raporto, presita, estis anticipe disdonita al ĉiuj kongresanoj.

La kongreso aŭdis ankaŭ raporton de la Centra Kontrola Komisiono fare de ĝia prezidanto Hristo Kanev, post kio ĝi elektis laborkomisionojn: pri ŝanĝoj en la statuto de BEA, pri la rezolucio, pri la mandatoj, pri la elekto de nova CE kaj pri telegramoj.

Komenciĝis salutparoladoj de la eksterlandaj gastoj: la saluttelegramon de la Asocio de sovetaj e-istoj tralegis k-do Vasilij Grigorenko. En la nomo de la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEJ) salutis s-ano Joachim Giessner (GFR). En la nomo de siaj naciaj E-organizaĵoj salutis ankoraŭ:

Nguyen Dăk Kui (Vjetnamio), František Pisk (Ĉeĥio), Eriĥ Diter Krauĉe (GDR), Eva Farkaš (Hungario), Marian Dobĵinski (Polujo), Eduard Tvarojek (Slovakio), Muhiĝi Juruk (Turkio), Robert de Kegel (Belgio), kajoliaj. Dr. Koĉvara salutis en la nomo de la rumanaj e-istoj. Estis legitaj saluttelegramoj de la e-istoj de Kuba, Jugoslavio, Leningrado k. a. Salutojn prezentis en la nomo de sia E-familio ankaŭ s-ano Momĉilo Krstić el Niš, Jugoslavio (edzino Tomoko, japanino, kaj eta filo Ivo).

Kortuŝe estis akceptita la sciigo, ke k-do N. Aleksiev estas proklamita honora membro de Ĉeĥa E-Asocio.

Oni transiris al diskutado pri la agadraporto kaj la raporto de CKK. Eldirojn faris 21 kongresanoj: Dimitro Haĝiev — Sofio, Hristo Manolov — Polski Trâmbeŝ, Vasil Bozarov — Heroo de la Socialisma Laboro el Sofio, Georgi Idakiev — Haskovo, Cvjatko Todorov — Ŝumen, Kalju Bjandov — Burgas, Dimitro Kanev — Popovo, Ĉudimir Kantarĝiev — Sliven, Marija Nikolĉeva — Plevn, Jordan Jordanov — Smoljan, Kunĉo Vălev — Sofio k. a. Ili faris utilajn kritikajn notojn kaj rekomendojn, kiuj bone kompletigis la kongresan rezolucion.

REKOMENDOJ KAJ PROPONOJ

La tria tago de la kongreso komenciĝis per diskutado pri la rezolucio. La kongreso akceptis la anticipe disdonitan projekton kiel bazon kaj ŝarĝis la koncernan komisionon trastudi la faritajn rekomendojn kaj proponojn kaj finredakti la rezolucion.

Sekvis raporto de la mandata komisiono fare de k-do Krăstju Karucin. Li anoncis, ke la kongreson partoprenas 2222 regulaj bulgaraj kongresanoj kaj 117 eksterlandaj gastoj el 17 landoj; do entute 2339 partoprenantoj el 18 landoj! Vere grandioza, jubilea kongreso! La plej granda landa kongreso en la tuta historio de E-o!

La kongreso akceptis la projekton pri kelkaj ŝanĝoj en la statuto, kiu siatempe estis publikita en „BE“.

K-do K. Vălev tralegis projektojn pri telegramoj al CK de BKP kaj la Nacia Pacdefenda Komitato kaj dankleterojn al la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, CK de Dimitrova Junkomunista Unuiĝo kaj Ministerio de Popola Klerigo. La projektoj estis unuane akceptitaj per tondraj aplaŭdoj.

Fine per sekreta voĉdonado estis elektita nova Centra Estraro de BEA el 121 personoj kaj nova Centra Kontrola Komisiono el 9 personoj.

La posttagmezo estis dediĉita al kunvenoj de la sekcioj de BEA: instruistoj, poŝtistoj, fervojistoj, medicinistoj, sciencaj laboristoj, muzikistoj, ĵurnalistoj, agrikulturaj specia-

listoj, veteranoj, foto- kaj kinoamatoroj, vegetaranoj k. a. En siaj kunvenoj la sekcioj pridiskutis sian agadon kaj elektis novajn landajn estrarojn.

Je la 16.30 okazis la unua plenkunsido de la novelektita estraro. Je la 17 h. — lasta kunsido de la kongreso, en kiu oni anoncis la rezultojn de la elektoj kaj la novan Buroon de la CE de BEA. Je la 17.30 la 40a jubilea kongreso de BEA estis solene fermita per konciza parolado kaj dankvortoj de la reelektita prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov.

Dum la tri kongresaj vesperoj okazis interesaj aranĝoj: interkona vespero, arta vespero kaj koncerto de la Horo de Sofiaj E-istoj. La belartajn programojn partoprenis la geaktoroj Belka Beleva, Anani Anev, Mišo Zdravev, Veselina Kurteva, la geartistoj-kantistoj Galja Kostova, Karamfilka Adamova, Maria Angelova, Veselin Damjanov, Dimitro Denčev, Prodan Prodanov k. a. Aparte elstaris en la programo la recitalo de artistoj el Plovdiv, dediĉita al la 1300a datreveno de la fondiĝo de Bulgario.

En la antaŭsalono de la kongresa halo ĉiam svarmis homoj. Ĉi tie oni vendis E-memoraĵojn kaj librojn, vidaĵojn el Plovdiv, stampis kovertojn kun la speciala kongresa stampilo. Funkciis standoj por abonigo al „Bulgara Esperantisto“, „Scienca mondo“, „Kolektanto“. Ĉirkaŭe estis aranĝita ekspozicio de fotoj, leteroj kaj diversaj esperantaĵoj, ricevitaĵoj de la bulgaraj e-istoj N. Aleksiev, Zora Ošanska, Georgi Litov, Maria Gigova, Veska Nakova, Siŝman Bočev, Nadja Cip-lakova, Elena Kuzeva, Dobri Iliev. Aparte elstaris la tabulo de Rajna Konstantinova,

konata E-verkistino. Impresis ŝiaj vortoj: „Por mi E-o estas vera dua mondo“. Konstantinova korespondas kun 60 e-istoj el 25 landoj de kvar kontinentoj.

La kongreso estis akompanita de kelkaj aliaj aranĝoj: fotoekspozicio pri u. Lajpcig (GDR), ĝemela al Plovdiv, spektaklo de la unua en la lando Infana Teatro el u. Burgas, kiu majstre prezentis „Fabelojn por grandaj kaj malgrandaj“ laŭ Andersen, duontagaj ekskursoj. Dum la kongresaj tagoj por la eksterlandaj gastoj estis organizitaj ekskursoj al la Monaĥejo de Baĉkovo kaj aliaj vidindaĵoj de Plovdiv. Post la kongreso, la 15an, okazis tuttaga ekskurso al u. Smoljan kaj la apuda v. Pisanica, kie majeste staras la nova moderna 5-etaĝa Internacia E-Kursejo.

La grandioza 40a Jubilea Kongreso de BEA malfermas novan paĝon en la analoj de la bulgara E-movado. Ĝi kondukas al periodo de nova supreniro kaj venkoj de E-o, periodo de grandaj festoj de la bulgara popolo: la XII kongreso de la Bulgara Komunista Partio, la 1300 datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato, 100 jaroj ekde la naskiĝo de la granda Georgi Dimitrov — fama en la tuta mondo socipolitika aganto kaj brava antifasista batalanto de la internacia komunista kaj laborista movado.

Bonan vojon, karaj bulgaraj e-istoj! Al novaj sukcesoj kaj venkoj en nia nobla laboro kaj batalo por la feliĉo de nia kara popolo, por la disfloro kaj supreniro de nia amata socialisma patrujo, por firmigo de la internaciaj amikeco kaj kompreniĝo, por triumfo de la paco en la tuta mondo!

HAIM LEVI

Kongresanoj ekster la Kongresejo



AL ENERGI A KAJ FRUKTODONA LABORO

EL LA AGADRAPORTO DE CE DE BEA LEGITA DE HRISTO GOROV — LA PREZIDANTO DE BEA

Ci tie en urbo Plovdiv, kie antaŭ proksimume 80 jaroj oni fondis esperantistan organizaĵon, oni jam trian fojon aranĝas E-kongreson. Tiu ĉi kongreso estas la plej impona en la historio de la E-movado en Bulgario.

La nuna jubilea kongreso koincidas kun rimarkinda dato. La 12-an de julio 1930 jaro en Sofio okazis la fondkonferenco de la Laborista E-asocio (LEA). Ties fondintoj tiam estis la junaj laboristoj kaj studentoj — Nikola Aleksiev, Simeon Petrov, Asen Grigorov, Angel Petkov-Angelo, Nikola Sopov, Atanas Lakov, Ivan Keremidchiev k. a., kiuj forte kredis, ke Esperanto ĝuos gravan estontecon, se oni ligos ĝin kun la sciencaj ideoj por konstruado de la nova progresema socio.

La nuntempa E-movado estas daŭrigo de ĉio plej bona el la evoluo de la Laborista E-asocio. Kaj oni ne povas TRAKTI kiel hazardo la fakton, ke tuj post la fino de la tutpopola venko, la Naŭan de septembro 1944 jaro, en la unuaj vicaj ekstaris la kamaradoj el la Laborista esper. asocio. Tiu konti nua rezultigas pozitivan influon al la karaktero kaj taskoj de Bulgara esperantista asocio.

Forpasis pli ol 4 jaroj post la okazo de la plej granda evento en nia lando — la XI-a kongreso de la Bulgara komunista partio, ĉefa organizanto kaj direktanto de la socialisma socio en PRBulgario. La kongreso alte pritaksis la prosperojn de nia lando konekse kun la Sesa kvinjara ekonomia plano. La ĉefaj atingoj, laŭ la kongresa raporto, estis la kvalitataj ŝanĝoj. La proporcio inter la industria kaj la vilaĝmastruma produktado ŝanĝiĝis de 77.1 kaj 22.9% al 81.2 kaj 18.8%. La relativa parto en la industrio en la nacia enspezo plikreskis de 49% en 1970 jaro al 54.6% en 1975 jaro. Intense evoluas tiuj branĉoj, el kiuj dependas en plej alta grado la teknika progreso kaj EFIKO de la nacia ekonomiko, kiel ekz. la elektroenergio, kemika kaj la naftteknika industrio. La maŝinkonstruado kaj precipe la ELEKTRONIKO. Oni akceligis la evoluadon de la malpeza kaj la nutraĵa industrioj.

La bulgaraj esperantistoj ankaŭ partoprenis per sia laboro en la efektiva teĥniko sukcesoj. Per la samvalora energio kaj entuziasmo ili eklaboris por la realigo de la Sesa kvinjara plano kaj la decidoj de la Nacia partia konferenco.

1. KULTUR-KLERIGA AGADO

La estraro de BEA ĉiam ligis la organizaĵajn taskojn kun edukado de siaj membroj en spirito de la socialisma patriotismo kaj internaciismo, kio treege utilas por ni dum kontaktoj kun esperantistoj el diversaj

landoj. Dum internaciaj renkontoj kaj kongresoj la bulgaraj esperantistoj agas disciplinite kaj faras bonan impreson al fremdlandanoj.

Havante antaŭvide, ke la ideo-eduka laboro estas grava parto de la agado de nia Asocio, la kultur-kleriga komisiono regule preparis referaĵojn, dediĉitajn al diversaj problemoj kaj eventoj.

La Asocio de la sovetaj esperantistoj, kun kiu la Bulgara Esper. asocio havas intimajn rilatojn, distribuas ankaŭ por ni el siaj presajoj.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, en la sfero de la libroeldonado oni ankaŭ atingis bonajn rezultojn. Estis eldonitaj lernolibroj por dua kaj tria grado.

Nun, post la elĉerpigo de la supremenciitaj lerniloj, oni klopodos represadon kun plibonigoj.

La raporton de kamarado Todor Jivkov antaŭ la Dekunua kongreso oni eldonis en 5000 ekz. kaj estis dissendita al 70 landoj. Oni presigis ankaŭ la konkludan paroladon de T. Jivkov antaŭ la Tut-eŭropa konferenco por sekureco en Helsinko.

Konekse kun la 63-a kongreso oni eldonis ankaŭ broŝuron sub titolo „Kion vi scias pri Bulgario“ en 5000 ekzempleroj.

La eldonejo „Sofia-pres“ eldonas la libron „La apostolo de la libereco“ de angla verkistino Mersija Makdermot, tio estas libro pri Vasil Levski, 400 paĝoj, eldonkvanto 5000 ekzempleroj.

Por la disvendo de la esperanta literaturo, insigno ktp. zorgis Bulgara E-kooperativo, kiu bone faras tion.

La periodaj eldonaĵoj de la Asocio estas gravaj fontoj por edukado, informado kaj lingva perfektigo.

La revuo „Bulgara esperantisto“, ekde la komenco de 1980 jaro estas presata en nova kaj pli ampleksa formato kaj kun plibonigita enhavo.

Nune, kiam jam la redakcio havas pli da eblecoj, oni devas disponigi pli da spaco por variaj materialoj, tradukitaj kaj originalaj, kaj speciale en preskaŭ ĉiu numero oni presigu artikolojn dediĉitajn al la 1300- datreveno post la fonda de nia ŝtato.

La enhavriĉa E-revuo „Scienca mondo“ redaktata de prof. Vasil Peevski estas freŝa fonto de konoj. „Scienca mondo“ estas organo de la Monda federacio de la sciencaj laboristoj.

La Komitato pri turismo eldonas en Esperanto la bulleton „Bulgario-Turisma informado“, kiun oni disvastigas en 25—30 landoj.

La revuo „Paco“ aperas en 6 kalendaraj ĉiujare. La redakcio jam sukcesis likvidi la malfruigon kaj nun „Paco“ aperas regule.

II. AGADO PRI PROPAGANDO KAJ KURSOJ

Dum la forpasinta kvarjara periodo la instrulaboro daŭre evoluis, plibonigis kaj plivalorigis per novaj iniciatoj kaj formoj. En la diversspecaj lernejoj — ekde la elementa ĝis la superaj institutoj — ĉiujare pli ol du mil lernantoj kaj studentoj studas Esperanton. Kiel KONSIDERINDA atingaĵo ĉe nia instrulaboro oni povus distingi la funkciantan dum la tuta somero Tendaron-kursejon apud vilaĝo Drujevo. Per la helpo de la Sofia urba-distrikta estraro de BEA kaj de la Bulgara Esper. kooperativo, la kursejo estis renovigita kaj modernigita kaj jam depost du jaroj ĝi regule — de junio ĝis la fino de aŭgusto — akceptas lernantojn el la tuta lando kune kun iliaj instruistoj kaj junpioniraj gvidantoj.

Bonan propagandon por disvastigo de Esperanto en la medio de la lernantoj oni faras per la ĉiujaraj konkursoj kaj kantiĝestivaloj.

Malgraŭ niaj atingoj en la kursa agado tio ne devas kontentigi nin. Multloke la estraroj ne sukcesas trovi la ĝustan vojon al ekinteresiĝo de la publiko.

Trege grava estas, ke oni trovu vojon al la plej aktiva parto de la loĝantaro — al la junularo.

Necesas, ke ni iru kun Esperanto al la laboristoj kaj la inĝeniera-teknika inteligentularo, ni iru en la sciencajn institutojn kaj instituciojn, kie Esperanto povus esti utila al tiuj homoj ĉe la kontaktoj kun similaj personoj alilande ĉe ŝanĝo de sperto. Ni vizitu ankaŭ la amasajn organizaĵojn. Ni postsekvu la ekzemplon de tiuj societoj, kiuj metas Esperanton en la konkreta praktiko de la socialisma konstruado, ni metu Esperanton je servo de la kulturaj, profesiaj kaj aliaj interesoj por la konstruado de matura socialismo; ni faciligu iliajn kontaktojn kun la laboruloj el aliaj ŝtatoj, kiuj havas la samajn aŭ similajn interesojn.

GEKAMARADOJ.

La problemoj pri la studado kaj disvastigado de Esperanto, por eduko de esperantistoj-aktivuloj, tradukistoj, verkistoj kaj aliaj, oni povas efektiviĝi per talentaj kursgvidantoj. Nun ties nombro ne estas sufiĉa.

La problemoj pri kursgvidantoj devas solvi ĉiu loka societo. Ĝi devas fari ĉion eblan por krei proprajn aktivulojn, bone scipovantajn Esperanton kaj la metodojn de ĝia instruado. La centra estraro de la Asocio tiucele kreis kompletan instru-metodikan sistemon pri eduko de instruantoj.

La regionaj pedagogiaj konferencoj ankaŭ estas bona iniciato. Similajn konferencojn oni organizas ĉiujare en kvin ses lokoj. En ili partoprenas meze po 30–40 pedagogoj. Krome la konferencoj ebligas interkonatiĝon kaj amikiĝon inter la agantoj de tiu ekskluzive grava sektoro de nia asocia laboro.

III. — ORGANIZA LABORO

Dum la limtempo inter la du kongresoj oni fondis aŭ refondis pli ol dudek E-societojn, sed preskaŭ tiom da societoj ĉesis ekzisti. Pluraj societoj impresas per sia bona organiza laboro, ili sisteme zorgas por restigi kaj pligrandigi la nombron de siaj membroj. Ni indiku kiel ekzemplon la societon „Fajrero“ en la Rodopmontara urbeto Dospat. Dum 10 jaroj ties membroj plikreskis de 20 al 253 personoj. Alia ekzemplo de konstanta progreso estas la societo „Kolombo de la paco“, ankaŭ en negranda, sed senhalte prosperanta urbo Gálábovo.

La reguligo de la membrokonsisto, ties konstanta nombrostato, fondo de novaj societoj en tiuj loĝlokoj, kie ankoraŭ ne ekzistas — jen la grava organiza tasko dum la venonta asocia PERIODO.

Pluraj distriktaj estraroj laboras laŭplane, aktive. Kiel ekzemplon oni povas indiki la Distrikta-urban estraron en Sofio.

Sciiginda estas la fakto, ke la Distrikta E-estraro en Plovdiv ĝuas bonajn internaciajn kontaktojn. Plovdiv kaj Leipzig estas ĝemeligitaj urboj.

Laŭdindan agadon efektivas la Distriktaj estraroj en Ruse, Stara Zagora, Pazarĝik, Burgas, Sumen kaj en aliaj urboj. La distrikta estraro en Ruse ĉiujare aranĝas Printempan E-renkontigon (PARE), kaj la societo en urbo Kubrat ĉiujare aranĝas Vintran E-renkonton (VARE), dume la societo en urbo Velingrad aranĝas ĉiujare Turistan restadon. La tri manifestiĝoj havas karakteron de preskaŭ internaciaj, ĉar regule estas vizitataj ankaŭ de eksterlandanoj.

Krom la ĉefurba societo „Maksim Gorki“, kiu festis sian 90-jaran jubileon, la E-societo en urbo Ruse festis la 80-jaran ekziston de E-movado en tiu urbo. Similaj okazis ankaŭ en la urboj Trojan kaj Jambol. Dum tiuj okazoj la societoj en Ruse, Kazanlak kaj Haskovo ricevis ŝtatan ordenon „Kiril i Metodii“.

Kiel ni jam rimarkis, pluraj estas la societoj, kiuj efektivas regulajn klerigan E-vivon, sed nemalmultaj estas ankaŭ la senagaj societoj, kio postulas specialan atenton fare de la distriktaj estraroj en Haskovo, Varna, Plevne, Vraca, Botevgrad, Tolbuhin k. a.

La buroo de BEA kunvokis regulajn plenkunskundojn. Ĉe ili, krom la kurentaj demandoj, oni pridiskutis kaj prenis decidojn pri la plej gravaj problemoj el la vivo de la organizacio.

Dum la pasinta laborperiodo la buroo de la Centra estraro kunsidis regule. Oni unuanime prenis la decidojn, kio PAROLAS, ke en la buroo ekzistis unuanimeco kaj kolegeco. La estraranoj rilatis postuleme kaj kritike al la prilaktataj dokumentoj.

Kritikon toleras la Buroo ne pro manko de decidoj, sed pro manko de kontrolo al ties efektiviĝo.

Plurajn el la organiztaskoj oni efektivas pere de la sekcioj.

Plej multnombra kaj aktiva estas la sekcio de la instruistoj esperantistoj. La nombro de ties membroj estas proksimume 600 kaj unu societo de la instruistoj — „Diĉo Petrov“ en Sofio. La sekcio eldonadas periode informilon pri la instrua laboro. Ĝiaj abonantoj en la lando estas 850. Bone laboras la sekcio de la medicinaj laboristoj, la sekcio de la sciencaj laboristoj, la sekcio de la poŝtistoj — unu el la plej malnovaj asociaj sekcioj.

Kun la reprezentintoj de la Komitato de bulgaraj virinoj estis pridiskutitaj kaj akceptitaj diversaj iniciatoj.

La bulgara sekcio de MEM efektivas laŭplanan kaj celkonforman agadon. Kiel membroj de MEM oni agnoskas ĉiujn esperantistojn, kiuj regule ricevas la eldonaĵojn de la movado „Paco“ kaj „Pacaktivulo“.

La sekcio de la filologiaj partoprenas per sia helpo je la verkado de E-lerolibroj kaj vortaroj kaj eldonadas la revuon „Filologo“, kiun oni dissendas en plurajn landojn.

Post kelkajara paŭzo la Sekcio de la fervojistoj revigligis.

La sekcio de la E-veteranoj sisteme kolektas biografiajn faktojn pri malnovaj esperantistoj en nia lando, kaj aranĝas ties membrecon ĉe la Internacia klubo de la E-veteranoj.

Oni fondis Sekcion de nevidantaj esperantistoj.

La sekcio de la vegetaranoj estas la plej nova Ĝia membraro estas proksimume 90 personoj. Por la kuranta jaro unu el la ĉefaj taskoj estas la partopreno al la internacia kongreso de la vegetaranoj, kiu okazos en Pollando.

La sekcio „Agrikulturaj specialistoj“, preskaŭ duobligis siajn membrojn.

La komisiono pri turismo ĉe CE de BEA kunagas pri eldonado de propagandiloj fare de Balkanturist — faldprospektoj, diapozitivoj k. a.

La sekcio pri kooperativismo funkcias en intimaj rilatoj kun Centra kooperativa unuigo.

IV. — LA NOVAJ ANSTATAUANTOJ

Sukcesaj formoj por aktivigado de la junularaj komisionoj, sekcioj kaj grupoj montrigis la regionaj konsilioj, okazintaj en St. Zagora, Kubrat, Plovdiv kaj Varna. Ĉi tiuj regionaj konsilioj laŭ sia karaktero transformigis je speciala formo pri interŝanĝo de sperto, interkonatiĝo kaj interamikigo. Apartan intereson inter la ĝejnularo provokis la sperto de la junaj esperantistoj en urbo Galabovo. Paralele kun tio oni organizis festivalojn de amatora arto. Tiurilate oni devas menciigi pri la konkurso de la E-parolo kaj kanto en Lovec, amase vizitata kaj senripote organizita. Memorinda restos ankaŭ la renkonto de la du generacioj, okazinta la 7-an de junio ĉi jare en Sofio, en kiu renkontigis la vivantaj fondintoj de la Laborista Esper. Asocio kun la reprezentantoj de la junaj esperantistoj el la lando.

Karaktere estas pri la ĝejnularaj societoj kaj grupoj, ke ili dum la pasinta periodo ne izoligis de la ceteraj ĝejnuloj. Kiel la estraro de la Bulgara E-junularo, tiel ankaŭ la estraroj de la junularaj societoj en la provinco akordigis sian agadon kun la komitatoj de la Komsomolo. Iuj junularaj societoj kaj grupoj, konservante siajn rilatojn al BEA kaj sian sendependecon, agas en la kluboj por internacia amikeco ĉe la Komsomolo. Ili trovas tie kondiĉojn kaj eblecojn kunveni kaj altiri novajn amikojn de Esperanto.

Sendepende de la atingitaj sukcesoj antaŭ Bulgara E-junularo staras multe da problemoj. Unuavice oni devas plibonigi la lingvan nivelon de la junuloj-esperantistoj.

Oni devas entrepreni seriozajn paŝojn pri stabiligo de la societoj de lernantoj, kiuj suferas pro malkontinuo.

Grava estas la selekto de junaj agantoj, ilia eduko kaj evoluo. Tiucele oni povus aranĝi mallongdaŭrajn kursojn, kiaj ekzistas en iuj el la socialismaj landoj, precipe en Sovetunio, por junaj aktivuloj.

V. INTERNACIA AGADO

La estraro de Bulgara esp. asocio ĉiujare partoprenas la konsultigojn de reprezentantoj de E-asocioj el la socialismaj landoj.

Inter 18-a kaj 23-a de aprilo ĉi jare en Sofio kunidis la 13-a Konsultigo. En ĝi partoprenis gvidantoj de E-asocioj el Sovetunio, Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Vjetnam kaj Bulgario. Konekse kun la streĉita internacia situacio la kunveno faris profundan analizon de la internaciaj cirkonstancoj kaj de ĝia reflektigo al la konscio de la esperantistoj.

Alia grava problemoj estis kiamaniere oni organizu la selektojn, la instruadojn kaj la distribuadon de la E-aktivuloj en nacia, regiona kaj internacia aspektoj.

La Konsilio indikis la bazajn punktojn por preparo de science motivita dokumento, kiu donas precizajn kriteriojn pri la plua teoria kaj praktika laboro fare de la E-asocioj el la socialismaj landoj.

Grava entrepreno estas la Somera E-universitato, kiu oni aranĝas ĉiujare en la kadroj de la U-kongresoj. En ili partoprenis per referaĵoj prof. Vasil Peevski, prof. Stojan Ĝugev, prof. Vasil Cočov kaj Belka Beleva.

Konsiderinda estas ankaŭ nia partopreno en la kulturaj aranĝoj dum la internaciaj kongresoj.

La 63-a E-kongreso, kiu okazis en Varna en 1978 j. restos memorinda ĉe la kroniko de la internacia E-movado. Preskaŭ la tutan programon plenumis bulgaraj esperantistoj. La Bulgara E-teatro surscenigis la teatraĵon „Bopatrino“ de Anton Strašimirov; V. Damjanov kantis memstare; la ĥoro „Rodni zvuci“ inaŭguris kaj fermis la kongreson kaj krome aranĝis memstaran koncerton. Partoprenis ankaŭ junaj talentoj. Kantis ankaŭ la ĥoro de la sofiaj esperantistoj.

La sesdek tria Universala kongreso en Varna estis renkontita kun intereso de la bulgaroj. Honora prezidanto estis la Unua vicprezidanto de la Stata konsilio Petăr Tančev, kiu ĉeestis ĉe la INAUGURO kaj senpere helpis dum la kongreso.

Speciale ni volas substreki niajn kulturajn rilatojn kun sovetiaj kamaradoj. Sovetaj amikoj regule kunlaboras en la revuoj, aperantaj en nia lando! Sovetaj amikoj vizitas niajn somerajn kursojn. Sovetaj eldonejoj havigas al nialandaj esperantistoj belliteraturon, poeziaĵojn de famaj aŭtoroj. Nun kiam jam funkcias la Asocio de sovetaj esperantistoj, ni estas firme konvinkitaj, ke en la sfero de la kultura interŝanĝo ni havos ankoraŭ pli belajn rezultojn.

KAMARADOJ KONGRESANOJ,

En la kongresa raporto estis indikitaj la taskoj, kiujn havos por plenumi la Bulgara E-asocio dum la sekvantaj kvar jaroj. Paralel kun la organizaj taskoj ni estas devigataj marŝi antaŭvide kun la tempo.

Ni estas devigataj ankaŭ pristudi la bazajn dokumentojn de la Partio kaj tiujn de la registaro pri ĝenerala apliko de la ekonomika metodo en ĉiujn sferojn de nia socieca vivo, samkiel en la sferon de BEA. La ĉefaj direktoj de la plua efika evoluo de la ekonomiko de nia lando kaj pri la apliko de la ekonomia metodo ĉe la gvido de la kultura kaj la socieca fronto, kiujn kamarado Todor Jivkov tre klare kaj saĝe formuligis kaj klarigis dum la Nacia konsilio de la partia, ŝtata ekonomika aktivularo la 30-an de januaro 1980 jaro.

Ni plifortigu nian moral-politikan unuecon kaj per laborheroaj de nia tuta popolo, pretigu kaj bonvenigu la antaŭstarantan Dekduan kongreson de BKP kaj la 1300-jarrevenon de la fondo de la bulgara ŝtato, 90-jaran jubileon de BKP, la 25an datrevenon de la Aprila pleno de CK de BKP kaj 100-jaran datrevenon de la naskigo de Georgi Dimitrov.



PER ESPERANTO POR PACO EN LA MONDO



Karaj delegitoj!

Estimataj gastoj!

Kun sento de ĝojo kaj emocio mi ekstaras ĉe tiu alta tribuno por saluti vin plej sincere je la nomo de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto kaj persone de ĝia prezidanto kamarado Penčo Kubadinski — membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, kaj bondeziri fruktodonan laboron al la 40-a Jubilea Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio.

Dum la jaroj de la burĝa-faŝisma diktaturo, dum la periodo de armila antifaŝisma batalo kaj rezisto la bulgaraj e-istoj estis en la unuaj vicoj de la batalantoj por libero kaj sendependeco pli bona kaj feliĉa vivo. En la peza batalo kontraŭ la monarkofaŝismo la bulgara E-movado donis karegajn kaj neforgeseblajn viktimojn. Pli ol 150 gee-istoj forbrulis en la fajro de la batalo kaj pereis kun la morto de la bravuloj. Hodiaŭ ni kliniĝas antaŭ la hela memoro de la popola instruistino Vela Piskova — partopreninta en la unua en la mondo antifaŝisma ribelo en septembro 1923 jaro; de la heroo Jordan Ljutibrodski, kiu deklaris antaŭ la vizaĝo de la ekzekutistoj: „Pli bone mortinta, sed viva por mia klaso, ol vivanta, sed fetora politika kadavro“ — kaj pereis sub la pendumilo; de la aktivaj partiaj funkciuloj Nikola Botuŝev — organizanto de la batalgrupoj en Sofio, kaj Nikola

SALUTPAROLADO EN LA NOMO DE LA
NACIA KONSILANTARO DE PATROLANDA
FRONTO

FARITA DE K-DO SAVA DÁLBOKOV — UNUA
VICPREZIDANTO DE LA NACIA KONSILANTARO

Sopov, sekretario de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio kaj partopreninto en la batalgrupoj; de la bravaj partizankomandantoj Stojan Edrev — stabestro de 11 ribel-operacia zono, la talenta poeto Hristo Kârpaĉev kaj leŭtenanto Diĉo Petrov, kiu eĉ en 1943 instruis E-on al siaj soldatoj; de Georgi Jeĉev — komandanto de Dua Ribel-operacia zono, de Kosta Atanasov, Ivan Filev kaj aliaj; politikaj komisaraj de partizantaĉmentoj kiel doktoro Vârban Genĉev, Dimitro Petrov (Fanteto), la popola heroino Vela Peeva, partizanino, la poeto-partizano Cvetan Spasov kaj multaj aliaj, kiuj ne avaris la plej karan — sian vivon por la libero de la popolo.

Dekoj kaj centoj da aktivaj e-istoj estis jetitaj de la faŝista registaro en la prizonojn kaj koncentrejojn, kie ili stoike eltenis obstaklojn, mizeron kaj teroron, sed ne rezignis pri siaj ideoj, pri la batalo por libero. Hodiaŭ ili estas la veteranoj de la bulgara E-movado kaj donas ekzemplon al la juna generacio pri fidela servo al la afero de la Partio, al la popolo.

Post la venko de la Naŭseptembra Socialisma Revolucio la bulgaraj e-istoj aktive partoprenas en la konstruado de nova vivo. En sia agado ili gvidas sin de la direktivoj de nia tutpopola instruisto kaj gvidanto Georgi Dimitrov, kiu diris: „Via agado per Esperanto estas valora. Vi devas daŭrigi tiun agadon.“

Nun, kiam ni konstruas evoluantan socialisman socion en nia patrolando, la bulgaraj e-istoj per siaj internaciaj ligoj, efektivigataj dum kongresoj, konferencoj, renkontigoj, simpozioj kaj festivaloj kaj per persona korespondado donas sian kontribuon por popularigo

de niaj ĉiufankaj sukcesoj, ili diras la veron pri nia nova vivo kaj forpuŝas la kalumniojn kaj atakojn kontraŭ nia patrolando. La bulgaraj e-istoj disvastigas tra la mondo la veron pri nia sincera pacama ekstera politiko, pri la amo kaj fideleco de nia popolo al la afero de la paco kaj internacia kunlaboro, pri ĝia decido defendi la malstreĉecon kiel gvidan tendencon en la internaciaj rilatoj.

Per la E-tradukoj niaj e-istoj vastigas la rondon de la legantoj de bulgara literaturo en eksterlando. En E-o aperis multaj rakontoj, romanoj, noveloj, poemoj kaj versaĵoj de tiaj klasikuloj kiel Hristo Botev, Ivan Vazov, Elin Pelin, Georgi Karaslavov, de la revoluciaj poetoj Hristo Smirneski, Geo Milev, Nikola Vapcarov k. a.

La bulgaraj e-istoj popularigas la belecon de nia patruja naturo, la rimarkindajn naciajn monumenton kaj objektojn de socialimas konstruado kaj tiel altiras konsiderindan nombron de eksterlandaj turistoj. Unuvorte, per sia internacia agado niaj e-istoj senĉese gajnas amikojn de Bulgario, kaj tio signifas amikojn de la paco kaj socialismo.

Kiel dum la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, tiel ankaŭ nun, en la etapo de konstruado de evoluanta socialisma socio, la bulgara E-movado neniam fermiĝis kaj ne fermiĝas en sia organiza konko, sed estis kaj estas nedisigebla parto de la komuna popola revolucia torento — por libero kaj sendependado, por konstruo de nova sociordo. Ĝiaj sukcesoj kiel dum la pasinteco, tiel ankaŭ nun ŝuldiĝas al la zorgoj de la Partio kaj la popola registaro.

Ni fieras, ke proporcie al la loĝantaro, la Bulgara Esperantista Asocio estas la plej granda nacia E-organizaĵo en la tuta mondo. Ĝi trovis sian naturan lokon kiel kolektiva membro de Patrolanda Fronto — la plej multnombra sociopolitika organizaĵo en nia lando. Sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio la bulgaraj e-istoj donas sian kontribuon al la patriotisma kaj internaciisma edukado de la popolo kaj ĝia junularo. Sur tiu nobla kampo ekzistas riĉaj eblecoj pri kuna agado inter la Patrolanda Fronto kaj la Bulgara Esperantista Asocio. Ni deziras, ke dum la sekvaj jaroj tiu ĉi agado plivastiĝu kaj profundigu, ke ĝi ligu ankoraŭ pli intime kun la taskoj pri konstruado de evoluanta socialisma socio en nia patrolando, pri efektivigo de la direktivoj de la antaŭstaranta XII kongreso de la Bulgara Komunista Partio.

Permesu al mi, gekamaradoj, fini per via slogano: „Per Esperanto — por paco en la mondo, por amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj, por socia kaj kultura progreso!“

Dankon pro la atento.



ИЗПИТАН ПЪТ

Уважаеми гости и делегати

Примете най-сърдечните поздрави на ЦК на ДКМС, на цялата българска младеж по случай щастливото събитие — юбилейния 40-ти конгрес на Българския есперантски съюз.

Случай като този винаги става повод да се направи откровена и задълбочена равностметка за изминатия път, да оживеят в съзнанието най-значими дела, да се очертаят планове за бъдещето. Така е и сега. Историата на Българския есперантски съюз е динамична и вълнуваща, неизменно свързана с главните събития, с които е живяла нашата общественост, с борбите на народа. Достатъчно е да си припомним само няколко факта от този борчески път, за да се убедим във верността на извода, че идеите на есперантското движение са били редом с най-справедливите идеи на времето, затова често са били преследвани от реакцията:

1928 г. — със заповед № 9607 тогавашното Министерство на народното просвещение у нас разтурва ученическите есперантски организации и забранява езика есперанто за учениците. Един от мотивите е: есперанто служи като прикритие за неопозволена пропаганда на политически идеи между гимназистите.

1934 г. — насилствено е разтурен Работническият есперантски съюз у нас.

1939 г. — изключени са 20 прогресивни активни есперантисти от Софийското есперантско дружество по нареждане на фашистката полиция.

Причината за такава драстична намеса винаги е била последователността, с която българските есперантисти следват поръката на Заменхоф, направена още при откриването на IV Универсален конгрес на есперанто в Дрезден: „Да действваме честно и да помним, че за нашите дела бъдещето строго ще ни съди.“

Днес ние знаем, че това е била водещата мисъл и на прогресивните български есперантисти, воювали в защита на свободата на народа, за победата на социалистическата революция. Много от тях загинаха в борбата против фашизма със съзнанието за изпълнен към народа и БКП дълг. Сред тях с преклонение си спомняме имената на обаятелните ремсови и партийни функционери Христо Кърпачев, Стоян Едрев, Никола Шопов, Димитър Каляшки, Ангел Иванов, Давид

НА ДОВЕРИЕ И РАЗБИРАТЕЛСТВО

ПРИВЕТСТВИЕ ОТ ИМЕТО НА ЦК НА ДИМИТРОВСКИЯ КОМУНИСТИЧЕСКИ МЛАДЕЖКИ СЪЮЗ

Произнесено от

СТАНКА ШОПОВА
секретар на ЦК на ДКМС

Сасонов, д-р Върбан Генчев, Тодор Софрониев, Вела Пеева и много други.

След деветосептемврийската победа 1944 г. есперантското движение у нас навлезе в нов етап на своето развитие. Голяма роля за това изигра положителното отношение на БКП и народното правителство към него, създадените благоприятни условия за масовизирането му.

Правилно беше оценена богатата възможност, която езикът есперанто дава на всички народи — малки и големи — равноправно да участвуват в световен културен обмен. Благодарение на него днес за България, за живота в нея, за българина, за българската младеж научават хиляди хора по света. Проникването в културното наследство на един народ, запознаването с постиженията на неговите творци от различни поколения е възможност за опазване на битието на този народ, на духовния му облик — процес, който лежи в основата на дружеските връзки между народите.

Широко демократичната основа на езика есперанто, неговата вътрешна хармония и изящество му позволиха той да има най-дълга история и да получи най-голямо разпространение от всички рационално създадени езици в света.

Но сигурно най-съществената причина за дълголетие и за светлото бъдеще на есперанто е фактът, че той е още един изпитан път за укрепване на мира в наше време, за стимулиране на доверието и разбирателството между различните страни и народи, минирано днес от неразумните дипломатически ходове на недалновидни и войнолюбиви западни политици. На мира, към който се стреми цялото прогресивно човечество.

„Ако всички деца по света си подадат ръка“ — започва едно от стихотворенията си Жак Превер.

Ако всички здравомислещи хора от земното кълбо си подадат ръка, какви колосални

запаси от интелектуална и материална мощ биха се включили в борбата за усъвършенстване живота на земята! Колко по-хармоничен и смислен ще бъде животът на нашата планета в цивилизования двадесети век! Каква прекрасна възможност за човечеството да живее достойно и да се труди достойно, наистина по законите на красотата!

На тези идеи служат българските есперантисти, към това се стреми нашият народ, цялото наше общество под ръководството на Българската комунистическа партия — истински образец за партия от марксистко-ленински тип.

ДРУГАРИ,

Младежта винаги е участвувала в благородната дейност на Българския есперантски съюз. Много са младите хора, които виждат в изучаването на този език още една възможност за опознаване на света, за ползотворно общуване с културата на човечеството. Ето защо ДКМС като обществено-политическа организация на българската младеж, изразител на нейните многостранни интереси и потребности, още веднъж най-искрено ви поздравява по случай конгреса и ви уверява, че и занапред младите хора ще бъдат активни участници в дейността на Българския есперантски съюз. Предстоят славни годишнини — 1300 години от създаването на България, 100 години от рождението на Георги Димитров, 25 години от забележителния Априлски пленум на ЦК на БКП. Нашият народ успешно влага своя труд за изпълнение задачите на VII-та и за устремно начало на VIII-та петилетка. Младежта упорито се учи и труди, за да изпълни поръките на ЦК на БКП и лично на др. Тодор Живков, отправени към нея в неговото забележително писмо до ЦК на ДКМС. Убедени сме, че решенията, които ще вземе вашият конгрес, непременно ще свържат чествването на тези годишнини и изпълнението на тези задачи с духа на най-добрите есперантски традиции — борбата за мир на земята, за приятелство и сътрудничество между народите, работата за патриотичното и интернационално възпитание на трудещите се и младежта. Нека с делата си българските есперантисти показват на своите близки и далечни приятели от цял свят красивата истина за социалистическия човек, богатството на неговата душевност, полета на неговата мисъл, чудните творения на неговите ръце. Нека предизвикват искрено уважение и обич към нашата социалистическа родина — Народна република България.

На добър път!

ГОЛЯМА И БЛАГОРОДНА РОЛЯ

Приветствие от Министъра на народната просвета
проф. Александър ФОЛ

*До участниците в 40-я юбилеен
конгрес на Българския есперантски
съюз — град Пловдив*

Другарки и другари

Изпълнявам приятното поръчение на ръководството на Министерството на народната просвета и на Висшия учебен съвет най-искрено и от сърце да приветствувам делегатите и гостите на 40-ия конгрес на Българския есперантски съюз.

Това е забележително събитие в културно-просветния живот на нашата общественост, което съвпада с петдесетгодишнината от създаването на Работническия есперантски съюз в България.

Откриването на конгреса в деня, когато преди петдесет години бе основан Работническият есперантски съюз в България, и отбелязването по този начин на половинвековния юбилей, има огромно значение за интернационалното възпитание на всички поколения есперантисти и особено за младото поколение, което е поело щафетата от ветераните-есперантисти и ще я носи още по-успешно напред при построяването на комунистическото общество в нашата страна.

Голяма и благородна е ролята на българските есперантисти, които умело свързват

цялата своя многостранна дейност с изграждането на социалистическото общество у нас, с укрепването на мира и дружбата между народите.

С основание можем да кажем, че днешното есперантско движение, което обединява хиляди ентузиастични български есперантисти, е продължение на всичко добро от развитието на Работническия есперантски съюз.

Ние не се съмняваме, че многобройната армия български есперантисти, сред които има не малко преподаватели, учители и учащи се, изпълнени с ентузиазъм да служат вярно и предано на Партията и народа, с готовност и занаят ще вливат своите сили в редиците на есперантското движение за постигане на нови успехи в разпространяването и използването на международния език есперанто, за запознаване на своите чуждестранни приятели с постиженията на Народна република България, за разширяване и укрепване на международното сътрудничество и мира.

От името на Висшия учебен съвет и на ръководството на Министерството на народната просвета от все сърце пожелавам на 40-я конгрес на Българския есперантски съюз, на българските есперантисти плодотворна работа и нови успехи.

ТЕЛЕГРАМА

До Националния Комитет за защита на мира — София Скъпи другари

40-ят юбилеен конгрес на българските есперантисти, състоял се на 12—14 юли 1980 г. в гр. Пловдив с участието на повече от 2300 делегати и гости, ви изпраща пламенни, възторжени привети.

Като активни строители на социализма, пламенни патриоти и убедени интернационалисти българските есперантисти използват международния език есперанто в служба на мира, разбирателството и сътрудничеството между народите. Те участвуват активно в Световното есперантско движение за мир (МЕМ) и широко популяризират дълбоката привързаност и любов на нашия народ към мира и международното приятелство, популяризират искрената миролюбива политика на нашето народно правителство. В сегашния момент българските есперантисти дават своя принос в борбата за намаляване на между-

народното напрежение, за забрана на атомното оръжие, за пълно и всеобщо разоръжаване. Българските есперантисти участвуват активно в работата на местните и окръжни комитети за защита на мира. Те изразяват готовност да окажат според възможностите си своята помощ за най-успешно провеждане на Световния парламент на народите за мир, който ще се състои в София през м. септември т. г. и в духа на договора за сътрудничество между Международния комитет на мира и Световния съвет на мира да съдействуват за установяването и разширяването на връзки между комитетите за защита на мира в нашата страна и комитетите и организациите за мир в чужбина.

Есперанто — в служба на възхода и разцвета на социалистическата ни Родина, на укрепването на мира и мирното сътрудничество между народите!

Да живее и побеждава делото на приятелството, разбирателството и сътрудничеството между народите от целия свят!

От конгреса

ТЕЛЕГРАМА

До Централния комитет на Българската комунистическа партия — София

Скъпи другари,

40-ят юбилеен конгрес на Българския есперантски съюз, състоял се от 12—14 юли 1980 г. в древния и вечно млад град Пловдив с участието на 2339 делегати и гости от 18 страни, изпраща най-искрени, пламенни поздравии на централния комитет на родната Комунистическа партия-ръководителка.

Продължавайки борческите традиции на Българския работнически есперантски съюз, 50-годишнината от основаването на който бе отбелязана тъкмо в дните на конгреса, българските есперантисти работят с жар за претворяване в живо дело решенията на Единадесетия конгрес на Българската комунистическа партия за изграждане на развито социалистическо общество в нашата страна. Българският есперантски съюз разгръща активна дейност за издигане на културното равнище на своите членове и за възпитанието им в дух на пламенен патриотизъм, пролетарски интернационализъм и искрено миролюбие. Българските есперантисти все по-широко и по-организирано използват международния език есперанто за създаване на разностранни връзки на трудещите се от нашата страна и трудещите се от другите страни, за задълбочаване на приятелството и доверието между тях. Те пропагандират по света грандиозните успехи на нашето социалистическо строителство и искрената миролюбива политика на нашето народно правителство, популяризират красотите и курортите на нашата Родина, нейното славно минало, радостно настояще и още по-светло бъдеще. Чрез есперанто те печелеха и продължават да печелят нови и нови приятели на нашето социалистическо Отечество в целия свят. Българските есперантисти вървят в челните редици на борбата за мир и разбирателство между народите. С цялата тази своя дейност и с огромната работа извършена от Българския есперантски съюз за успешното провеждане през 1978 г. на грандиозния 63-ти Световен есперантски конгрес във Варна, в който участваха 4500 есперантисти от 51 страни на континента и от 34-я конгрес на Световната младежка есперантска организация във Велико Търново през

същата година с около 450 участници от 26 страни, българските есперантисти заслужено си създадоха високо международно признание и авторитет.

40-ят юбилеен конгрес на Българския есперантски съюз е подходящ повод за нас да изразим още веднъж дълбоката благодарност на всички български есперантисти за добрите условия, които Партията и народното правителство създадоха и продължават да създават за развитието на есперантското движение в нашата страна. Ние сме дълбоко убедени, че българското есперантско движение и занапред ще се радва на добри грижи от страна на Партията, народната държава и ще намира тяхната морална и материална подкрепа, за да може с още по-голям успех да решава големите и отговорни задачи, които стоят пред него и още по-пълноценно да участва в решаването на всенародните задачи.

От трибуната на конгреса ние високо заявяваме, че на грижите и помощта на Партията ние, българските есперантисти, ще отговорим с нови дела и с още по-голям личен принос за успешното изпълнение на плана за седмата петилетка, за достойно посрещане на дванадесетия конгрес на Българската комунистическа партия и за превръщане в живи дела на неговите предначертания. Едновременно с това ние ще работим още по-упорито за разпространението и все по-успешното използване на международния език есперанто в служба на възхода и разцвета на социалистическата ни Родина, за запазване и задълбочаване на процеса на разведраването в международните отношения, укрепване на мира и мирното сътрудничество между народите от цял свят в духа на Заключителния акт от Хелзинки, както и за достойното отпразнуване на 1300-годишнината от създаването на българската държава.

Да живее Българската комунистическа партия — мъдрият и изпитан кормчия на нашия народ по пътя на комунизма — пътя на всеобщото щастие и благоденствие!

От конгреса

Пловдив 14. VIII. 1980



R E Z O

DE LA 40A JUBILEA KONGRESO DE BULGARA

La delegitoj de la 40a jubilea kongreso, kiu okazas en rimarkinda enlanda politika kaj labora impeto por realigo de la decidoj de la XI kongreso de BKP kaj la Nacia Partia Konferenco, atente traegis kaj pridiskutis la kvarjaran raporton de la Centra Estraro de BEA, kiel ankaŭ la antaŭstarantaj taskojn, kaj unuanime aprobas la faritajn konkludojn kaj direktivojn.

La kongreso manifestas la idean kaj politikan unuecon de la bulgaraj e-istoj, kiuj laboras por realigo de la partia programo — konstruo de matura socialisma socio en nia lando sub la gvido de Bulgara Komunista Partio ĉefrunte kun la unua partia kaj ŝtata gvidanto kamarado Todor Jivkov.

La bulgaraj e-istoj aliĝis amase al sia jubilea kongreso, post kiam ili kune kun nia tuta popolo solene celebris la 110an naskiĝtagon de V. I. Lenin, la gvidanto de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio — la plej grava evento en la tuthomara historio.

La kongreso, kiu malfermiĝis en la sama tago, en kiu antaŭ 50 jaroj estis fondita la Bulgara Laborista E-Asocio, esprimas sian senkondiĉan kaj senliman fidelecon de la bulgaraj e-istoj al la sankta kaj eterna amikeco inter la bulgara kaj sovetaj popoloj, kaj sendas fratajn salutojn al la sovetaj e-istoj, organizitaj en la Asocio de Sovetaj E-istoj.

La periodo inter la 39a kaj 40a kongresoj estis fruktodona por BEA. Plenumante la decidojn de la 39a kongreso, okazinta en U. Ruse en 1976, la gvidorganoj de BEA ĉe ĉiuj gradoj plibonigis sian agadon. Estis realigitaj diversaj aranĝoj — konferencoj, kunvenoj, festivaloj, renkontiĝoj. Estis organizita socialisma konkurado lige kun la kongreso, kio servis kiel stimulo en la laboro de la societoj kaj sekcioj. Pli efika kaj inventema estis la propagando de E-o, kiu venigis novajn adeptojn al niaj vicoj.

Bulgara Esperantista Asocio laboris en bona kontakto kun amasaj kaj kulturaj organizaĵoj en la lando — Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, legejoj, packomitatoj ktp. Kun iuj el ili BEA havis komunajn taskojn.

Plivigligis la kontaktoj kun esperantistaj unuigoj en socialismaj landoj — USSR, GDR, Pollando, CSSR, Hungario, Vjetnamio, Rumanio, kio kontribuis al la interkonatiĝo kaj profundigo de la amikeco inter la e-istoj el tiuj landoj kaj nia lando.

BEA aktive kunlaboris en kelkaj internaciaj

E-organizaĵoj, celante per tio antaŭenpuŝi la E-movadon en la mondo, helpi por sekurigo de la mondpaco. Rezulto de tiu aktiva agado estis la impona 63a Universala Kongreso kaj la 34a kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), okazintaj en 1978 j. en nia lando. Ambaŭ kongresoj stimulis nian agadon — fondiĝis novaj sekcioj, venis novaj adeptoj speciale el la medio de la junularo.

Precipe aktivis la bulgara sekcio de MEM. Ĝi organizis tutlandan konferencon en urbo Polski Trambes, kunvenojn en diversaj urboj kune kun aliaj amasorganizaĵoj. La sekcio helpas la eldonadon de revuo „Paco“ kaj bulteno „Pacaktivulo“.

La sekcio de la instruistoj aranĝis somerajn kursojn por 800 personoj — bulgaroj kaj fremdlandanoj. Ĝi organizis ĉiujare pedagogiajn konferencojn.

La sekcio de la junularo (BEJ) organizis en diversaj urboj, konferencojn, seminariojn, festivalojn, balojn, en kiuj partoprenis centoj da gejunuloj.

Plilarĝiĝis la reciprokaj vizitoj per la Internacia E-Kursejo.

La sekcio de kolektantoj eldonis kelkajn riĉe ilustritajn numerojn de revuo „Kolektanto“, kiu gajnis amikojn ankaŭ en fremdlando. Pro partopreno en „Filaserdika 9“ la sekcio estis premiita per honora signo.

Plibonigis sian laboron la sekcio de sciencaj laboristoj. Ĝiaj membroj partoprenas internaciajn simpoziojn kaj renkontiĝojn.

Renovigis sian agadon la sekcio de fervojistoj.

La sekcio de esperantistoj-kooperativanoj kunhelpas la eldonadon de propagandaj materialoj pri la bulgaraj kooperativoj, kiujn oni sendas en fremdlandon.

En la laboro de BEA kaj ĝiaj filioj dum la raportita periodo ekzistas tamen ankaŭ malfektajtoj kaj mankoj:

— nesufiĉe oni akiras novajn membrojn en la medio de gekursanoj. Oni permesas malkontinuecon;

— la societoj ne kolektas regule membrokotizojn;

— nesufiĉe oni laboras pri plimultigo de la membraro el la medio de laboristoj kaj studentoj;

— oni ne sisteme laboras por la plibonigo de la organiza stato de sekcioj kaj societoj por preparado kaj edukado de aktivuloj.

L U C I O

ESPERANTISTA ASOCIO PLOVDIV, 12—14 DE JULIO

Por forigo de la malperfektaj kaj la plibonigo de la estonta agado la kongreso decidis:

1. Cni daŭrigu pli energie kaj insiste la plifortigon de la societoj, la fondon de novaj societoj, la plimultigon de la membraro. Lige kun la XII kongreso de BKP, la 1300a datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato kaj la 100a naskiĝtago de Georgi Dimitrov oni organizu socialisman konkuradon enkadre de la distriktaj organizaĵoj.

2. Oni plibonigu la laŭplanan laboron je ĉiuj niveloj, ĉe ĉiuj estraroj kaj samtempe oni organizu seminariojn por plialtigi la nivelon de la organiza laboro kaj por interŝanĝo de pozitivaj spertoj. CE kreu specialan signon por honori la elstarajn aktivulojn de la Movado. La distriktaj kaj societaj estraroj prizorgu kartotekon de siaj aktivuloj.

3. Oni enkonduki en la praktikon la regulan kunlaboradon kun la sociaj organizaĵoj kaj movadoj — Patrolanda Fronto, Dimitrova Junkomunista unuiĝo (Komsomolo), Sindikatoj, komitatoj de kulturo, komitatoj de paco, kluboj de sobro, virinaj komitatoj k. a., okazigante komunajn aranĝojn. Tie, kie ekzistas kondiĉoj, la societoj laboru en la kluboj por internacia amikeco, en la junularaj domoj kaj kluboj, en pioniraj domoj, en kulturdomoj ktp.

4. La sekcioj laboru laŭ planoj en pli intima ligo kun la profesiaj organizaĵoj kaj laŭ intereso; helpu ilin en la aranĝado de kontaktoj kaj renkontiĝoj kun kolegoj el aliaj landoj.

5. La bulgara E-junularo serĉu interesajn formojn de laboro kun la lernejana junularo, organizu kursojn en industriaj kaj aliaj entreprenoj kaj sciencaj institutoj, helpu la vastigon de korespondado inter niaj kom-somolaj societoj kaj fremdlandaj junularaj societoj. Ĝi turnu pli multe da atento al sia estonta laboro, al la perspektiva planado kaj plibonigo de la sistemo de informado al siaj membroj. La distriktaj kaj societaj estraroj en sia ĉiutaga laboro donu specialan atenton al la junularaj problemoj.

6. BEA regule okazigu aranĝojn por preparo de instruistoj pri E-o, tradukistoj kaj aliaj verkantoj.

7. La socia organo „Bulgara Esperantisto“ apartigu pli multe da loko por taŭgaj materialoj por la novaj e-istoj. La redakta komi-

tato prizorgu pli akurate la disvastigon de la revuo en eksterlando.

8. La internacia E-Kursejo en v. Pisanica apud Smoljan devas esti finkonstruita en proksima estonteco kaj komenci la regulan akceptadon de kursanoj el nia lando kaj eksterlando. La Estraro de la IEK organizu modelan restadon kaj priservon de la kursanoj en nia lando postulante la samon de la kontraktantoj por la bulgaroj, kiuj vizitas kursojn eksterlande.

9. La CE certigu pli rapidan eldonon de vortaroj kaj aliaj lernohelpiloj. Ĉiujare ĝi certigu la eldonon de tradukita kaj originala literaturo de elstaraj bulgaraj kaj esperantistaj verkistoj.

10. La CE, la distriktaj kaj societaj estraroj turnu pli da atento al la instrulaboro kaj sorgu pli akurate pri ĝia aktualigo, elektu por instruistoj kapablajn pedagogojn.

11. Kune kun la E-asocioj de socialismaj landoj kaj precipe kun la ASOCIO DE SO-VETAJ E-ISTOJ la CE de BEA ellaboru perspektivan planon pri la disvolvigo de la E-movado dum la 80aj jaroj.

12. La Buroo de CE de BEA plibonigu sian laborstilon, certigante al siaj memoroj la eblecon de oftaj personaj kontaktoj kun la distriktaj estraroj kaj iuj societoj, kiuj bezonas organizan helpon. La CE prenu urgajn rimedojn por plibonigi la laboron en tiuj distriktoj, kie la Movado estas malforta; ankaŭ la najbaraj distriktoj donu al ili helpon tiucele.

13. La estraroj de ĉiuj niveloj trastudu la fundamentajn dokumentojn de la Partio kaj la Registaro kun la celo enkonduki la ekonomian metodon en sia estonta agado, sin gvidi de la ĉefaj direktoj por la plua efektiva disvolvigo de la landa ekonomio kaj la apliko de la ekonomia metodo en la regado de la kultura kaj socia frontoj.

14. La kongreso devigas la Centran kaj distriktajn estrarojn informi ĉiujn asociajn membrojn pri la kongresaj decidoj, prilaborante konkretajn aranĝojn por ilia realigo, por nova progreso de nia E-movado.

15. La kongreso esprimas sian fortan konvinkon, ke la novelektita CE sukcesos mobilizi ĉiujn asociajn ĉenojn por plenumo de la prenitaj decidoj.

Al energia kaj fruktodona laboro por supreniro de nia kara E-movado, por la feliĉo de nia amata socialisma patrujo — Popola Respubliko Bulgario!

ЦЕНТРАЛНО РЪКОВОДСТВО НА БЕС

1. Инж. Ангел Христов Тодоров	— София	62. Мария Михайлова Кожарева	— Банско
2. Ангел Вълков Гяуров	— Попово	63. Мариана Михайлова Еленова	— София
3. Антон Симеонов Антонов	— Кубрат	64. Манол Стоиленов Чолев	— Велинград
4. Асен Георгиев Григоров	— София	65. Марин Димитров Маринов	— София
5. Атанас Илиев Гаев	— Асеновград	66. Мария Лабова	— Кюстендил
6. Белка Христова Белева	— София	67. Надежда Сиркова	— Русе
7. Бойка Георгиева Баталска	— София	68. Нано Цанов Кочуков	— София
8. Божидар Леонов Стефанов	— Карлово	69. Нано Вутов Нанов	— София
9. Борис Киров Горнишки	— Кнежа	70. Недко Георгиев Недев	— Русе
10. Проф. Васил Цолов Песевски	— София	71. Нено Стефанов Янев	— Габрово
11. Василка Антонова Цветкова	— София	72. Никола Борисов Николов	— Нова Загора
12. Васил Христов Бозаров	— София	73. Ненко Йонков Ненков	— София
13. Венелин Георгиев Великов	— Плевен	74. Никола Богданов Алексиев	— София
14. Веселина Христова Куртева	— Пловдив	75. Инж. Никола Пилев Милев	— Хасково
15. Веска Драгостинова Минчева	— Шумен	76. Инж. Никола Атанасов Узунов	— Хасково
16. Виолин Олянов Цанев	— София	77. Павел Великов Еленов	— Варна
17. Вержиния Докова Петкова	— Видин	78. Ненка Любенова	— Севлиево
18. Владимир Тодоров Желев	— Пловдив	79. Огнян Иванов Кехайов	— Смолян
19. Владимир Петров Рангелов	— София	80. Пенчо Найденов Влахов	— Ловеч
20. Георги Маринов Добрев	— Русе	81. Пена Иванова	— Свищов
21. Георги Василев Калашки	— Кюстендил	82. Пейо Раев Пеев	— Пазарджик
22. Гено Манев	— Дряново	83. Петър Колев Ненов	— Разград
23. Георги Идакиев Павлов	— Хасково	84. Инж. Петър Ангелов Тодоров	— София
24. Георги Христов Димов	— Варна	85. Петко Петров Арнаудов	— Пазарджик
25. Георги Цветков Иванов	— Варна	86. Петко Цанев Петков	— Ловеч
26. Димитър Иванов Хаджиев	— София	87. Райно Иванов Чепилев	— Стара Загора
27. Димитрина Тончева	— Благоевград	88. Радослав Кузманов Тричков	— Враца
28. Димо Жекон Трудолобов	— Ямбол	89. Д-р Росица Димитрова Джурова	— Разград
29. Димитър Стоянов Марев	— Чепеларе	90. Сава Атанасов Дълбоков	— София
30. Димитър Атанасов Мутушев	— София	91. Серафим Стоянов Серафимов	— Бургас
31. Димитър Атанасов Христов	— Ямбол	92. Инж. Симеон Делчев Симеонов	— София
32. Димитър Стоянов Паназов	— София	93. Стефан Петров Павлов	— Смолян
33. Инж. Димитър Любенов Ждраков	— Велинград	94. Стефан Ганев Попов	— Русе
34. Драгушко Симеонов Петров	— София	95. Стелана Янкова Димитрова	— София
35. Добринка Григорова Ананиева	— Благоевград	96. Спиридон Недялков Петров	— Перник
36. Евгени Василев Георгиев	— София	97. Стойчо Тодоров Цанков	— Русе
37. Емил Симеонов Чирпански	— Асеновград	98. Стоян Петров Костадинов	— София
38. Елена Иванова Стойкова	— Бургас	99. Проф. Стоян Стоев Джуджев	— София
39. Иван Миланов Чулев	— София	100. Д-р Стоян Горанов Морареску	— София
40. Иван Димитров Войнов	— София	101. Стоян Николов Танев	— Пазарджик
41. Иван Димитров Керемидчиев	— София	102. Снежана Атанасова Ангелова	— Враца
42. Иван Лишев Тодоров	— Троян	103. София Иванова Сутрова	— Русе
43. Иван Апостолов Трайков	— Петрич	104. Стоян Николов Павурчев	— Враца
44. Иван Тодоров Иванов	— Търговище	105. Савка Горанова	— Берковица
45. Илия Маринов Илиев	— Кубрат	106. Тодор Георгиев Петков	— Толбухин
46. Игнат Николов Игнатов	— Видин	107. Траяна Спасова Петкова	— София
47. Йордан Петров Йорданов	— София	108. Хаим Буко Леви	— София
48. Проф. Йордан Н. Йотов	— София	109. Хачик Дикран Хачикян	— София
49. Йордан Димитров Ангелов	— Пловдив	110. Христо Манолов Христов	— Полски
50. Йордан Доксимов Чаловски	— София		Тръмбеш
51. Калю Митев Бялков	— Бургас	111. Христо Василев Долчинков	— В. Търново
52. Калинка Живкова Василева	— София	112. Христо Маринов Горев	— София
53. Кано Митев Канев	— Гълъбово	113. Христо Канев Иванов	— София
54. Кирил Петров Велков	— Враца	114. Христо Асенов Керелезов	— Кърджали
55. Кирил Денчев Калчев	— Ловеч	115. Фани Милева Михайлова	— Пловдив
56. Кирил Чиндин	— Казанлък	116. Цветана Йорданова Зарева	— Перник
57. Проф. Кирил Петков Попов	— София	117. Цвятко Тодоров Стоянов	— Шумен
58. Кръстю Димитров Петков	— Каруин	118. Цанко Петров Мургин	— Шумен
59. Кунчо Иванов Вълв	— София	119. Цочо Данчев Коларов	— Ловеч
60. Любомир Димитров Михайлов	— София	120. Чудомир Милайлов Кантарджиев	— Сливен
61. Лалю Цанков Лалев	— Троян	121. Щерю Кукушев Замфиров	— Пещера


ЦЕНТРАЛНА КОНТРОЛНА КОМИСИЯ

1. Богдана Иванова Попова
3. Борис Величков Попов
3. Владо Димитров Атанасов
4. Виктор Ценов
5. Георги Николов Долапчиев
6. Любен Грозданов
7. Моис Бенвенисти
8. Никола Младенов
9. Стефка Минкова — Маркова

BURRO DE LA CENTRAESTRERO DE BEA elektita de la plenkunsido de CE de BEA

Hristo Gorov — prezidanto
 Nano Kjućukov — vicprezidanto
 Petro Todorov — vicprezidanto
 Kunčo Válev — ĝenerala sekretario
 Dimitro Papazov — sekretario
 Bojka Bataliska — sekretario

Membroj:
 Nikola Aleksiev, Violin Oljanov, Angel Todorov,
 Stojan Kostadinov, Hristo Kanov, Krástju Karucin,
 Ljubomir Mihajlov, Jordan Angelov.



Ci-jare pleniĝas kvindek jaroj depost la formigo de Bulgara Laborista Eperanto-Asocio (BuLEA). En la medio de bulgara esperantistaro tre frue formiĝis progresema alo, ekstarinta malkaŝe sur la pozicioj de marksismo-leninismo.

La celebrazo de la 50-jariĝo de BuLEA havas grandan edukatan signifon por ĉiuj esperantistaj generacioj kaj precipe por la juna kaj mezaga, kiuj alprenis la stafeton de la veteranoj kaj portos ĝin ĉiam pli sukcese antaŭen.

Tiuj, kiuj antaŭ duonjarcento metis la fundamenton de BuLEA, manifestis klarvidecon. Ili jam tiam skizis la grandan progreseman rolon, kiun povus plenumi la e-istoj, se ili ligus la E-movadon kun la sociaj ideoj pri konstruado de nova socio de sociala progreso, amikeco kaj paco inter la popoloj, por ebligi al la homa kulturo kaj civilizo atingi nesupozeble altajn suprojn.

La nuntempa E-movado ĉe ni estas feliĉa daŭrigo de ĉiuj plej bonaj elementoj el la evoluo de BuLEA. Kaj se hodiaŭ Bulgara Esperantista Asocio funkcias kiel organizaĵo kun firma aŭtoritato, kiel enlande, tiel ankaŭ en la medioj de la internacia E-movado, tio tute ne estas hazardaĵo.

Tio estas rezulto de la pionira agado de tiuj aktivuloj, kiuj ŝparis nek fortojn, nek junecon, nek ĉe siajn sanon, liberon kaj vivon, kiam ili konstruadis BuLEA kaj sub ties standardo gvidis heroajn luktojn.

BuLEA ne aperis sur dezerta loko. Ĝi venis kiel laŭleĝa heredanto kaj daŭriganto de la kreita en 1920 komunista E-grupo en Sofio titolita „Balkana Liberiga Stelo“, ĉekape kun Panajot Kolev.

En la kondiĉoj de kruelega faŝista diktaturo kaptinta la regopotencon per sanga pogromo super la laboristklasa movado en 1923, la fortoj de la peze frapitaj, sed ne plene detruitaj laboristaj organizaĵoj komencis iom post iom restarigi.

La nova revolucia impeto en nia lando en la fino de la 20-aj jaroj reflektis ankaŭ sur la konseco de la pli progresemaj e-istoj, membroj de la societoj de BEA. Ties gvidantoj staris sur „superklasaj“ pozicioj, eĉ iuj el ili malkaŝe subtenis la politikon de la faŝista diktaturo. La maldekstraj e-istoj ne aprobis tiun linion de BEA kaj komencis fondi siajn apartajn societojn en multaj urboj, eĉ en vilaĝoj. Plej aktivaj estis la

societoj en Sofio, Plovdiv, Asenovgrad, Vraca, Sliven, Stara Zagora, Varna k. a. Grupoj aŭ individuaj aktivuloj funkciis ankaŭ en la vilaĝoj Teliŝ, Diĉin, Gabarevo, Radotina k. a.

Iniciatita de la ĉefurba laborista E-societo komencis aperadi en 1929 monata revuo en bulgara kaj E-o „Balkana Laboristo“. Baldaŭ la revuo transformiĝis en kolektivan organizanton, ĉirkaŭ kiu grupiĝis la plej fidelaj fortoj de la nova laborista E-movado. En mallonga periodo estis farita la preparlaboro por kunvoko de fondkonferenco por aprobo de statuto kaj elekto de landa estraro.

La 12an de julio 1930 en Sofio ĉe duonleĝaj kondiĉoj estis organizita konferenco, kiu metis la fundamenton de Laborista E-Asocio en Bulgario. Ĝia presorgano estigis la revuo „Balkana Laboristo“.

BuLEA iniciatis tre aktivan eldonadon. Precipe oni sentis la bezonon de instru-helpila literaturo kun proleta enhavo. Asen Grigorov relaboris kaj adaptis al niaj bulgaraj cirkonstancoj la konatan lernolibron de la sovetia aŭtoro Sergej Rubljov por direkta instruado de la lingvo, sen troa amasigo de gramatikaj reguloj. Li kompilis ankaŭ poŝvortarojn

BuLEA eldonis ankaŭ la originan verskolekton de Grigorov „Ruĝa aŭro“ sub pseŭdonimo M. Ljubin, kiel ankaŭ rakonton de Hristo Gorov „Du frontoj“ sub pseŭdonimo Hrima. Tiuj ĉi kamaradoj plus Atanas Lakov tradukis rakontojn de Georgi Karasjajov „Sub posteno“ kaj kolekton de versaĵoj kaj prozaĵoj de la proleta poeto Hristo Smirnovski, aperigitaj sub titolo „Tra la ventego“. Estis publikita la propaganda broŝuro „La internacia lingvo Esperanto kaj la laborista klaso“ de N. Brezin, kiel ankaŭ aliaj eldonaĵoj.

La revuo „Balkana Laboristo“ digne plenumis sian pioniran devon kaj anstataŭ ĝi komencis aperadi en bulgara lingvo gazeto „Internacia Lingvo“. La gazeto multe kontribuis por popularigo de la agado de Laborista E-Asocio.

En tiu periodo en nia lando estis iniciatita movado de laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj — kunlaborantoj de la proleta gazetaro el fabrikoj, laborejoj, oficejoj, urboj kaj vilaĝoj. BuLEA jam disponis pri centoj da laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj. Tial tute rezone elkreskis nova eldonaĵo, ree en bulgara lingvo — la gazeto „Internacia Laborist-Kamparana Korespondanto“ — unika fenomeno de la krea iniciativo de la bulgara laborista E-movado. Nenie en la mondo aperadis simila eldonaĵo. Pri ĝi interesiĝis vastaj neesperantistaj legantaj rendoj, dezirantaj informi pri la vivo kaj la bataloj de la internacia laborista klaso kaj precipe pri la konstruado de socialismo en la unua kaj tiutempe sola ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj — Soveta Unio.

Ni devas kun fiero emfazi, ke por la eldonado de nia E-organo grandan meriton havas la respondecaj redaktoroj, kiuj estis altirataj en la policon kaj la ĵuĝojn, estis arestataj kaj malliberigitaj, oferis sian sanon kaj junecon nur por povi certigi la aperigon de niaj lumfontoj, persekutataj fare de mezepoka inkvizicia cenzuro.

BuLEA serioze zorgis pri la disvastigo de E-o en la mediojn de la laboruloj en urboj kaj vilaĝoj, malfarmante kursojn. Eĉ pli: en ĉiuj medioj de la klasbatala laborista movado BuLEA kreis favoran rilaton al la utiligado de tiu lingvo por la celoj de la laborista klaso. La neesperantista laborista gazetaro publikigis multajn materialojn liveratajn pere de E-o.

BuLEA ne estis unusola laborista E- asocio. Similaj ekzistis ankaŭ en aliaj kapitalismaj landoj, ankaŭ en Sovetunio. Ili ĉiuj unuiĝis en la tiel nomatan Sennaciecan Asocion Tutmondan (SAT), kreitan en 1921 kun sidejo en Parizo.

Sed la gvidanto de SAT kaj ties ĉefa ideologo Eugenio Lanti forlasis la Francan Komunistan Partion kaj ekstaris sur revizionismajn poziciojn. Pri fundamentaj problemoj de la internacia E-movado li defendis malutilajn, utopiajn konceptojn.

Dum 1930 en SAT formiĝis opozicio de revoluciaj e-istoj. La opozicio komencis eldonadi propran organon — la gazeton „Internaciisto“. Baldaŭ ĉirkaŭ ĝi grupiĝis du trionoj de la SAT-membraro. En 1931 paralele kun la Ila SAT kongreso en Amsterdamo kunsidis ankaŭ kongreso de revoluciaj e-istoj. En 1930 estis kreita en Lajpco (Germanio) sovetagermana eldono por revolucia E-literaturo „EKRELO“, kiu eldonis pli ol 70 titolojn de valora marksisma kaj alia progresema literaturo.

En aŭgusto 1932 en Berlino estis fondita vere klasbatala unuefronta esperantista internacia organizaĵo. Ĝi nomiĝis Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE).

La bulgaraj proletaj e-istoj ekstaris entute je la flanko de IPE. En la kondiĉoj de faŝista Bulgario ili realigadis ties gustan linion. En la eldono de IPE aperis ankaŭ verkoj de bulgaraj aŭtoroj.

Ce CK de BuLEA funkciis specifa formajo por liverado de materialoj al la neesperantista laborista gazetaro en eksterlando pri la stato kaj la bataloj de la laboruloj en faŝista Bulgario. Tiu formajo estis nomata „Proleta Esperanto-Korespondanto“ aŭ „PEK-servo“. Ĝi kunlaboris kun similaj PEK-servoj en aliaj landoj sub la centra gvido de k-do Otto Bissler (Besler) en Lajpco.

El la konciza retrorigardo de la agado de BuLEA estas videble, ke la asocio estis integra parto de la ĝenerala laborista movado nialanda kaj nome pro tio estis persekutata de la organoj de la faŝista diktaturo sen ia ajn cede. La faŝista regpotenco tenis BuLEA en stato de duonleĝa organizaĵo: malhelpadis per ĉiuj rimedoj la normalan agadon de la asocio, konfiskadis ĝiajn eldonaĵojn, persekutadis ties legantojn kaj disvastigantojn, enkarcerigis kaj ĵuĝis severe la respondecajn redaktorojn de BuLEA-gazetaro kaj fine malpermesis la legalan ekziston de la asocio kaj ties organoj. La polic-organoj en Plovdiv kaj Varna malkaŝis la agadon de la laboristaj e-istoj, elfabrikis esperantistajn „konspiraĵojn“, arestis kaj ĵuĝis vicon da aktivuloj de BuLEA: Hristo Gorov, Kostadin Ciĉanov, Todor Sofroniev, Violin Oljanov, k. a.

En la jubileaj tagoj de BuLEA ni povas fiere deklari: BuLEA estis asocio-martiro, sed ankaŭ asocio-heroo! Ĝi digne plenumis sian devon, malgraŭ la ekskluzive pezaj

kondiĉoj de agado, en kiujn estis metita. La aktivuloj kaj funkcioj de BuLEA eltenis je arestoj, bategoj, maldungoj de laboro, polica translogio, mallibereco. Entute dum ĝia ekzisto pereis pli ol 150 membroj kaj estraranoj de BuLEA. Tie ĉi mi citas la nomojn nur de kelkaj: Nikola Sopov, sekretario de CK de BuLEA, Hristo Nikov, Nikola Botuŝev, Dimitro Kaljaŝki, talenta poligloto, Hristo Karpaĉev, poeto, Hristo Kozlev, poeto, Rajĉo Kirkov, Dimitro Petrov, Kosta Aleksandrov, Ivan Filev, kiel ankaŭ de la pli junaj ol ili daŭrigintoj de la batalpreta esperantista stafeto: Vela Peeva, kolonelo Diĉo Petrov, la poeto Cvetan Spasov, Stojan Edrev, legendeca heroo, d-ro Varban Genĉev k. m. a.

Por nia ĝojo, kiel skribis en sia libro „Nia vivo“ Trifon Hristovski, ĉampiono de la internacia E-korespondado, la malamiko ne sukcesis ekstermi ĉiujn aktivajn funkciojn kaj membrojn de BuLEA: dekoj de ili, kvankam kun grizigintaj haroj aŭ tute kalvigintaj, restas ankoraŭ inter ni. Ni ĝojas al ili — reprezentantoj de tiu heroea generacio, kiu metis la fundamenton de BuLEA kaj partoprenis ĝian agadon. Ni bondeziru al ili esti ankoraŭ longajn jarojn sanaj kaj viglaj! Ni fieras pri ili!

Post la malpermeso de la agado de BuLEA la klaskonsciaj e-istoj transiris organizite al la vico de BEA, precipe en 1936. En la plimulto de la lokaj E-societoj ili okupis sufiĉe respondecajn postenojn. La polico insistis pri forigo de Asen Grigorov, Trajanka Petkova k. a. el la asociaj vicoj. Sed Ivan Esperov sukcesis konservi sian postenon kaj kunlabore kun prof. d-ro Stojan Gubev daŭre redaktis la revuon „Bulgara Esperantisto“ ĝis ĝia ĉesigo en 1942. Al Esperov CK de BEA konfidis la gvidadon de la kongreslaboroj en Loveĉ en 1940 kaj la trailegon de la agadraporto. Tiu kongreso estis la lasta antaŭ la liberigo de nia lando je la naŭa de septembro 1944.

Sed eĉ en tiuj ekstreme malfacilaj kondiĉoj la proletaj e-istoj daŭrigis sian laboron por la disvastigo de E-o kaj ties utiligo en la batalo de nia popolo kontraŭ la juko de la faŝismo. Sub la redaktado de Asen Grigorov, poste de Ivan Esperov, aperadis semajna E-paĝo en la ĉiutaga gazeto „Zarja“ (Ĉielruĝo) kaj en alia ĉiutaga gazeto „Nova Kambana“ (Nova sonorilego), redaktata denove de Ivan Esperov. En tiu periodo eldonis ankaŭ unu novjara E-gazeton kaj unu esperantan popoltipon poŝkalendareton kun antifaŝista karaktero.

Kune kun la apero de la liberco en la hela naŭa septembra mateno de 1944 kreiĝis la necesa

kondiĉoj por senbara disvolvigo de la fortoj de bulgaraj e-istoj al standardo de Bulgara Esperantista Asocio, ekstarinta firme sur la pozicioj de la liberiga Patrolanda Fronto. Dank' al sia ĝusta politiko hodiaŭ BEA estas unu el la ŝatataj kulturklerigaj organizaĵoj — ĝi estas kolektiva membro de Patrolanda Fronto, la plej amasa politika organizaĵo de nia popolo. La prezidanto de BEA k-do Ĥristo Gorov estas membro de la Prezidio de Patrolanda Fronto.

Cio valoras el la heredaĵo de BuLEA daŭre vivas kaj donas abundajn fruktojn en la agado de BEA hodiaŭ. Kiel sciante, la internacia E-movado jam dufoje esprimis sian fidon al la bulgara

esperantistaro kaj ties asocio, konsentante pri organizado de du universalaj kongresoj de E-o en Bulgario (Sofio — 1963 kaj Varna — 1978). Ili reliefigis inter la plej amase vizititaj mondaj kongresoj de la esperantistaro el la kvin kontinentoj.

Plenaj de fido en niaj fortoj kaj en la perspektivoj de la E-movado en nia lando, ni subtenas intiman kontakton kun la esperantistaro en la mondo, kun Universal Esperanto-Asocio, kun Mondpaca E-movado, kun Monda Pac-konsilio kaj aliaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj kaj movadoj. Feliĉe la kvindekjara jubileo de BuLEA koincidas kun la neantaŭlonge okazinta XIIIa Konsultigo de niaj frataj E-Asocioj, organizita en la ĉefurbo de nia

socialisma patrolando dum la tagoj de la 110-jara datreveno de post la naskigo de la granda proleta gvidanto V. I. Lenin.

Armitaj per la flama entuziasmo kaj abnegacio de la pioniroj kaj herooj de BuLEA — antaŭen al novaj sukcesoj en la disvastigo kaj utiligo de la internacia lingvo E-o por konatigi en ĉiuj teranguloj la veron pri nova Bulgario, konstruanta maturan socialisman socion, gvidanta konsekvence pacaman politikon kontraŭ la malbonaŭguraj planoj de la imperiistoj pri preparado de raketnuklea mondmilito! Bulgario luktas por plua serenigo, malmarmado, sekureco, amikeco kaj daŭra paco inter la popoloj kaj la ŝtatoj en la tuta mondo! Esperanto — en servo al la pacbatalo!



Cvjatko TODOROV

ARDA ADEPTO

La elstara ŝakisto Majstro de la Sporto Ljudmil Conov estas estro de la neŭrologia fako de la Distrikta Hospitalo en u. Sumen.

„Pri ŝako mi okupiĝas jam de mia 6-jara aĝo — rakontas li. — La unuajn lecionojn instruis al mi mia onklo, sperta ŝakisto en Pazarĝik. Kiel lernanto en la elementa lernejo mi sisteme okupiĝis sub lia gvidado. En la fundamenta lernejo mi estis jam konata ŝakisto.“

Por d-ro Conov la vojo al la „silenta ludo“ estas longa kaj interesa. Jam en 1951 j. li ludas en la junpionira teamo de Plovdiv-distrikto, kiu gajnas la unuan lokon en la lando. Kiel gimnazia lernanto en Pazarĝik li trifoje estas urba eminentulo kaj en la turniro en Plovdiv gajnas la duan lokon post la fama majstro Pelitov. Ljudmil Conov estas akceptita en la nacia teamo de nia lando. Poste, kiel studento-medicinisto, li estas ŝakĉampiono de Plovdiv kaj partoprenas la respublikan turniron por viroj.

Venas la jaroj, kiam li devas eklabori kiel regiona kuracisto en la nekonata por li Sumen-distrikto, en urbeto Smjadovo. Novaj emocioj pro la renkontigoj kun la unuapacientoj. Li devas ofte veturi tra la regiono, vivi kun la homaj doloroj, zorgi pri ilia sanstato. Tiam la ŝako restas je dua loko. En 1965 j. la juna kuracisto estas la nura reprezentanto de Sumen-distrikto en la respublikala ŝak-konkurado. Poste dum du jaroj

li sukcese trifoje gajnas la necesajn poentojn kaj al li estas aljuĝita la titolo „majstro de la sporto“.

Krom la ŝako d-ro Conov havas diversflankajn interesojn. Antaŭ kelkaj jaroj li kaj lia edzino estis inter la unuaj, kiuj komencis lerni la internacian lingvon en kurso, organizita ĉe la Distrikta Hospitalo de la malnova e-istino kaj elstara pedagogo Rajna Kasabova. Li rapide komprenas la utilecon de tiu lingvo kaj ĝian noblan rolon por la tuthomara amikeco, kaj fariĝas ĝia arda adepto, diligente lernante ĝin. La kurson li sukcese finis kaj tuj fariĝis membro de E-societo „Ve-kigo“. D-ro Conov abonas E-revuojn, korespondas kun eksterlandaj geamikoj, propagandas E-on inter siaj gekolegoj kaj varbas novajn membrojn. Li fariĝis membro de la Bulgara Esperantista Medicina Sekcio kaj de ESLI (Esperantista Sak-Ligo Internacia). En 1977 j. d-ro Conov partoprenis la Internacian renkontigon de medicinistoj e-istoj en Krakov kaj revenis tre pozitive impresita kaj kontenta. Lia amata ŝak-ludo estis kronita per plej alta distingo dum la 63a UK en Varno, kiam li gajnis la unuan lokon en la ŝaka rapid-turniro kaj la kristalan pokalon — valora trofeo ne nur por li, sed ankaŭ por la ŝumenaj kaj bulgaraj e-istoj. La lasta lia venko estas la dua premio, gajnita en la esperantista ŝak-turniro en la hungara urbo Kaloĉa en 1979 jaro.

EN LA FAJRO DE L'BATALO

RAKONTAS AKTIVULO DE LEA

Sudorienta Bulgario. Ĉe la piedoj de la majesta Balkano, ornamita de la belegaj Bluj Roko, situas urbo Sliven, urbo de laborema kaj batalema loĝantaro. Urbo, kiu donis al la liberiga batalo kontraŭ la otomana jugo cent hajdutojn, urbo de centoj da partizanoj kaj batalintoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, urbo de poetoj kaj kulturagantoj.

En tiu bela urbo naskiĝis kaj loĝis mi — filino le malriĉa multinfana familio, kies patro, laboristo, apenaŭ sukcesis nutri nin. Mi ŝatis legi, regule vizitis la kvartalan klubejon de la Komunista Partio kaj ludis kun aliaj infanoj sur la scenejo dum la amuz-vesperoj. Tie mi ŝatis aŭskulti la paroladojn de pli aĝaj komunistoj, kiuj parolis tiel bele pri la estonta vivo. La teksa industrio naskis en la urbo klaskonscian laboristaron kaj fortan komunistan partion. Multajn jarojn la komunistoj en Sliven gajnis dum la balotoj kaj gvidis la urban komunumon. La urbo, membris majestajn manifestaciojn de la laboristaro, organizitajn de la Kompartio dum la internaciaj festoj aŭ dum strikoj.

Mi jam estis lernantino en la unuaj klasoj de la gimnazio. Lernis mi diligente kaj ne ĉesis viziti la klubejon de la Komunista Partio, kie mi komencis legi marks-leninajn literaturojn kaj aŭskultis interesajn paroladojn pri la unua socialisma lando — Sovetunio.

Venis la jaro 1923 kaj meze de la komunistoj ekestis maltrankvilo pro la alproksimiĝanta danĝero... Oni mallaŭte ekparolis pri mortigoj kaj pereigoj de komunistoj kaj mi, tiam 15-jara knabino, miris kaj ne ĉion komprenis. Sed nur kelkajn monatojn poste, dum la Septembra Ribelo, mi konsternite rigardis konatajn kamaradojn mortigitaj kaj ĵetitaj sur la urban placon apud la monumento de Ĥaĝi Dimitro por timigo de la loĝantoj. Tiuj homoj, kiujn mi treege estimis kaj fidis, estis mortigitaj kaj montritaj kiel krimuloj...

Ne plu estis klubejoj por renkontigoj de la komunistoj, ne estis majestaj manifestacioj, ne estis paroladoj pri la bela estonta vivo... Restis samaj nur la beleco de la Balkano, la hela brilo de la Bluj Roko kaj la konstanta refreŝiga blaveto el la monto. Post la unua konsterno baldaŭ venis rekonsilio. La komunistoj eklaboris nelegale, ankaŭ la junularo komencis aranĝi renkontigojn en privataj domoj.

La jaroj pasis. Mi lernis jam en la lastaj klasoj de la gimnazio kaj daŭre studis la marksismon en la nelegaj klerigandoj en la gimnazio. Ĉe unu tia renkontigo iu kamaradino faris sciigon, ke en la gimnazio estas malfermita kurso de Esperanto, kiun ni, kiel internaciistoj, devas viziti. Mi kaj miaj amikinoj tuj aliĝis al la kurso. Nur post kelkaj monatoj mi jam scipovis legi kaj skribi sufiĉe bone. Jam tiam mi enamigis en E-o kaj ne disigis de la E-libroj kaj la vortaroj.

En la urbo estis E-societo de lernantoj, kiuj regule aranĝis kunvenojn en la gimnazio. Tie oni faris paroladojn, diskutis. La societo de la e-istoj kaj abstinuloj altiris la plej progresemajn kaj laboremajn lernantojn. Dum tiuj kunvenoj bofis aktiva kleriga laboro. Mi regule vizitis ilin kaj ofte parolis.

Jen mi jam finis la lastan klason de la gimnazio. Mi posedis bonan diplomon kaj pro mia sindona laboro en la junulara E-movado mi estis sendita kiel delegito de la lerneja societo al la E-kongreso en Varna (1926). Dum la tuta veturado mi staris ĉe la fenestro de la vagono, mire rigardante la Balkanon, la nekonatajn urbojn kaj vilaĝojn de norda Bulgario kaj ĉe la alveno en Varna — la senliman Nigran Maron

kaj la centojn da e-istoj ĉe la stacidomo. Ĉio ŝajnis al mi belega sono — kaj la malfermo de la E-kongreso, kaj la renkontigoj de la junaj e-istoj, venintaj el la tuta lando. Tie ĉi unuan fojon mi vidis fremdlandajn e-istojn kaj povis kompreni ilin tute bone. Tie ĉi mi ekparolis libere en E-o.

Al mia naskiĝurbo Sliven mi revenis kvazaŭ kun flugiloj.

Venis la aŭtuno. Multaj miaj kunlernantoj forveturis Sofion por studi. Ankaŭ mi deziris studi en la Universitato, sed... Mankis rimedoj. La patro ne povis vivteni min en fremda urbo. Mi devis labori jam, sed kion? En la urbo estis multe da senlaboruloj. Krome oni konis min kiel aktivan komunistinon. Foje mi sukcesis fariĝi laboristino en ŝtrumpfabriko, sed nur post kelkaj monatoj oni maldungis min kiel organizanton de striko. Mi tamen ne malesperigis, sed pli obstine daŭrigis mian partian kaj Esperantan laboron.

Du jarojn post la kongreso en Varna mi vizitis la kongreson en Vraca kiel delegito de la urba E-societo. Mi atente sekvis la laboron de la kongreso kaj la batalon inter la progresemaj kaj konservativaj e-istoj. El Vraca mi revenis kun ankoraŭ pli granda sperto kaj deziro labori.

Mi jam sufiĉe bone posedis E-on kaj havis viglan korespondadon kun gejunuloj el multaj landoj. Jam de kelkaj jaroj en nia lando estis fondita Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). ĈK de BuLEA estis en Sofio. Ĝi konsistis el progresemaj junuloj — laboristoj kaj studentoj. Kiel sekretario de la Laborista E-Societo en Sliven mi subtenis viglan korespondadon kun la centro en Sofio. Regule mi ricevis en multaj ekzempleroj la bulgarlingvajn ĵurnalojn „Mejdunaroden ezik“ (Internacia lingvo), „Rabotničesko-Selski Korespondent“ (Laborista-kamparana korespondanto — mallongigite „Rabselkor“) k. a. kaj ilin disvendis inter la laboristoj de Sliven. Kvankam ne ĉiam bone nutrita kaj vestita, mi estis ĉiam gaja kaj esperplena. Tutan paperujon de E-leteroj el plej diversaj landoj mi posedis. La plej multaj kaj la plej interesaj estis el Sovetunio. Jen leteroj el Saratov, senditaj de la studento Sergej Boev, kiu tiel entuziasme skribis pri la vivo kaj laboro de la sovetaj gejunuloj, plenumantaj la unuajn ekonomiajn planojn de USSR (nun li estas fama akademiano. S. Boev). Jen leteroj de Paŭlo Sumilov el Leningrad — laboristo, partopreninto de la Granda Oktobra Revolucio. Jen leteroj de Ignatiev el Moskvo, leteroj de Faja Hutorjanskaja el Kiev k. a. La sovetaj kamaradoj skribis pri sia nova vivo, pri la organizado de la kolhozoj, pri la batalo kontraŭ la „kulakoj“ (vilaĝaj riĉuloj-eksploatantoj) k. a. Estis interesaj ankaŭ la leteroj de gekamaradoj el Germanio, Francio k. a., kiuj same kiel ni batalis kontraŭ faŝistaj reĝimoj. Tiujn leterojn mi legis dum renkontigoj de la junaj komunistoj en nia urbo.

Kaj kiom multe da goĝo kaj espero vekis ĉiu letero, — precipe la venintaj el Sovetunio. Ĉiu kamarado deziris vidi la leterojn, ĉiu palpis, kisis tiujn heroldojn de libero kaj justeco, venintaj al ni malgraŭ la altajn limmuroj, starigitaj de nia burĝa registaro.

Mi sukcese kunligis mian partian kaj Esperantan laborojn. En bulgaran lingvon mi tradukis la interesajn leterojn kaj sendis ilin al la redakcioj de progresemaj ĵurnaloj — „Pogled“, „Eho“, „Rabselkor“ k. a. En la sama tempo, helpita de partianoj, mi verkis artikolo-



De maldekstre dekstren

SIDANTAJ: M. Conkovski, T. Kerezova, I. Ignatov, D. Andreev, M. Šiškov, St. Kostadinov, Tr. Petkova, T. Lakova, B. Popov, H. Gorov

STARANTAJ: K. Čačanov, Kr. Karucin, G. Katanov, At. Gaev, S. Savov, A. Spasov, V. Bozarov, V. Markov, N. Nanov, G. Kerezov, Hr. Kanev, Kr. Sofroniev

lojn pri la vivo kaj batalo de la bulgara junularo kaj sendis ilin al miaj sovetaj korespondantoj por aperigo en „Komsomolskaja Pravda“ k. a.

Mia agado tamen estis atente observata de la faŝistaj regantoj en la urbo, kaj ili ofte vokis kaj pride-mandis min. Kial mi promenas kun konataj al ili komunistoj, kial mi ricevas leterojn el fremdlando kaj precipe el USSR, kion oni skribas al mi ktp.

Ce la komenco mi sukcesis senkulpigi kaj konvinki ilin, ke la leteroj ne estas danĝeraj. Sed ne post longe ili komencis timigi min per la monstra Leĝo por Defendo de la Stato. Mi skribis al miaj sovetaj-amikoj pri tiuj minacoj. Tiam ili komencis sendi siajn leterojn al Germanio, kaj germanaj kamaradoj resendis ilin al mi. Nia ĝojo estis grandega, kiam ni denove komencis ricevi sovetajn leterojn, jam en germanaj kovertoj. Provizore ankaŭ la policianoj trankviligis.

En nia urbo estis granda malliberejo, kie suferis centoj da politikaj malliberuloj-komunistoj el la tuta lando. Inter tiuj junaj homoj, kiuj dediĉis sian vivon kaj junecon al la liberiga batalo de nia popolo, estis ankaŭ dekoj da e-istoj. Mi kaj miaj geamikoj ofte vizitis ilin en la malliberejo. Junaj, inteligentaj, kleraj homoj. Malgraŭ la malbonaj kondiĉoj tie ili ne malesperigis, sed daŭrigis sian memklerigon. La komunistoj el la urbo, junaj kaj maljunaj, vizitis kaj helpis ilin. Ni trovis manieron kaj regule sendis al la malliberuloj marksismajn librojn kaj ĵurnalojn — „Mejdunarode Ezienk“, „Pogled“, „Rabsekor“ k. a.

Dum la somero de 1932 la kamaradoj min invitis al Sofio partopreni la duan konferencon de BuLEA. Kaj jen mi estis en la ĉefurbo, meze de delonge nur letere konataj k-joj — Nikolĉo, Simo, Pelin*, Asen Grigorov, Trajanka Petkova kaj Angelo Petkov, Nikola Sopov k. a. Rapide pasis la tagoj de la renkontigo kaj ni, junaj kaj esperplenaj, disigis promesante unu al alia daŭrigi nian laboron en BuLEA ankoraŭ pli vigle, ankoraŭ pli obstine.

La lukto daŭris pli kaj pli kruele. Ĉiutage oni arestis kaj malliberigis aktivajn partiajn agantojn. Iun tagon la policianoj serĉis ankaŭ min. Nur la sindoneco de miaj kamaradoj savis min. Do plu mi ne povis logi en mia bela naskiĝurbo kaj forveturis al Sofio. Kun la sofiaj kamaradoj mi daŭrigis mian partian kaj Esperantan laboron.

La germanaj e-istoj ĉesis skribi. Iliaj lastaj leteroj estis tre malesperigaj. El Germanio levigis la monstro de la Dua Mondmilito. Tie antaŭ la tribunalo en Lajpeig, katenita, la kuraĝa bulgara filo Georgi Ĥimitrov defendis la honoron de la bulgara Komunista Partio, de la bulgara laborpopolo, kaj alvokis la popolojn de la tuta mondo unuigi la progresemajn lertojn por kontraŭstari la brunan tiranecon kaj la teruran mondmiliton, kiun preparadis la germanaj faŝistoj ĉekape kun Hitler.

Nikolĉo (Nikola Aleksiev), Simo (Simeon Petrov), Pelin (la verkisto Pelin Velkov).

70 JAROJN EKDE LA NASKIĜO DE ĤRISTO KOZLEV

Tiel nomis sin mem Ĥristo Kozlev. Lia biografio similas al la biografio de ĉiu laboristo en nia lando.

Ĥristo naskiĝis en julio 1910 en v. Dolna Orjahovica, distrikto Tarnovo. Fininte mezgradan lernejon li tuj komencis perladorin sian ĉiutagan panon kiel hespanto de tajloro. Post kelka tempo li mem fariĝis tajloro kaj laboris en diversaj urboj, ankaŭ en Sofio. En la ĉefurbo li amikiĝis kun progresmaj studentoj, inter kiuj estis ankaŭ e-istoj. En 1930 j. li aliĝis al la ĵus fondita Bulgara Laborista E-asocio — BuLEA.

Dum la tria jardeko en nia lando furiozis faŝista teroro. Pleje suferis la klasbatala laborista movado. La marksismaj verkoj estis malpermesitaj. Oni konsideris ege danĝera por la reĝimo ĉiun verkon de Marks, Engels kaj Lenin, de Blagoev, Dimitrov kaj Kolarov. Sed la E-librojoni oni simple esceptis pro la fakto, ke en la polico neniu komprenis E-on. Tio ebligis al Kozlev ricevi kaj legi fremdlandajn kaj marksismajn librojn, belliteraturon el USSR. Dank' al E-o li konatiĝis kun la poemoj de Majakovskij, Izgur, Miĥalski kaj aliaj revoluciaj poetoj.

La literaturaj provoj de Kozlev estis sukcesaj, tamen la poeto devis cedi al la revoluciaganto. Li revenis al sia naskiĝloko, kie oni lin elektis sekretario de la distrikta komitato de Junlaborista Unuiĝo (RMS). Samtempe li entuziasme laboris por BuLEA, disvastiĝis ties eldonaĵojn kaj precipe la gazeton „Internacia Laborist-Komparana Korespondanto“. Oni tamen atentis la policon, ke tiu ĉi gazeto estas komunista kaj ĝi arestis ĝian disvastiganton. Pri tio Kozlev poste skribis en „Internacia Laborist-Komparana Korespondanto“ (6. XI. 1933):

„Survoje al urbo Gorna Orjahovica oni arestis min kaj irigis min en la policejon. Tie oni insultis kaj pugnobatis min. Mi ne protestis, ĉar la poliestroj estis similaj al la ordinara policanoj. Mi alvokas la laboristojn aboni kaj disvastigi la proletajn gazetojn, ĉar ili defendas la interesojn de la laboramasoj.

H. P. Kozlev, proleta esperantisto.“ Pro sia sindona kaj kuraga revolucia agado Kozlev turnis al si la atenton de la gvidantoj de la Laborista Partio. Oni akceptis lin kiel membron. En 1934—1935 j. li estis kooptita al la Distrikta



Komitato de la Laborista Partio.

Post kiam en 1934 j. la oficira hundo per puĉo kaptis la reĝotencon, la faŝista teroro plifortigis. Tamen Kozlev ne senkuragiĝis, li daŭre laboris sur sia posteno. Oni arestis kaj kondamnis lin en 1936 al multjara restado en malliberejo.

En la Centra prizono por politikaj malliberuloj mi havis la eblecon konatiĝi kun Kozlev. Ni aktive prijuĝadis niajn verkojn en la literatura rondo. Mi devas aldoni, ke en la prizono Kozlev ne sidis kun krucigitaj manoj. Li partoprenis en la politikaj studrondoj kaj verkadis en du lingvoj — bulgara kaj E-o. En la manskribita revuo de la politikaj malliberuloj ofte aperis liaj poeziaĵoj. Li kaj Ĥristo Karpacov estis inter la plej esperdonaj poetoj en la prizono dum 1936—1937 j. Ni, deko da e-istoj, intencis eldoni esperantlingvan revuon, sed okazis grava evento en la regno kaj oni amnestiis ĉiujn kondamnitajn, kiuj havis malpli ol tri jarojn da malliberigo.

Kozlev denove spiris libere, ĝis eksplodis la Dua Mondmilito. La monstra frenezulo Hitler konkeris preskaŭ tutan Eŭropon kaj deklaris sin baldaŭa konkeranto de Sovetunio.

La bulgara faŝista registaro disponigis nian landon kiel bazon kaj provizejon de la germanaj kirastrupoj sur la Balkanoj. Sed la popolo forte indignis. Ĝiaj fidelaj iloj kaptis armilojn kaj fondis par-

tizajn taĉmentojn. Sub la komando de Kozlev formiĝis partizana taĉmento de Pavlikeni. Ĝi agis memstare aŭ kunlabore kun la taĉmentoj en la distriktoj Tarnovo kaj Gabrovo. Embuskoj kaj surprizatakoj kaŭzis al la faŝistaj regantoj gravajn perdojn.

Kiam la vetero malebligis bataloperaciojn, Kozlev sidis en la terkabano kaj verkis poeziaĵojn. La partizanoj parkeris ilin kaj deklamis dum ripozhoroj. Jen kion rememoras la partizano Milka:

„Ĉiuj partizanoj ŝatis kaj estimis lin kiel pro liaj verkoj, tiel pro lia kamaradeca konduto. Kiam iu el ni komencis dubi je la fina venko, li trovis trafajn vortojn por konvinki lin, ke la fina venko estas proksima dank' al la potenca Ruĝa Armeo, kiu frakasas unu post la alia la faŝistajn armeojn kaj antaŭenmarŝas al okcidento kaj la Balkanoj. Tiam, substreksis li, niaj partizanoj taĉmentoj alvokas la popolon al ribelo por liberigo de Bulgario el sub la faŝista jugo.“

La jaro 1944 komenciĝis per la impona venko de la Ruĝa Armeo apud Leningrado. La germana-faŝista blokado estis rompita. Kozlev kun grupeto da partizanoj eniris iun vilaĝon por agiti kaj prepari la vilaĝajn komunistojn por la antaŭstaranta kontraŭ-faŝista ribelo. En la domo, kie kaŝe loĝis la partizanoj, iu el ili purigis sian armilon, sen malŝarĝi ĝin. Subita pafado... kaj kuglo traboris ambaŭ krurojn de Kozlev, la ŝatata taĉmentestro.

Milka rememoras: „Li ne blasfemis, ne koleris al la pafinta kamarado, kontraŭe — penis trankviligi lin. Kozlev timis ne pri si, sed pri ni, ĉar se malbona homo estus aŭdinta la pafon, kio okazos al ni? Li insistis, ke eble plej rapide ni forlasu la domon kaj serĉu azilon aliloke. Kaj adiaŭis nin kun la firma kredo, ke la vundoj estas kuraceblaj. Tuj kiam li resaniĝis, li trovis sian taĉmenton en la terkabano meze de la arbaro apud vilaĝo Strajica...“

Kozlev ne plenumis sian promeson, ĉar la kuglo venenis lian sangon. Li forpasis ĝuste kiam li estis tiom necesa por la antaŭstaranta popola kontraŭfaŝista ribelo.

Restis nur liaj versaĵoj, dissemiĝintaj en diversaj gazetoj. Restis lia famo de fidela kaj brava popola filo. Kaj la eterna danko kaj amo de la libera bulgara popolo.

HRIMA

RENKONTIGO DE LA BLINDAJ ESPERANTISTOJ

enkadre de la 40a jubilea kongreso de BEA

La 13an de julio posttagmeze en la kulturdomo de la blindula entrepreno en Plovdiv okazis renkontigo de la blindaj e-istoj. Ceestis ĉirkaŭ 100 homoj. La kunvenon malfermis Todor Ŝoŝev. Li substrekis la gravan rolon de E-o por la blinduloj: antaŭ pli ol 60 jaroj dank' al E-o oni komencis korespondi kun eksterlandaj blinduloj kaj sciiginte pri ilia vivo, agado kaj spertoj sukcesis krei societon de la bulgaraj blinduloj. Ankaŭ nun por la blinduloj E-o estas bona kontaktilo kun eksterlando. Pro tio la Asocio de la Blinduloj en nia lando ĉiam havis pozitivan rilaton al ĝi. Presigante en brajlo vortarojn, lernolibrojn kaj aliajn helpilojn ĝi faciligas ĝian lernadon. Ĉi-jare oni komencis surbendigi la altkvalitan, enhavriĉan revuon „Bulgara Esperantisto“, tiel la blindaj e-istoj jam povas ĝui ĝin.

Tanja Mileva, prezidantino de „Balkana stelo“ — la societo de la blindaj e-istoj en Sofio, rakontis pri ĝia agado: oni zorgis precipe pri la eldonado de diversaj brajlaj E-helpiloj kaj pri ricevado da brajlaj revuoj el eksterlando.

Granda honoro por la kunveno estis la sincera kaj flama salutparolado de k-do Kunĉo Vălev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“. Li parolis pri la grava rolo de la E-movado en nia lando, pri la signifo de E-o por la blinduloj. K-do Vălev estas bona blindulamiko.

Vladimir Jelev, prezidanto de „Lumo“ — societo de la blindaj e-istoj en Plovdiv, rakontis pri la regula organizado de E-kursoj kaj kunvenoj. Nun en Plovdiv estas konsiderinda nombro de blindaj e-istoj. Evidentiĝis la serioza kaj fruktodona laboro de „Lumo“. Fine oni akceptis rezolucion, kiu celas pliaktivigon de la E-movado inter la blinduloj.

Estis senditaj du telegramoj — al la prezidanto de la Asocio de Blinduloj kaj al la prezidanto de BEA.

Todor ŜOŠEV

AKTIVECO ANTAŬ LA 40A

Dediĉe al la 40a Jubilea Kongreso de BEA la E-societoj kaj distriktoj estraroj disvolvis riĉan agadon.

En la ĉefurbo okazis brila koncerto de la konataj kaj amataj gekantistoj Maria Angelova kaj Dimitro Denĉev. Antaŭ multnombra publiko ili plenumis en E-o kantojn de diversaj popoloj, verkojn de Bize, Verdi, Musorgskij, Belini, Subert, Mocart, Dobri Hristov k. a. Krom la soloj ili en ambau partoj de la koncerto plenumis ankaŭ po unu dueto. Piane akompanis s-anino Katja Hristova.

La entuziasma publiko rekompencis la altnivelan arton de Angelova kaj Denĉev per longedaŭraj kaj tondraj aplaŭdoj.

K.K.

Fine de majo 22 sofiaj e-istoj entuziasme laboris en la E-tendarlernejo apud Druŝevo por pretigi ĝin por la unua grupo de lernantoj, kiuj devis komenci tie la lernadon de E-o la 2an de junio. Oni farbis la pordojn kaj fenestrojn, purigis la fenestrovitrojn, lavis la plankojn, faris kanalon por pluvakvo, purigis la korton ktp.

Aparte entuziasme laboris Radka Nikovska, Zora Oŝanska, Elena Kuzeva, Boris Hikov, Cvetan Radovanov, Dobri Hristov, Cvetan Maksimov k. a. Virginija Vasileva kun helpantoj lerte laboris en la kuirujo kaj oni ĉiam havis bongustajn manĝaĵojn.

Bonege laborinte du tagojn la brigadanoj preparis ĉion por la infanoj kaj revenis hejmen ĝojaj kaj kontentaj pro la plenumita E-devo.

Minko KONKOVSKI



La 7an de junio en Sofio okazis solena celebrazo de glora datreveno — la 50-jariĝo de la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). Por tiu celo venis el la tuta lando multaj veteranoj, aktivuloj de tiu revolucia E-organizaĵo.

La kunvenon malfermis kaj gvidis ing. Petro Todorov — vicprezidanto de BEA.

Bonegan raporton lige kun la glora datreveno preparis k-do Nikola Aleksiev — unu el la fondintoj kaj plej elstaraj agantoj de LEA. Pro malsanigo tamen li ne povis ĉeesti kaj la raporton legis k-do Kunĉo Vălev.

En la nomo de CE ing. Todorov dekoris la bruston de la veteranoj de LEA per la honora signo de BEA.

Estis plenumita bona belarta programo. Post ĝi — muziko, dancoj, amika kunesto.

Sur la foto: P. Todorov dekoras la konatan veteranon Meleŝko Ŝiŝkov

EFEKTA E-MANIFESTACIO EN SVIŠTOV

Paco, amikeco, solidareco! Per Esperanto al mondo! Paco! Per tiaj sloganoj, per E-kantoj kaj per skandoj pri glorigo de la Bulgara Komunista Partio la junaj e-istoj de la famekonata ekonomia mezlernejo „D. Hagiŝasilev“ en u. Sviŝtov partoprenis la manifestacion je la 24 de majo — tiu grandega festotago de la bulgara kaj slava klerigo kaj kulturo. Sub la gvidado de sia instruistino Ljudmila Aleksieva ili gajnis du duajn premiojn en la Nacia Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Loveĉ ĉi-jare.

Meze de la oficialaj personaj sur la tribuno estis ankaŭ Rikardo Toriente — kuba verkisto, kiu gajnis la unuan premion en la internacia konkurso „Aleko“. Li estas arda e-isto kaj per E-o vizitis 30 landojn. K-do Toriente estis agreble surprizita pro tia efekta E-manifestacio kaj sincere salutis siajn junajn samideanojn.

La kuba gasto petis la gvidantaron de la urbo organizi por li renkontigon de la urba E-Societo „Danuba Stelo“. La renkontigo okazis posttagmeze. K-do Toriente kaj la prezidanto Toŝev konversaciis kaj interŝanĝis adresojn. Antaŭ la gvidantaro de la urbo ili substrekis la rapidan disvolvigon kaj grandan signifon kaj rolon de la internacia lingvo E-o, rakontis pri la nobla laboro kaj batalo de la e-istoj por paco kaj amikeco inter la popoloj.

(vidu la foton sur paĝo II)
D-ro Bl. Toŝev

La 16an de majo en la salono de la domo de Bulgara-Soveta Amikeco en Plovdiv okazis portreta vespero pri k-do Ĥristo Gorov. Ĝi estis organizita de la Komunuma Klubo de la Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, de la DE de BEA kaj E-Societo „Kulturo“ en Plovdiv.

Portreton de k-do Gorov kiel soci-aganto, verkisto kaj e-isto faris k-do Kunčo Vălev, sekretario de BEA. K-do Gorov ricevis sincerajn salutojn de la lokaj soci-kulturaj agantoj.

La vespero finiĝis per belarta programo precipe el la verkaro de Gorov, plenumita de artistoj kaj amatoroj.

CELEBROJ DE NEVENA NEDELĈEVA

Nia konata E-verkistino Nevena Nedelĉeva estis estime kaj danke celebrata de la sofiaj e-istoj.

En kunveno de la Instruista E-societo „Diĉo Petrov“, kies membro estas k-dino Nedelĉeva, pri ŝia verkaro parolis prof. d-ro Stojan Guĝev — vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li substrekiis la altan etikan valoron de la prozo de Nedelĉeva, kiu ĉiam edukas en spirito de anima pureco, bonfarmo, nobla humanismo kaj pacamo. Pro ŝia E-verkaro Nedelĉeva multfoje estas premiita en literaturaj konkursoj en nia lando kaj en eksterlando. Ŝiaj rakontoj aperas ofte en la E-gazetaro kaj estas ŝatata legajo por ĉiuj.

Duonhoran recitalon el la verkaro de Nedelĉeva faris la ŝatata artistino Vera Vajarova. Ŝi vere surprizis la publikon per la parkerado kaj altnivela plenumo de tiom da prozaj verkoj. En ŝia recitado la verkoj de Nedelĉeva sonis kiel vera poezio.

Celebron de k-dino Nedelĉeva organizis ankaŭ la urba E-societo „Maksim Gorkij“. Pri la literaturaj distingoj de la konata verkistino kaj arda e-istino parolis k-dino Belka Beleva, la prezidantino. Ŝi ankaŭ traigis ŝian verkon. Recitis kelkajn pecojn ankaŭ k-dino V. Vajarova.

K. V.

ĈE AMIKOJ

Komence de junio grupo da e-istoj el u. Pavel Banja gastis en Pollando. Ĉe oni renkontis nin amike, frate. Aparte neforgesebla restas nia vizito en u. Bielsko-Biala. En la tiea E-klubejo okazis sincera renkontigo esperantista. Al la ĉeestantaj samideanoj nia grupo estis prezentita de s-anino Hianette Sidorak, aktivulino de pola E-movado. S-anino Fila Byowska parolis pri la rolo de E-o en la batalo por paco kaj internacia solidareco. El la bulgara grupo respondis Ĥristo Rastev. La renkontigo pasis en tre bona amika atmosfero.

Poste la dommastroj montris al ni la vidindaĵojn de la urbo, kondukis nin en la urba ĝardeno „Zamenhof“.

La vesperon ni gastis ĉe la ĉarma familio de Barbara kaj Stanislav Poĥanek, en kiu oficiala lingvo estas E-o. La gepatroj kaj la tri infanoj bonege parolas la lingvon kaj uzas ĝin en ĉiu momento.

Dum la sekvaj tri tagoj niaj polaj geamikoj kondukis nin al la antikva Krakovo kaj la hitlerista koncentrejo de la morto en Oŝvienim.

Dankon, karaj polaj gefratoj! La tagoj ĉe vi restos por ĉiam en nia memoro. Ni atendas vin kiel gastojn en nia suna patrolando!

Ĥ. R.

Samokov — bela urbo apud la impeta rivero Iskâr, urbo, kies gloro pasas tra la legendoj de la feroproduktaj fornoj. Ĝi estas unu el la luliloj de la bulgara nacia renesanco, naskiĝloko de famaj pentristoj kaj gravuristoj, urbo, en kiu la filoj de la renesanculoj por la unua fojo sur la Balkanoj levis la ruĝan flagon super la komunuman domon. En junio ĉi-jare Samokov por la sepa fojo gastigis la partoprenantojn de la tradicia regiona E-renkontigo.

La renkontigon organizis la Sofia Distrikta-Urba Estraro de BEA kunlabore kun la Bulgara MEM-Komitato, societo „Rila Esperantisto“ en Samokov kaj la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto. Partoprenis 135 e-istoj el Sofio, Samokov, Kjustendil, Momina Klisura, Botevgrad, Varna, Svoge, Ihtiman, Septemvri, Srednogie.

La renkontigo estis dediĉita al la 1300a jariĝo de la fondo de la bulgara ŝtato, la 70a datreveno de la unua komunista komunumo de Samokov kaj la 40a Jubilea Kongreso de BEA.

Sabate vespere je la 14a de junio en la Kulturdomo de Sindikatoj okazis publika kunveno, kiun ĉeestis pli ol 200 personoj. Ĝin gvidis la prezidanto de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto en Samokov k-do Georgi Ĉekurov, kiu salutis la ĉeestantojn kaj rakontis koncize pri la glora pasinteco de Samokov, pri ties grandegaj atingoj en la konstruado de socialismo.

Ĉefa oratoro estis k-do Dimitro Ĥaĝiev — prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato. Li parolis pri la signifo de la fondo de la bulgara ŝtato, pri la kondiĉoj kiuj preparis la venkon de la Samokova Komunumo rezulte de la balotoj je la 13a de junio 1910, pri la programo de la Komunumo kaj ĝia efektivigo, kaj pri la sukcesoj de la bulgara E-movado.

Ĥoro de turistoj-veteranoj, junpionira Ĥoro kaj lernantoj de Samokov, artistoj kaj amatoroj de Sofio plenumis riĉan artprogramon.

La saman vesperon la gastoj per aŭtobusoj veturis al la ripozloko de la laboristoj de energetiko en vilaĝo Mala Ĉarkva, situanta en la piedoj de Rila Montaro. Tie ili vespermanĝis kaj tranoktis. Oni amuziĝis, kantis, dancis. La turista Ĥoro denove plenumis kelkajn kantojn. D. Ĥaĝiev parolis, kiamaniere la bulgaraj e-istoj laboras kaj batalas por paco, amikeco kaj komprenigo inter la popoloj.

La sekvan tagon oni vizitis la pitoreskan lokon Maljovica en Rila-montaro kaj ĝuis la ĉarman naturon.

Estis lanĉita la ideo, ke la venontjara renkontigo okazu kun partopreno de e-istoj el la najbaraj landoj.

TEMPESTO

En la piedoj de Maljovica





Tre bone sukcesis E-kurso en Blagoevgrad sub la gvido de Dobrinka Anani:va (staranta plej maldekstre)

En la kongreso de la Asocio de E-istoj de Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR), okazinta fine de junio, k-do Anton Antonov el u. Kubrat, vaste konata E-aktivulo, estis honorita per la ora insigno de tiu asocio.

K-do Antonov faris multon por propagando de la slovaka kulturo, ĉiufankaj atingoj kaj natura beleco de la frata respubliko. Dum la lastaj jaroj pli ol 100 slovaka e-istoj vizitis nian landon kaj urbon Kubrat kaj ĉ. 150 kubratanoj lernis E-on en la someraj kursoj de AESSR. La ĉefa merito pri tiu aktiveco sendube apartenas al nia sindona E-aganto kaj pabatalanto Anton Antonov. Lia E-laboro en eksterlando, kiel same en Bulgario, estas ekzemplo kaj modelo!

Gratulon sinceran al vi, k-do Antonov!

LA REDAKCIO

Mi ricevas ĉiujn E-revuojn aperantajn en Hungario. Ili estas bone redaktataj kaj enhavas interesajn kaj legindajn materialojn ne nur por hungaraj e-istoj, sed ankaŭ por eksterlandanoj. Fortan impreson faris al mi la abunda reklama materialo en ili. Tio estas tre bona. Unue: ĉar en la reklamoj la leganto ofte trovas terminojn kaj esperimonojn, kiuj ne estas troveblaj en ordinara artikolo. Due, pro tio, ke per tiuj reklamoj la Movado estas finance kaj morale subtenata de neesperantistaj entreprenoj, institucioj kaj organizoj.

Antaŭ nelonge mi estis en Budapeŝto kun grupo de samlandanoj turistoj kaj e-istoj. Vizitante la plej grandan kaj modernan ĉiusecan varmagazenon „Skala“ mi vidis poŝtkeston, per kiu la klientoj povas diri skribe sian opinion pri la priservado kaj fari proponojn. Mi tuj konjektis, ke mi povas fari ion por pravi al la administracio, ke la reklamoj pri la magazeno en la E-revuoj estas utilaj kaj necesaj. Sur papero mi skribis jenan tekston, kiun mi metis en la keston: „Mi venigis al via magazeno grupon de bulgarioj, ekskursantoj al via ĉefurbo. En via magazeno ili trovis preskaŭ ĉion, kion ili deziris aĉeti. Por veni al vi instigis nin viaj reklamoj en la E-periodaĵoj „Hungara vivo“ kaj „Budapeŝta informilo“.

Por la grupo: Nikola Nikolov, P. K. 45, BG-1090 Sofio, Bulgario.“

Mi proponas al ĉiuj e-istoj, kiuj vizitos Budapeŝton, fari la smon, ĉar la reklamoj de magazeno „Skala“ daŭre aperadas en la menciitaj E-periodaĵoj.

N. N.

Forpasis en Plovdiv komence de junio la plej maljuna e-istino, veterano de la E-movado en la urbo,

Todorka Malčeva

edzino de la fama e-isto Dimitro Malčev. Saga, modesta, bonkora, ŝi instruis al la infanoj sciencan, virtujan, amon. La e-istaro de Plovdiv ege ŝatis kaj amis ŝin kiel patrinon. En ĉiuj koroj por ĉiam restos kara rememoro pri ŝi.

ĈIUJ ĈEESTANTOJ PAROLAS EN ESPERANTO

Ordinare dum la semajnaj kunvenoj de la E-societoj unuopuloj parolas, raportas, prelegas, kaj la plimulto de la ĉeestantoj restas pasivaj. Ili nur aŭskultas, rigardas kaj aplaudas. Estas sentebla eĉ ioma rigideco, ĉu pro ĝeno, ĉu pro manko de ebleco paroli.

En nia lando estas gvidataj kursoj por komencantoj. Iuj vizitas ilin kelkfoje, sed restas eternaj komencantoj. Malofte estas gvidataj kursoj por progresintoj, kaj en ili oni ofte instruas prefere teorion, mankas la parolpraktiko. Por multaj la libera parolado en E-o estas malfacile atingebla, iufoje ĝi restas revo.

Antaŭ la 63a UK de E-o (1978), en Sofio estis gvidataj tri parolantaj rondoj.

En la printempo de 1980 en Sofio komencis funkcii parolanta rondo ĉe leĝejo (Citaliste) „Anton Strašimirov“ (proksime al Agla Ponto). Iniciatinto kaj organizanto estis la malnova e-isto Stefan Gančev, gvidantoj — II, S. Hesapčiev, D. Borisov. En la rondo regas amika etoso. Ĉiu el la ĉeestantoj senĝene sin turnas al kiu ajn kaj alparolas lin ne timante eblajn erarojn.

Kiel en la kursoj, tiel ankaŭ en la rondo, la nivelo de la rondanoj estas diversa, sed ĉiuj partoprenas aktive. Ili preparas sin hejme kaj rakontas diversajn okazaĵojn, anekdotojn, deklamas versojn. Komprenble, oni ofte deflankiĝas de la preparita hejme materialo, ĉar la interparolo ne estas interŝanĝo de parkere lernitaj monologoj.

Jen estas interparoloj pri ĉiutagaj temoj. La rondanoj respondas al demandoj: kie vi loĝas (strato, numero, bloko)? Kiaj magazenoj estas proksime? Kie vi aĉetas panon, lakton, aliajn nutroproduktojn? Kiom kostas kilogramo da pano, duonkilogramo? Kiom kostas litro

da lakto? Ĉu ekzistas diversaj kvalitoj de lakto? Ĉu iliaj prezoj estas diversaj? k. t. p.

Aliffoje la ĉeestantoj respondas al demandoj el la esperantista vivo kaj movado: kiam vi komencis lerni E-on? En kiu urbo aŭ vilaĝo? Ĉu en kurso aŭ aŭtodidakte? Se en kurso, kiu organizis ĝin? Kiu estis via kursgvidanto (instruisto)? Kiom da kursanoj komencis, kiom finis? Kion ofte vi havis lecionojn? Laŭ kiu lernolibro vi lernis? Ĉu vi estas abonanto de „Bulgara Esperantisto“, de aliaj E-periodaĵoj? Ĉu vi partoprenis en kurso por progresintoj? Ĉu vi partoprenas en la semajnaj kunvenoj de via E-societo? Ĉu vi partoprenis en diversaj E-aranĝoj en nia lando aŭ eksterlande? En kiu? Kiam?

Oni komprenas, ke al iuj demandoj (pri la prezoj de la produktoj ekzemple) ĉiuj ĉeestantoj donos saman respondon, sed al multaj aliaj ĉiu donos konkretan individuan respondon.

Ni aŭdis tre interesajn rakontojn pri travivaĵoj de e-istoj antaŭ pli ol duona jarcento.

La parolanta rondo komencis funkcii kun kelkaj personoj kaj estas vizitata ordinare de 10–12–14 homoj kun tendenco pligrandiĝi, ĉar ĉiuj sentas, ke ili progresas.

Ni invitas la gesamideanojn partopreni (vendrede, je 18.30 horo) por progresi en la praktika uzado de la Internacia Lingvo.

Ni ankaŭ rekomendas, ke oni organizu parolantajn rondojn en aliaj lokoj. Kaj en Sofio kun miliona loĝantaro certe nur unu tia rondo estas guto en maro.

Nikola JANEV

KION MONTRAS LA LITERATURA KONKURSO DE „BE“

Ĝojiga fakto estas, ke en la literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“, dediĉita al la 40a Jubilea Kongreso de BEA, partoprenis konsiderinda nombro de e-istoj:

1. Originala poezio — 22 personoj per 48 verkoj.
2. Originala prozo — 16 personoj per 27 verkoj.
3. Tradukita poezio — 12 personoj per 31 verkoj.
4. Muzikverkoj — 5 personoj per 9 pecoj (originala aŭ tradukita tekstoj).

Aŭ entute en la literatura konkurso partoprenis 55 samideanoj per 115 verkoj, inter kiuj 38 viroj kaj 17 virinoj.

Do, la tuta nombro de partoprenantoj ne estas malgranda, kio parolas pri laŭdinda aktiveco de la e-istoj.

Ĝojiga estas ankaŭ la fakto, ke la konkurso trovis sufiĉe vastan internacian reĉon. En ĝi partoprenis samideanoj el 8 landoj (Bulgario 36, Sovetunio 7, Rumanio 6, Nederlando 2, Hispanio, Francio, GDR, Portugalio po 1).

Ĝojigas same tio, ke oni sendis ankaŭ muzikajn verkojn. La bezono pri konvenaj kantoj ĉe la e-istoj estas granda kiel por artaj programoj de celebros, amuzvesperoj k. a., tiel ankaŭ por tute ordinara ekskurso aŭ amika kunesto de e-istoj.

Ni tamen tute ne rajtas prisilenti la fakton, ke la alta nivelo de granda parto el la senditaj verkoj ne estas kontentiga. Tio igis la ĵurion ne doni unuan premion por poezio, ne doni ĉu unu premion por kantoj. Prisilenti tiun fakton estus utila por neniu. Ni petas la partoprenantojn ne ofendiĝi pro nia pritakso, sed okupiĝi pli serioze pri sia plua perfektigo, por kreski kiel bonaj kreantoj, ĉar nia Movado bezonas kaj poetojn, kaj verkistojn, kaj komponistojn.

Por verki bone en E-o estas necese unufoje ekregi bone la lingvon por povi facile trovi konvenan vorton por necesa rimo, ritmo ktp. Paralele kun tio oni devas ekposedi la teknikon de la versifado, do la teknikon de la poezia arto. Ĉion ĉi oni povas atingi per multa, serioza kaj obstina laborado, per nevelkanta amo al la poezio, per forta krea ambicio. Estas necese multe kaj atente legi bonan E-poezion, kiun lasis al ni L. Zamenhof, A. Grabovski, J. Bagi, K. Kaloĉaj, N. Nekrasov, E. Mihalskij k. a., la bulgaraj tradukistoj Ivan Dobrev, Atanas Lakov, Stefan Kiragiev, kiun donas al ni ankaŭ nun Marjori (Marjorie) Boulton, Asen Grigorov, Simeon M. Simeonov, Dimitro Zlatarski k. a. Ni ripetis: multe kaj atente legi, ankaŭ lerni parkere bonajn pecojn.

Impresas la fakto, ke ĉe la tradukaĵoj, senditaj al la konkurso, oni ne havis sufiĉe altan kriterion por elekta tradukindan verkon. Kelkaj el la tradukaĵoj „teknike“ estas vere bonaj, sed laŭ enhavo ne taŭgas — iuj estas malnovaj kaj interesas nur la literaturan historion, aliaj estas malinteresaj, enuigaj, abstraktaj, nekomprenblaj, kiuj tute ne kapablas kapti kaj emocii la leganton. Kelkfoje la originalo mem ne estas sufiĉe bona — do vana laboro estas okupiĝi pri tia originalo. Kelkaj el la tradukitaj verkoj estas tre longaj.

Mankas esoj. La eseo estas efika kaj valora literatura formo kaj neniel neglektinda.

Ni deziras atentigi pri alia negativa fakto. Kelkaj el la senditaj muzikverkoj estas adaptaĵo de teksto al konata melodio, oni tamen tion ne notas, sed prezentas la melodion kiel sian propran. Premiigo kaj eventuala publikigo de tia verko povas grave kompromiti kaj la redakcion, kaj la personon, kiu ĝin sendis. Ni petas, ke estonte simila evento ne ripetigu.

Dankante al ĉiuj partoprenintoj en la konkurso, ni petas ilin partopreni ankaŭ en la nova konkurso de „BE“ kaj ĝenerale kunlabori al la revuo. Ni sincere deziras al ĉiuj sanon, feliĉon kaj novajn kreaĵojn sukcesojn!

LA REDAKCIO

NOVA LITERATURA KONKURSO DE „BE“

Dediĉe al la XII kongreso de la Bulgara Komunista Partio (30 de marto 1981) kaj la 1300a datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas novan grandan literaturan konkurson. La konkurso povas partopreni kaj bulgaroj, kaj eksterlandanoj.

TEMOJ: Bulgara Komunista Partio, historio de Bulgario, nuntempo kaj estonteco de Bulgario, la bataloj de la bulgara popolo por libero, nacia sendependeco kaj socia justeco, la demokratiismo, internaciismo kaj pacamo de la bulgaro, bulgararusa kaj bulgara-soveta amikeco, la batalo por paco kaj libero en la mondo, senmaskigo de la militarismo kaj ĉiuj nigraj fortoj en la internacia vivo, Esperanto en servo de la nacia kulturo kaj la socialisma patrolando, Esperanto — lingvo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

Oni povas partopreni per rakontoj, poeziaĵoj, fabeloj, kantoj (kun propra teksto kaj melodio aŭ nur per melodio por tradukita teksto), eseo, rememoro, artikolo (la artikolo — nur pri temo ligita al la E-movado kaj problemoj).

Ĉiu verko devas esti konvena por publikigo en „BE“, t. e. konforma al ĝia karaktero, ideo direkto, amplekso. Do la rakontoj ne devas esti pli ol 6—7 paĝoj (po 30 linioj), la eseoj — ĝis 3 paĝoj. Ĉiu persono povas partopreni maksimume per 3 verkoj de unu speco. Limtempo por prezento de la konkursaĵoj: 31 de decembro 1980.

La plej bonaj verkoj estos premiitaj kaj aperos en la revuo.

La konkurso estas sekreta. La konkursaĵoj, masine tajpitaj, devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermita koverto, en kiun oni anticipe metu slipon kun la vera nomo kaj la adreso de la aŭtoro. La konkursaĵojn kaj la fermitan koverton oni metu en pli grandan koverton kaj ĉion sendu al adreso: Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, bul. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario (por la konkurso).

Samideanoj el ĉiuj landoj, partoprenu amase en la literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“!

REZULTOJ de la literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“ por 1980

POEZIO ORIGINALA

I premio: ne aljuĝita.

II premio: Dimitro Dimov kaj Emil Dimov el Varno (Bg) — pro la versaĵo „Al Bulgario“.

Penka Papazova el Jambol (Bg) — pro la versaĵo „Mi estas parto de vi“.

III premio: Nadia Andrianova — Kiev (USSR) — versaĵo „Ĝis kiam nia ter' ekzistos“.

Aurel Boia — Bukureŝto (Rum.) — versaĵo „Ĝemeloj“.

POEZIO TRADUKITA

I premio: ne aljuĝita.

II premio: Nikolao Fedotov el Novoĉerkask (USSR) — pro kelkaj tradukaĵoj kaj aparte pro „La milito“ de Sergej Ostrovoj.

III premio: Rosica Georgieva — Pazarĝik (Bg) — „Mia amiko“ de Ivan Kolarov.

PROZO ORIGINALA

I premio: Arturs Kubulnieks el Aluksne (USSR) — rakonto „Benita“.

II premio: Bernard Golden — u. Veszprem (Hungario) — rakonto „La novaj antikvaĵoj de s-ro Morales“.

III premio: Nevena Nedelčeva — Sofio (Bg) — rakonto „Heroaĵo estas vivi“.

Ingwart Ullrich — Hildburghausen (GDR) — rakonto „Arbaro“.

En tiu tago mi ricevis du leterojn. La unua estis de Benita. Mi konis ŝian klaran, ankoraŭ knabinecan manskribon sur la koverto, ja mi korespondis kun ŝi jam tutan jaron. Ŝi ofte skribis al mi, kaj mi senpacience atendis ŝiajn leterojn. Zorgeme mi konservis ilin kaj mi ne troigos, se mi dirus, ke mi legis ĉi-un leteron eble centfoje. Kvankam mi ankoraŭ ne vidis Benita-n, ŝi jam eniris mian vivon per sia pensriĉeco, esperiminta en senriproĉa E-o.

Mi memoras, kiel tio komenciĝis. Mi estis fininta la E-kurson, sed mi ne aŭdacis ekkorespondi. Malgraŭ multaj adresoj de korespondemuloj en preskaŭ ĉiu E-revujo, mi longe ne reagis. Sed foje mi legis korespondancon de dekokjara medicina studentino en mia lando. Tiam mi estis dudekunujara kaj rigardis kun ne indiferentaj okuloj la dekokjarulinojn. Okule mi ĝuis la belon de iliaj korpoj dum miaj penetroseancoj kaj penis respugligi tion en miaj pentraĵoj. Sed por pentri, mi penis penetri en la internan vivon de miaj pozantinoj kaj ofte mi trovis ĝin mizera kaj malplena.

Ili precipe malŝatis lernadon. La arto ne interesis ilin. Venadis al mi nur por pozi pro la mono. Eble kelkiuj estis pretaj ankaŭ amori. Mi ne trovis inter ili seriozajn kaj saĝajn, kun kiuj mi volus konatiĝi pli intime. Estus vana penado rakonti al ili pri Esperanto. Certe tial fascinis min tiu korespondancon.

Jen estis junulino, kiu ellernis E-on por batali per ĝi por feliĉo de la homoj. Ankaŭ la profesio, kiun ŝi praktikos, servas al la homoj kaj savas ilin. Medicino kaj E-o — kia multepromesanta unuigo! Kaj kian belan antaŭnomon ŝi havas! Antaŭe la virina nomo Benita sonis al mi fremde, sed nun, kiam mi ellernis E-on, mi povis traduki ĝin kaj venis en mian kapon la penso, ke mia korespondado kun ŝi estos benita.

Mi ne eraris. La leteroj de Benita montris, ke ŝi estas serioza junulino, ke ŝia koro batas por la plej noblaj idealoj de la homaro. Mi malkovris en ŝi tiun riĉan internan mondon, kiun mi vane serĉis ĝis nun en aliaj junulinoj. Ŝia menso estis okupata de pensoj pri tio, kiel fari bonon al la homoj. Mi trovis belajn sentojn, saĝajn edifojn en ĉiu ŝia letero. Ŝi alte taksis la etikan valoron de E-o.

Benita ŝatis florojn. Mi sciis, ke ŝi kultivas rozojn en sia ĝardeneto, ke ŝi kolektas bulgarajn revuojn kun kolorfotoj pri rozoj.

„Bulgario estas la lando de la rozoj, — ŝi skribis. — La bulgara popolo amas la florojn. Ne estas bulgara popolokanto, en kiu oni ne parolas pri floroj. Sed ami florojn kapablas nur bonaj homoj. Kiel mi dezirus viziti iam la belan sudan landon Bulgario!“

Mi prenis la revuon „Bulgara Esperantisto“, malfermis la rubrikon „Dezirata korespondi“ kaj serĉis anoncojn el Bulgario. Tie mi trovis la adreson de Petko, junulo, kiu dediĉis sian liberan tempon al florkulturado. Sur liaj bedoj floris rozoj, gladioloj, dalioj, dianto, li flegis ilin kaj revis pri noblaj faroj por la homoj kaj la homaro.

Korespondante kun Benita kaj Petko, mi komencis rigardi la mondon pli optimisme. Tio influis ankaŭ la elekton de temoj por miaj pentraĵoj kaj la pentromanieron. Mi ekuzis pli helajn tonojn, el miaj verkoj ekspiris kredo al la vivo, al la paco, al la progreso.

Ankaŭ en tiu ĉi letero Benita ne forgesis la naturon. Ŝi invitis min partopreni en naturdefenda junulara E-tendaro.

Mia bona Benita! Kompreneble, mi partoprenos. Mi partoprenos, mi ekvidos ŝin, mi pentros ŝin kaj la naturon!

Tiam mi prenis la duan leteron. Miaj okuloj fiksiĝis al la belegaj poŝtmarkoj pri bulgaraj pentraĵoj. La bulgara filatelo elstaras per admirende belaj poŝtmarkoj, dediĉitaj al la figuraj artoj. Petko sciis, ke ili plaĉas al mi, kaj ĉi-foje afrankis per serio pri la freskoj de la preĝejo de Bojana. Sed inter ili ankaŭ io pri la nuntempa bulgara pentroarto. Nu jes, tio estis mia ŝatata Stojan Venev. La majstro prezentigis per la oleopentraĵo „Patrino kun infano“. Kia kolorharmonio! Ĉi tiun poŝtmarkon mi studos sub lupeo. Nunmomente mi volis ekscii, kion entenis la koverto, ĉar palpe mi konjektis iujn objektojn en la letero. Estis nova E-insigno, unika laŭ sia formo, belaspekta, fabrikita de la uzina E-grupo, en kiu anis Petko. Li skribis: „Vi estas la unua eksterlandano, al kiu ni sendas nian novan kvinpintan stelon aperigitan dediĉe al nia landa E-kongreso. Mi sendas al vi tri ekzemplerojn: unu por vi, la dua — por via fianĉino la tria — en rezervo. Alpinglu ilin veturonte al nia kongreso. Por tiu celo — du invitojn por vi!“

La bonkora Petko! Ravita mi rigardis la elegantajn verd-steletojn. Ilia emajlita surfaco brilis en la sunradioj, falantaj sur mian skribotablon, kaj ĵetis gajajn rebrilleporetojn sur la plafonon de mia ĉambro.

Sed kiel li skribis? Por mia fianĉino! Mi ja ne havas fianĉinon!

Subite mia koro ektemis de ĝoja antaŭsento. Ĉu Benita ne povus esti mia fianĉino? Si — la ununura junulino, al kiu mi havis simpatian, la plej ideala el ĉiuj knabinoj, kiujn mi konis!

Sed kiom mi konis ŝin? Mi eĉ ne sciis, kiel ŝi aspektas.

Denove, sed nun plej atente mi legis ŝian

leteron, en kiu ĉiu vorto, ne — eĉ ĉiu litero alrigardis min kiel miozoto en herbejo, kiel steleto de sur la ĉielo, kiel sunradieto tra mia fenestro.

Mi legis la tutan leteron. Miaj okuloj haltis ĉe la lasta frazo kaj fiksigis sur ĝin. „Tiam ni fine konatiĝos“ — ŝi aldonis, espriminte la esperon, ke ankaŭ mi partoprenos en la tendaro.

Ĉu ŝi jam aspiris pri renkontiĝo kun mi?

Mi sentis, ke ŝtono estis ĵetita en la trankvilan akvon de mia fraŭla vivo. Eble per ĉi tiuj vortoj ŝi riproĉis mian hezitemon? Certe inter ni ekfloris amo, sed ĝi prokraston ne toleras. Mi ne plu atendos, mi partoprenos en la tendaro, kie ŝi estos, kaj nia konatiĝo okazos en originala maniero, inda por e-isto.

Mi tuj respondis al ŝi: „Por ke ni povu trovi unu la alian, bonvolu pingli unu steleton al via bluzo kaj la alian al via pluvmantelo. La saman emblemon, kiun nur ni havos, vi ekvidos ankaŭ sur mia brusto.“

Pri la invito el Bulgario mi diros al ŝi en la tendaro, por agrable surprizi ŝin.

Metante du steletojn de Petko en la leterkoverton kaj kungluante ĝin, mi konsciis mian grandan feliĉon. Kiam mi denove ekvidos ĉi tiujn insignojn, ilin portos la junulino, kies nomo estas Benita. Benita, Benita! Kiel fascinis min ĉi tiu bela nomo! Ĝi tiel forte absorbis mian menson kaj ravis mian imagon, ke mi dolĉe flustris, ripetante: Benita, Benita, Benita. . .

*

Du semajnojn kun senpacienco mi atendis la tagon, kiam mi povos veturi al la tendaro. Nun tiu momento jam venis.

La malfermo okazos morgaŭ sur duoninsulo ĉe pitoreska lago, sed mi alveturis jam hodiaŭ, por kune kun iuj aktivuloj fari la necesajn preparojn. Ni disponas pri pluraj ejoj en la loka lernejo. Tie ni jam aranĝis la akceptejon. Antaŭ la konstruaĵo la preterirantojn ravas bedo de mirinde belaj rozoj. Apude fiksitaj tabuletoj atestas, ke la novan specion de rozoj evoluigis la junaj selektantoj de la lernejo. Kiam alveturos Benita, mi montras al ŝi ĉi tiun belon de la vivaj kolornuancoj kaj formoj.

En mia dorsosako estas akvarelfarboj, papero, penikoj por skizi pejzaĝojn. Hodiaŭ la vetero kvazaŭ speciale plibeligas la kamparan naturon en la ĉirkaŭaĵo, por ke mi povu pentri. Sur la ĉielo flosas apartaj pluvnubetoj. Unu de ili ĵus transpasis super ni. El malantaŭ ĝia rando denove ekbrilis la suno kaj super la lago aperas ĉielarko. De ĉi tie, de sur la altaĵo, estas bone videbla la lago kun la duoninsulo, sur kiu ni tendumos. Ravite mi observas la irizan duoncirklegon, kiu arkas super la tuta lago. Sed nun mi ne povas penri, ĉar ni rapidas surkamionigi la tendojn, luitajn de la loka turista bazo.

La suno kaŝas sin malantaŭ nubo, kaj en la

sama momento estingigas la ĉielarko. Mian atenton altiras la alvenanta aŭtobuso, la lasta, per kiu oni povas hodiaŭ veturi ĉi tien. Inter la pasaĝeroj estas ankaŭ tendaranoj, sed mi atendas Benita-n nur morgaŭ matene. Tiam mi iros renkonte al la haltejo.

Aro da gejunuloj ascendas la altaĵon, svingas E-flagetojn kaj gaje krias: „Esperanto! Esperanto!“

Ni salute respondas. Ili noktos en la lernejo. Mi pasigos la nokton sur la duoninsulo, kie mi pentros la sunsubiron.

Subite denove ekpluvas. Kvazaŭ adiaŭante, la lasta pluvonporta nubeto penas malsekigi nin. Sed junularo ne timas pluvon kaj kutime kunhavas nek pluvmantelojn, nek ombrelojn. Ankaŭ la proksimiĝantaj tendaranoj nur plirapidigas siajn paŝojn kaj gaje ridas.

Inter la venantoj mi rimarkas junulinon, kiu distingigas per la klasika formo de sia korpo. Al ŝi gluigas junulo, kiu sub la preteksto ŝirmi sin de pluvo deprenas sian jakon kaj metas ĝin sur ŝiajn ŝultrojn. Evidente ili estas geamantoj. Nuntempe gejunuloj ne kaŝas sian amon kaj demonstras ĝin surstrate. Sed fremda amo ne koncernas min.

Baldaŭ sunradioj denove falas sur nin. Ili reflektigas kaj difraktigas en la pluvetojn. Kontraŭflanke de la suno videbliĝas la ĉielarko. Sed mi ne plu rigardas al ĝi, ĉar miaj okuloj estas kun admiro fiksitaj al la junulino. Kiaj harmoniaj proporcioj, kia gracio! En miaj okuloj estas liniilo kaj cirkelo, mi precize mezuras ŝin.

La pluvo ĉesas, ŝia kompano deprenas de ŝi la jakon kaj forskuas la pluvetojn. Tiam li ĵetas la jakon sur sian maldekstran ŝultron, kaj per la dekstra brako ĉirkaŭprenas ŝian elastan talion kaj premas ŝin al si.

Kompreneble, mi interesiĝas pri la beleco de la korpo de ĉi tiu fremda junulino nur kiel pentristo. Mi havas nenian erotikan senton, mi ne envidas ŝian amanton. Mia koro apartenas al Benita kaj nur al Benita.

La geamantoj estas okupataj nur de si mem, Sajnas, ke ili vidas nenian alian, ankaŭ min ne, kvankam mi streĉe rigardas al ŝi. Nun ili jam venis tiel proksime, ke mi vidas ŝiajn vizagtrajtojn kaj mi trovas en ili trivialecon. La lipoj nenature ruĝas, do ŝi farbis ilin. Ŝia vizago ne estas bela, precipe la ruĝigitaj lipoj. Nun ili pasas preter mi. Reliefigas ĉiuj videblaj detaloj de ŝia korpo.

Sed kio estas sur ŝia bluzo? Mi ne volas kredi al miaj okuloj. Tio ja estas mia insigno. Konsternita mi ĝapas al ĝi. Kun timo mi ĵetas rigardon al ŝia partnero. Ĉe la refaldo de lia jakto mi ekvidas la saman steleton. . .

En tiu momento la kamiono startas. Konvulsive mi kaptas la randon de la karoserio. Benita? Si estas Benita! Kaj la duan insignon ŝi donis al tiu ulo! Ho, kiel sufoke varma estas la aero! Mi ŝiras la kolumon de la ĉemizo. La butono forflugas ien. La kamiono ruliĝas

malsupren al la lago kaj malantaŭ ni foriĝas tiuj du kaj la ceteraj alvenintoj. . .

Kun helpo de la ŝoforo mi kaj la samideano, kun kiu mi restos en la tendarloko, levas kaj fiksis la maston por la tendara standardo. Post tio la ŝoforo forveturas, kaj ni ambaŭ starigas la tendojn. Mia kapo turniĝas, sed la laboro ne permesas multe pensi pri io alia. Nur tiam, kiam ĉio estas ordigita por la morgaŭa tago, mi komencas konscii mian situacion. Nun alvenis la libera tempo, dum kiu mi volis pentri. Ĉe la ĉielrando lante ŝvebas kelkaj nubetoj, la suno kuŝiĝas kaj ĉion ensorĉas la vespera ruĝo, sed mi ne kapablas eĉ pensi pri pentrado. Kio okazis?

Okazis io neatendita, io terura, minacanta ruinigi aŭ jam ruiniginta ĉiujn miajn revojn. Mi penas superi la afekcion, resti trankvila almenaŭ en la ĉeesto de mia kamarado, sed li rimarkas nenion. Li estas nekuracebla fiŝokisto kaj tiel enprofundiĝis en siajn pensojn pri la preparo por fiŝokado, ke ŝajne li nek vidas, nek aŭdas min. Li revis pri fiŝkaptado samkiel mi volis pentri ĉi-vespere. Tial ni jam antaŭe interkonsentis pri nia deĵorado: vespere mi pentros, kaj li ripozos, frumatene li hokos, kaj mi dormos. Poste mi iros al la aŭtobusa haltejo kaj revenos tagmeze en solena marŝo kune kun la ceteraj tendaranoj, kaj li atendos nin.

Nur pro ĝentileco mi iom longe restis kun li aŭskultante lian babiladon. Nun mi povas jam foriri. Mi vagas en la arbustaro, kaj en mia kapo svarmas kaj kirliĝas diversaj pensoj.

Mi sentas min laca kaj sidigas sur la trunkon de ventfaligita arbo. Elpoŝiginte mian albumeton por desegnoj, mi prenas el ĝi la leteron de Petko kaj rigardas la invitilojn. Al kiu mi donu nun la duan? Petko perdis por mi.

Mi demandas min, ĉu mi povas kulpigi Benita-n pri malfideleco. Ni havis nur leterkontakton, kaj ŝi promesis nenion. Sed mi?

En miaj leteroj mi skribis nur pri E-o, pri arto, pri scienco, pri etikaj principoj, sed ne pri amo. La unuan paŝon en tiu direkto faris ŝi, skribinte en la lasta letero, ke fine ni konatiĝos en la tendaro. Sed eble ŝi esprimis per tiuj vortoj ne amon, sed disrevigon pro mia hezitemo? Eble ŝiaj saĝaj leteroj kun la edifaj moralaĵoj estis nur moko pri mia filozofado? Sendube ŝi estas prudenta virino kaj ne nur sentas, sed ankaŭ komprenas, ke en nia aĝo gejunuloj devas paroli pli multe pri amo ol pri filozofio. Vane atendinta iniciaton de mi, ŝi proponis ĉi tiun renkontigon por montri al mi, ke jam venis alia, kiu scipovis trovi ŝin. Por ke mi komprenu pli klare tion, ŝi transdonis la insignon al li.

Mi povas ŝin nur pravigi, ĉar ŝi estas virino. Jes, ŝi estas virino, kiu indas adoradon.

Estas vero, ke ĉiu virino aspiras sian familion. Resti fraŭlino por la tuta vivo — tio verŝajne timigas ĉiun sane pensantan junulinon

Nuntempa virino mem aktive serĉas vivoamikon kaj patron por siaj infanoj, kaj ĉiu serĉas laŭ sia maniero. Do, prave agas tiu fremda al mi junulo, kiu scipovis trovi vojon al la koro de Benita. Sed tiu vojo estis malfermita ankaŭ por mi, nur ŝi vane atendis min veni al ŝi. Sed ĉu tiun alian ŝi akceptis definitive? Kiu povas fieri, ke li konas la koron de virino? Kial Benita invitis min al la tendaro? Se ŝi jam estus deturninta sin de mi, ŝi ja ne plu interesiĝus pri mi. Ĉu ŝiaj farbitaj lipoj ne estis alvoko: „Jen kia mi fariĝis sen vi! Venu kaj savu min!“ Mi estus malediminda malkuraĝulo, se nun mi forlasus ŝin. Estas granda eraro de mi, ke mi ne restis en la lernejo kaj ne partoprenis en la dancvespero. Sed nun mi ne povas foriri. La fiŝokisto jam dormas, kaj mi devas gardi la tendojn, dormosakojn kaj la ceterajn luitaĵojn. Estas jam tro malfrue, certe ankaŭ ili dormas nun, mi povas tranokti nur ĉi tie.

Je la tria horo matene mi vekas la kamaradon. Li tuj kuras por lavi sin kaj post tio hoki, ĉar li opinias, ke frumatene fiŝoj bone mordetos la hokon.

Mi kuŝiĝas en tendo kaj antaŭ la ekdormo en mian kapon venas la penso, ke ĉio ordiĝos favore al mi, se mi prenos la iniciaton sur min. Mi kaj Benita vizitos la sunplenan Bulgarijon, admiros la profundan ĉielon de la sudo kaj la rozojn sub ĝi. Efektivigos mia revo ekkoni la bulgaran bildarton, Mi gvidos Benita tra la muzeoj kaj montros al ŝi pentraĵojn de Stojan Venev, de Vladimir Dimitrov — la Majstro, de Ilija Petrov kaj de aliaj grandaj bulgaraj pentristoj.

Kiam mi malfermas la okulojn, estas jam la oka horo matene. La maltrankvilo denove kaptas min. Mi tuj foriras, kunpreninte la dorsosakon, kiun mi eĉ ne malfermis ĉi-nokte. Mi ne scias, kiel finiĝos ĉi tiu afero. Se Benita ne lasos tiun arlekenon, mi forveturos.

Ŝi tamen estas por mi enigmo, kiun mi volas diveni. Kial ŝi, kiu antaŭe malaprobis la vizaĝfarbadon, nun mem ŝmiris la lipojn? Filozofo povas filozofi, sed se virinoj ne ŝanĝiĝos al perfekteco, ankaŭ viroj ne pliboniĝos.

*

En la lernejo ankoraŭ regas silento. Verŝajne ĉiuj dormas post la bato. Mi metas la dorsosakon en angulon de la koridoro kaj malfermas la pordon al la salonego, kie provizore estas la akceptejo de la tendaro.

Ho, tie jam staras ili ambaŭ! Sed kia ŝi aspektas? Ŝia vizaĝo nun similas pentraĵon. Por kaŝi la postbalaŭ palecon kaj lacecon, ŝi abunde uzis ne nur lipfarbon kaj brovofarbon, sed ankaŭ ŝminkon. La trajtoj de ŝia vizaĝo nun ŝajnas al mi ne nur trivialaj, sed eĉ krudaj, tiuj de senkultura virinaĉo.

En ŝia mano mi ekvidas rozon, unu el tiuj, kiujn selektis la ĝelernantoj. Evidente tiu kavaliro ŝiris ĝin por ŝi. Lerte li faris

tion nun, kiam neniu vidis ilin. Kaj ŝi akceptis tian donacon! Tiel kondukti povas nur barbaroj! Mi ne povas kompreni, kio okazis al Benita. Kial ŝi, kiu entuziasmiĝis pri rozoj, amis la naturon kaj tial venis al ĉi tiu naturdefenda tendaro, permesis al li fari tian delikton?

Nun ŝi ludas per la floro kaj batelas liajn nudajn antaŭbrakojn, ĉar li kuspis la manikojn ĝis la kubutoj. Evidente la dornoj pikis lin, tial li elŝiras la rozon kaj ĵetas ĝin sur la plankon. Ankaŭ tio plaĉas al ŝi, kaj ŝi ridas.

Li flustras en ŝian oreilon kaj per la lango ŝovas la fumantan cigaredon de unu lipangulo al alia. Tenante la maldekstran manon en la pantalonpoŝo, li transmetas la dekstran brakon sur ŝian sultron kaj per la fingroj premetas ŝian mamon kiel pianisto la klavaron.

Subite mi ekdubas, ĉu ŝi estas Benita. Mi paŝas pli proksimen al ŝi kaj demandas: „Ĉu vi estas Benita?“

Ŝi palpebrumas, kvazaŭ nur nun estus ekvidinta min, kvazaŭ ne komprenus la demandon. Tiam komencas ridi kaj respondas: „Je — es!“

Fine ŝi ekonis min, mi pensas.

Li henas kiel virĉevalo kaj acerbe diras tra la dentoj: „Ni ambaŭ estas benitaj!“

Li rigardas min per tiaj okuloj, kvazaŭ mi estus muso aŭ kulo frapada. Sendube, tia ulo surstrate pugnas. Ĉu li batos min, samideanon ĉi tie, en la E-tendaro? Verŝajne, ĉar neniu alia ĉeestas. Kiam mi denove alparolos ŝin, li atakos.

Mi atentigas liajn movojn kaj pretigas min por defendo.

Dum mi ekzamenas lin per rigardo, li proksimigas sian buŝon kun la cigaredo en ĝi al ŝia vizaĝo. Certe li intencas kisi ŝin. Ŝi elkapas la cigaredon, detiras siajn lipojn, por ke la ŝmirajo de sur ili ne farbu la cigaredcilindron, kaj prenas la cigaron per fumflavigitaj dentoj. Entirinte fumon, ŝi blovas ĝin en lian vizaĝon.

Fumanta virino! Kiel ŝi, medicina studentino, kiu en siaj leteroj malaprobas ĉi tiun

malvirton, kie ŝi, estonta kuracistino, kiu instruos junulinojn kaj patrinojn pri sana vivo, povas fari tion! Mi sentas, ke la lastaj apogiloj de mia espero rompiĝas, mia revo frakasigas. Naŭzo kaptas min. For! For de ĉi tie! En abomeno mi abrupte turnas al ili dorson, en la koridoro prenas la dorsosakon kaj iras al la aŭtobusa haltejo.

Jus alvenis la aŭtobuso el la ĉefurbo. Benita estis skribinta, ke ŝi veturos de tie hodiaŭ matene, sed nun mi komprenas, ke ŝi pasigis la hieraŭan tagon jam ie en ĉi tiu regiono kune kun tiu kanajlo. Nur tiel ili ambaŭ povis alveturi per la loka aŭtobuso hieraŭ. La malproksimtrafika aŭtobuso vespere ne kursadas ĉi tien. Mi ne plu dubas. Klaras, ke Benita estas perdita. Mi ne povas resti en la tendaro, mi veturas hejmen kun doloro en la koro ankaŭ pro la senmoraligo de Benita.

Per ĉi tiu aŭtobuso nun alveturis ĉiuj tendaranoj, loĝantaj fore. Ili ne konas min, sed vidante la verdan steleton sur mia brusto demandas, kie estas la tendaro. Mi montras mane la direkton kaj mem urĝigas min al la aŭtobuso startonta post tri minutoj. En tiu momento mi rimarkas junulinon, kiu venas aparte de la ceteraj. Kvazaŭ serĉante, ŝi ĉirkaŭrigardas. Sur ŝia antaŭbrako ŝi portas falditan mantelon kvazaŭ montrante ĝin al iu. En la sama momento mi ekvidas la steleton de Petko sur ŝia bluzo kaj sur la mantelo, kaj ŝi — la saman steleton sur la refaldo de mia jaketo.

„Benita!“ — mi gaje ekkrias.

Ŝi kapjesas kaj ridetas. Mi rapidas al ŝi.

Subite mi ekpensas pri mia aspekto kaj ruĝiĝas. Ĉe la kolumo de mia ĉemizo mankas la butono, kiun mi deŝiris hieraŭ. Mia mano senhelpe glitas de tie al la poŝo, el kiu elstaras la skizalbumeto kun la letero kaj invitolito de Petko. Mi enŝovas ĝin pli akurate.

Mi rakontos al Benita ĉion, kaj mia rakonto estos mia amkonfeso al ŝi...

Kaj tiam... la mielmonaton ni pasigos en Bulgario.

DUA PREMIO

DIMITRO DIMOV, EMIL DIMOV

Mil tricent jara historio
pri vi rakontas kun fiero.
Amata nia Bulgario,
eternne staru sur la tero!
Fervore gardu la memoron
pri l'asparuh* venka glavo,
pri l'tempo de l'unio glora
de prabulgaroj kaj de slavoj!
Ne havis vi militon Trojan,
nek forrabadis landojn fremdajn,
sed ĝuis laŭ merit' multfoje
la venkon de la sindefendo.
Al vi nek dio, nek fatalo
promesis kaŝe teredenon,

vi mem estigis post bataloj
edenajn viajn fruktĝardenojn.
Ne havis ankaŭ vi profetojn
via gvidi laŭ la dia volo —
vi donis tamen alfabeton
al la aliaj slavpopoloj.
Feroce jug'! . . . gutadis larmoj
sur la vunditan vian bruston. . .
Sed dum la juga nokt' malvarma
ne kovris la armilojn ruĝo.
Ho, viaj Jovoĵ de Balkano**
sen nombraj estis kaj sen mortaj,
sed por falig' de l'jug' osmana
ve, ne sufiĉis viaj fortoj.

Kaj ve, is vi, ho, rusaj fratoj,
por ni oferi sangon vian!
Ĝis kiam kor' en brusto batas,
memoru tion, Bulgario!

Al socialismo kaj prospero
vi gvidu la popolon vian!
Posten u por la paco tera,
amata nia Bulgario!

Senmorta estu nomo via
kaj via marŝ' al l'estonteco!
Amata nia Bulgario,
atingu mem la eternecon!

* Ĥano Asparuh — fondinto de la bulgara ŝtato en la jaro 681.

** Jovo de Balkano (bulgarlingve: Balkanĝi Jovo) hieroo de popola kanto, simbolo de la patriotismo kaj eltenemo de la bulgara popolo.

LA HAVENO DE L'PACO

Al miaj bulgaraj gefratoj

Blanka kaj verda kaj ruĝa
vi staras, Varno,
kun ĉe viaj piedoj brilanta

Nigra Maro,
kies rekviemo pri sennombraj maristoj
ombris la frunto de sennombraj vidvinoj.

La nigraj ondoj nun blue dancas
sub via vento, kiu blue kantas,
kaj via suno dolĉe
verŝas mielon
sur senaŭban vivon
faritan el mirindaj ĉiutagaj aĵoj.

Vian epopeon, Varno, ni aŭdas
el la buŝo de viaj antikvaj muroj.
Vian poezion, Varno, ni legas
sur la vizaĝo de viaj freskaj konstruaĵoj.
Vian vinon, Varno, ni ebriinkas
el la koro de viaj frataj gecivitanoj.

Flugas la mevoj velurece,
glitas la tagoj pleneplene.
La amikeco el via brusto lumas,
blanka kaj verda kaj ruĝa ĝi fluas,
haveno de l'paco, varma Varno,
ĉarma en via nacia kostumo.

Hanojo, la 15an de majo 1980



ni recenzas

„Kiel eble plej frua efektivigo de la kompleta abolicio de nukleaj armiloj kaj la plena malpermeso de atomaj kaj hidrogenaj bomboj — tion forte aspiras ĉiuj homoj en la mondo.“

Tiu ĉi arda deziro kovis kaj naskis la luksan libron „Hiroŝima — Nagasako — Bilda Dokumentoj pri la Atombombado“, eldonitan de la Eldonkomitato por Hiroŝimo — Nagasako kun la celo sciigi al la sekvantaj generacioj kaj al ĉiuj homoj en la mondo la neniam ripetendan tragedion de la usona bombado de Hiroŝimo kaj Nagasako, okazinta antaŭ 35 jaroj.

Sur 344 grandformataj paĝoj per fotoj kaj reproduktaj de pentraĵoj, faritaj de survivintoj de la tragedio kaj laŭ iliaj rakontoj, estas montritaj la teruraĵoj de la unua en la mondo atombombado de du pacaj urboj. Tiu ĉi libro timigas kaj samtempe avertas la homaron pri la danĝero de la nuklea armado, ĉar nun la stokoj de la nukleaj armiloj egalas al proksimume 1 300 000 bomboj de la tipo de la bomboj, ĵetitaj de Usono super Hiroŝimon kaj Nagasakon — kvanto tute sufiĉa por neniigi la loĝantaron de la tuta terglobo 15 fojojn. Tiu ĉi fakto naskis la ardan alvokon en la antaŭparolo de la libro: „Estas nun urĝe necese, ke ĉiuj popoloj de la mondo levu publikan opinion kaj ekstaru por amasa kontraŭaĝo. Nenie sur la terglobo devas ripetigi Hiroŝimo kaj Nagasako.“

Estas tre interese montri, ke la kompilo kaj la eldono de la libro estas frukto de komuna porpaca laboro de miloj da individuoj, centoj da organizoj kaj dekoj da informaj instancoj kaj de la kolektiva kunlaboro de pluj aprobantoj kaj kunlaborantoj japanaj kaj eksterlandaj. La eldono de la libro efektiviĝis dank'al la mono, donacita de 15 000 homoj el ĉiuj distriktoj de Japanio. La prezo de unu ekzemplero estas ĉirkaŭ 55 usonaj dolaroj, al kiu oni devas aldoni la poŝtkoston, kiu pro la aviadila transporto al malproksimaj landoj atingas 31 usonajn dolarojn. Japanaj civitanoj aĉetas japanlingvan ekzempleron kaj donacas ĝin al eksterlandano. La nomo de la donacinto estas signita en „Mesago por paco el Japanio al viaj okuloj kaj al via koro“.

ĈU VI SCIAS

Ĉu vi scias, amikinoj miaj, kio faras la mondon belega? — La amo! Ĝi faras, ke la suno brilu, la floroj floru, la grenoj maturiĝu, la fontoj ŝprucu, la birdoj kantu. Ĝi kreskigas ĉiun herbeton kaj donas vivon al ĉiu insekto.

Ĉu vi scias, amikinoj miaj, kiaj farigas la okuloj, kiam tra ili rigardas la amo? — Ili farigas la plej belaj okuloj kaj similas al akvoj, lumigitaj de nevidebla suno. Kelkiam ili transformiĝas en stelojn kun oraj rebriloj.

Ĉu vi scias, kia farigas la vizaĝo, kiu estas vizitita de amo? Sur tia vizaĝo radias luma rideto, kaj la lipoj estas pretaj ĉiam malavare porti konsilon, diri tenerajn vortojn, doni kuragon.

Ĉu vi scias, kio farigas la koro, penetrita de amo? En tia koro ekkantas birdoj, kaj neteraj melodioj sin verŝas sen komenco kaj sen fino.

Ĉu vi scias, amikinoj miaj, kio farigas la animo, kiam amo vizitas ĝin? En tia animo naskiĝas la plej bela impulso — servi al la bono por ĉiuj.

LIBRO TIMIGANTA,
LIBRO AVERTANTA

Tiu mesaĝo, sur aparta folio, estas metita en la libron. La donacinto de la ekzemplero en E-o, kiun mi ricevis, estas s-ro Uemura Kazunao. Koran kaj al li!

La E-versio, eldonita en 1500 ekzempleroj, aperis baldaŭ post la anglalingva versio (3000 ekz.) kaj samtempe kun la hispana (nur 500 ekz.). Tio ĉi atestas pri la aktivado de la japanaj e-istoj kaj pri la graveco, kiun la Eldonkomitato por Hiroŝimo kaj Nagasako atribuas al E-o kaj al ĝia rolo.

La esperanta lingvaĵo estas perfekta. La traduko de la versaĵoj estas ankaŭ bonstila. Ni dankas al la japanaj pacamikoj pro ilia iniciatemo kaj kunlaboro en la eldono de la libro. La bulgaraj pacbatalantoj, kiuj la pasintan jaron havis la okazon ankaŭ vidi la fotoekspozicion pri la hororo de la atombombadoj super Hiroŝimon kaj Nagasakon, organizitan en Sofio, kore salutas la japanajn pacbatalantojn kaj deziras al ili novajn sukcesojn en la nobla batalo por paco kaj malmarmado kontraŭ la nukleaj armiloj kaj la nigraj fortoj de la milito.

Dimitro HAĜIEV
prezidanto de la bulgara MEM-komitato

NOTO DE LA REDAKTORO. Mi ankaŭ ricevis ekzempleron de la valorea libro pri la atombombado de Hiroŝimo kaj Nagasako. Ĉiam kun emocio kaj profunda indigno kontraŭ la milito mi foliumas ĝin. Sur la mesaĝo de mia ekzemplero staras la nomo de mia juna japana amiko-esperantisto Nisio Tutomu. Dankon, koran dankon al li! Kaj pere de li dankon al ĉiuj japanaj pacbatalantoj, al ĉiuj honestaj homoj de Japanio, kiuj laboras kaj batalas por mondo sen militoj, sen atomaj hororoj. Mi tutkonsciencie aliĝas al la alvoko de la japanaj pacbatalantoj, kaj forte mi levas mian voĉon: „Homoj, gardostaru! La imperiismo signifas militon! Neniam plu Hiroŝimo kaj Nagasako sur nia planedo! Ni kaj niaj infanoj rajtas vivi trankvile kaj libere sub la ĉielo!“

Kunĉo VÁLEV

RENKONTIĜO APUD MOSKVO

Je la 1-4 de majo en la turisma bazo Sčerbinka apud Moskvo okazis la 20a Centra-rusia Regiona E-Renkontiĝo, organizita de Moskva Junulara E-Klubo kaj Moskva Urba Komitato de Junularaj Organizajoj. Ĝin partoprenis pli ol cent e-istoj el Moskvo, Ivanovo, Jaroslavl, Kalinin, Kaluga, Voronej kaj gastoj el aliaj regionoj — Leningrad, Tihvin, Minsk, Vitebsk, Ĥarkov, Miass k. a. Partoprenis ankaŭ eksterlandaj e-istoj el Hungario, Nederlando kaj Francio.

Dum la renkontiĝo okazis sportaj konkursoj, festa bankedo, dancoj, montrado de slajdoj pri diversaj E-renkontiĝoj kaj pri vidindaĵoj de Francio kaj Vjetnamio. Funkciis E-universitato. Por kursfinintoj estis organizita lingvoperfekta kurso, kiun gvidis Francisko Simone (Francio).

La partoprenintoj subskribis protestleteron al Karter, forte riproĉante la militarisman politikon de la nuna usona administracio.

Dmitrij PEREVALOV

E-EKSPOZICIO EN NIJNEVARTOVSK

Fine de majo en la centra ekspozicia salono de la Domo de Kulturo „Oktoĉbro“ en urbo Nijnevertovsk (Tjumen-regiono, USSR) estis aranĝita pripaca ekspozicio per E-o. Organizanto estis la loka E-klubo de Internacia Amikeco kunlaboro kun la urba junkomunistika komitato.

Ce la inaŭguro salutparoladojn faris kelkaj gvidaj gekamaradoj. Ĉiuj substreksis la laŭdindan porpagan aktivadon de la lokaj e-istoj (la plej nordaj en Eŭropo-Azio) kaj la helpon de E-o por la organizado de vere internacia ekspozicio de materialoj el 20 landoj. Pri la evento informis la urba gazeto „Leninskoje Znamja“.

Sur 10 tabuloj estis ekspoziciitaj E-libroj, periodaĵoj, korespondadoj kaj aliaj objektoj, ricevitaj el eksterlando. Tio estis elokventa pruvo pri la vastaj internaciaj ligoj de niaj klubanoj.

La ekspozicio, unua en la urbo, vekis grandan intereson. Aparte impresita estis la lernantaro. Al la deĵorantoj estis direktitaj multaj demandoj kaj petoj. Rezulto: cent homoj ekdeziris lerni la internacian lingvon.

La estraro de la E-klubo profunde dankas al ĉiuj samideanoj el Sovetunio kaj eksterlando, kiuj sendis materialojn.

La ekspozicio funkciis tre sukcese dum 15 tagoj. Oni decidis, ke en Nijnevertovsk ĝi fariĝu tradicia, dufoja ĉiujare. Tial nia alvoko pri kontribuo restas ĉiam valida! Nia adreso: Suvajev T. D., str. Omskaja 12-3, Nijnevertovsk, 626440 Tjumen-skoj oblasti, Sovetunio.

T. Suvajev

URĜA!

GRAVA!

Okaze de la datreveno de la fondiĝo de Germana Demokratia Respubliko (7a de oktobro) Lajpega Laborrondo Esperanto aranĝos letervesperon. Estas petataj ĉiuj e-istoj sendi salutkartojn, leterojn kaj materialojn por ĉi-tema ekspozicio.

Al ĉiuj skribinto oni garantias almenaŭ unufojan respondon!

Ĉion sendu al: Laborrondo Esperanto, Kätthe-Kollwitz Str. 115, DDR 7010 Leipzig.

DISKOKLUBO „ESPERANTO“

La novefondita diskoklubo „Esperanto“ ĉe la Samarkanda Urba Komitato de Junkomunistaj Unuiĝoj (Komsomolo) turnas sin al ĉiuj E-societoj, grupoj kaj apartaj personoj, kiuj povas peri amikajn kontaktojn kaj kunlaboron kun similaj junularaj diskokluboj alilande aŭ helpi per spertinterŝanĝo, konsiloj, lumbildoj, sondiskoj, programoj de diskovesperoj, revuoj, fotoj, afiŝoj.

La estraro de la diskoklubo garantias laŭdeziran rekompencan al ĉiuj helpantoj per albumoj, lumbildoj, sondiskoj, libroj, bildkartoj, memoraĵoj ktp. Oni korespondas en diversaj lingvoj (Esperanto, rusa, angla, germana, franca k. a.) Bonvolu adresi ĉion al: Samarkandskij Gorkom LKSM Uzbekistana, Diskoklub „Esperanto“, SU-70 3000 SAMARKANDO, ul. Vojkova 3, Uzbekistano, USSR.

Karaj samideanoj! Via helpo, kiun ni varme antaŭdankas, ne nur kontrubuos al la sukcesigo de niaj diskovesperoj, sed samtempe plipopularigas E-on en nia urbo.

Propagandu ankaŭ nacilingve! Bonvolu aperigi la ĉi-supran alvokon en vialanda junulara gazetaro.

La estraro

EN SEBASTOPOLA E-KLUBO „VELO“

La klubo havas nun 50 membrojn. Ĉe ĝi funkcias jenaj sekcioj: tradukista, instrumentodika, belarta, kantemula kaj turisma-junulara.

La 18an de majo 1980 okazis ekzamenoj por gekursanoj, finintaj E-kurson por komencantoj. Sukcesis 23 personoj, 11 el ili ekzamenigis bonege. Pasintjare 18 ĝejunuloj finis la E-kurson.

Por la nova lernoĵaro la estraro de la klubo denove organizos E-kurson por disvastigo de la Internacia Lingvo en la urbo.

Mihail Ohotin

ESPERANTO KUNLIGAS URBOJN

Printempe en Talin (USSR) okazis granda evento: estis kreita estona filio de Asocio de Sovetaj E-istoj. Unu el ĝiaj gravaj taskoj estas profundigo de amikaj rilatoj inter la popoloj de Sovetunio kaj aliaj landoj.

Kun tiu celo reciprokajn renkontiĝojn organizas la E-klubo de Tartu sub la gvido de M. Linnamägi. Maje al Tartu veturis 30 ĝe-istoj el Leningrado. Ili vizitis la teatron, konversaciis kun akademiano P. Ariste kaj prezentis koncertan programon. Ekskursgvidantoj de la Tartua E-klubo konatigis la gastojn kun la pitoreska Suda Estonio.

Antaŭnelonge en Tartu gastrolis la unua E-teatro en USSR. La leningradaj aktoroj G. Rudenko (ankaŭ la sursceniginto), N. Lavrov, A. Jovlev, R. Hairullin kaj O. Popkov prezentis sursceneigon laŭ novelo „Li trosalis“ de A. Ĉehov, gabrovanajn ŝercojn, komponaĵojn laŭ la poezio de J. Ljöv (lingva fako — V. Hohlstein, literatura fako — N. Nikiforova).

La saman vesperon sian koncerton donis ankaŭ la virina ensemblo de la amatora sekcio de E-klubo de Tartu (gesolistoj J. Illisson, L. Illisson, J. Temmo, J. Tulev, R. Urbanek kaj aktoroj K. Nomm, K. Laar).

La publiko estis de diversaj partoj de Estonio. Ambaŭ aranĝoj pruvis ankoraŭfoje, ke E-o estas lingvo de la amikeco.

Enn ERNITS

E-TEATRO EN LENINGRADO

Pasintjare en Leningrado formigis kaj ekfunkciis esperantista teatra trupo, kiu jam havas siajn unuajn manifestadojn.

La trupo konsistas el sep personoj. Kvin estas aktoroj kaj registaroj en diversaj leningradaj teatroj:

Aleksandro Lovlev — registaro en Leningrada Radio, Nikolaj Lavrov — aktoro kaj registaro en Leningrada Stata Malgranda Dramateatro, Oleg Popkov — aktoro en Leningrada Stata Junulara Teatro, Genadi Rudenko — aktoro kaj registaro en Leningrada Stata Akademia Teatro de Komedio, Raŝid Hajrulin — aktoro en Leningrada Stata Teatro de Junaj Spektantoj.

Krom la aktoroj kaj registaroj al la teatro apartenas: Viktor Gohŝtejn — pedagogo, instruisto de angla lingvo kaj E-o, kiu prizorgas la lingvan fakon de la teatro, kaj Natalija Nikiforova — ĵurnalistino, respondeca administranto de la teatro.

La 15an de marto en Leningrado okazis la unua prezento de la teatro, fine de majo — ĝia unua gastrol-vojaĝo al la estona urbo Tartu, kien alveturis estoj el pluraj estonaj urboj por spekti.

En la programo troviĝas surscenigo de la rakonto „Li trosalis“ de Ĉeĥov, bulgara popola humuro sub titolo „Ni estas de Gabrovo“ kaj kelkaj scenoj, verkitaj de la aktoroj mem. La tutaĵon kunligis rakonto pri la historio de la E-teatro tutmonde.

La E-teatro de Leningrado estas nova sukceso ne nur por la soveta, sed ankaŭ por la tutmonda E-movado. Ĝia talenta kaj entuziasma kolektivo faras nun la unuajn paŝojn, sed ĝi havas vastajn planojn. Ni sincere bondeziras efektivigon de tiuj planoj kaj brilajn sukcesojn al la teatra kolektivo sur soveta kaj internacia scenejoj!

Bonan vojon!

Kunĉo VÁLEV



BRITLANDO. D-ro Gon (John) C. Uels (Wells) estis unu el la gastoj en la programo „Parolante pri la angla“ en la Monda Servo de BBC. Wells tie intervjuiĝis pri diversaj aspektoj de la lingva problemoj kaj longe parolis pri E-o. Liaj klarigoj estis ilustritaj per la elsendo de du E-kantoj.

PERUO. Okazis televida elsendo pri E-o, kiun partoprenis Janet Skotte, ĉefa aktivulino en Peruo, kaj gastoj el Brazilo kaj Danlando. Tuj poste cento da personoj aligis al novaj E-kursoj.


HISPANIO. La kulturministerio atribuis subvencio de 100 000 pesetoj por starigi E-kurson ĉe la lernejo „Curros Enriquez“ en la Koruna.

HUNGARIO. E-o estas en la programo de Departementa Instituto de la Pedagogio en Bekeŝcaba. Oni celas prepari E-instruistojn al la lernejo 1980/81, kiam laŭ la permeso de la Ministerio de Instruado malfermiĝas ebleco instrui E-on en la bazaj kaj mezlernejoj.

ITALIO. D-ino Lina Gabrielli el Askoli Piceno trifoje semajne instruis E-on al 214 ĝeinstruistoj en Teramo. En Borgo Panigale, Bolonja, funkcias kvin E-kursoj en du lernejoj — elementa kaj mezgrada.

NORVEGIO. E-o estis instruita en tri ĝejunulaj lernejoj kaj unu gimnazio. Ĝi estos instruita en la gimnazio en Sarpsborg dum la venonta studjaro en du paralelaj klasoj.

Dum 1979 j. okazis 2983 radioelsendoj de 14 radiostacioj en 11 landoj. La elsendoj daŭris 1082 horojn. Plej multe da elsendoj havis Pola Radio (1095 dum 547,30 horoj).



Humuro „Ni estas de Gabrovo“
Rolas artistoj de Leningrada
E-teatro



ESPERANTO-HUMURO

LI LOĜIS EN ESPERANTIO

Cefo dungante novan oficiston demandis lin:

— Ĉu vi parolas Esperanton? Kun kelkaj el niaj klientoj ni korespondas en Esperanto.

La kandidato por la ofico, kiu nepre volis esti enoficistigita por savi sin de senlaboreco, streĉis sian bruston kaj respondis:

— Jes, mi parolas ĝin! Mi vivis en la Esperantolando dek jarojn!

BEDAŬRINDA EDZO

— Panjo, mi skribis mian unuan Esperanto-leteron. Tuj mi iros al la poŝtejo por forsendi ĝin.

— Kion vi parolas? Ekstere ventas kaj pluvegas terure. Bona maŝtino ne permesas eĉ al ŝia hundo forlasi la domon en tia aĉa vetero! Via patro iru por enpoŝtigi ĝin.

KIU ESTAS NOVA ESPERANTISTO?

En E-societo oni anoncis konkurson pri plej konciza kaj ekzakta difino „Kiu estas bona esperantisto“.

Gajnis partoprenanto en la konkurso per la frazo: „La persono, kiu neniam diras: Mi estas nova esperantisto“.

En unu el la E-revuoj antaŭ kelkaj jaroj oni povis legi jenan respondon al abonanto: „Bedaŭrinde, ni ne povas plenumi vian peton skribi vian novan adreson sur vian poŝtajon; sed se vi aldonos malgrandan supersignon, ni faros ĉion necesan por plenumi vian peton.“

Kolektis: Nik. Nik.

En j. „Botevgradski Plamák“ — u. Botevgrad (19. I. 1980): materialoj pri kaj de Trifon Hristovski, elstara aganto de bulgara E-movado, konata sociopolitika aganto.

En la sama ĵurnalo: (29. III): informo de Margarija Draganova pri la fondo de E-societo „Trifon Hristovski“ en u. Botevgrad; (19. IV): informo pri distingo de membroj de la loka E-societo en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Loveĉ.

En j. „Septemvri“ — u. Stara Zagora (19. I): ampleksa intervjuo kun la operartistino Rene Jordanova de Stara Zagora, laŭreato de Dimitrov-premio. En la fino ŝi manifestas sian aligon al la E-movado kaj rakontas pri sia aktivado en ĝi.

En j. „Rabotniĉesko delo“ — Sofio (23. I): ampleksa artikolo de Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de BEA, pri Trifon Hristovski.

En la sama ĵurnalo (24. III): informo de Bulgara Telegrafa Agentejo „Signifoplenaj iniciatoj de BEA“ — pri kelkaj okazantaj aranĝoj de BEA; (25. IV): informo pri XIII konsultigo de reprezentantoj de la E-asocioj en la socialismaj landoj, okazinta en Sofio la 19–24an de aprilo.

En j. „Podem“ — u. Polski Trámbes (30. I): artikolo „Hela ekzemplo“ de Valentin Angelov pri d-ro L. L. Zamenhof lige kun lia 120a naskiĝtago.

En la sama ĵurnalo: (30. III): informo pri la jarkunveno de la loka E-Societo „Progreso“ kaj letero de hispana e-isto al la societo;

(30. IV): eltiraĵoj de leteroj de 3 e-istoj el tri malsamaj landoj kaj artikolo de Todor Anastasova pri la Klubo de la Internacia Amikeco en la loka gimnazio kun mencio pri la agado de la e-istoj lernantoj en ĝi.

En j. „Krajgraniĉna Iskra“ — u. Boljaro (31. I): informo pri malferrmita kurso de E-o en u. Boljaro, gvidata de Dimo Trudoljubov el Jambol.

En j. „Zarja na Komunizma“ — u. Loveĉ (2. II): informo de Kiril Kalčev pri E-kurso en uzino „Bal-kan“.

En la sama ĵurnalo (4. III): informo pri fondiĝo de faka medicinista E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Loveĉ; (25. III): intervjuo kun la honora prezidanto de la antaŭstaranta Junulara E-Revuo en Loveĉ Evgeni Uzunov, unua sekretario de Komso-molo; (3. IV): informo de CoCo Kolarov pri la Junulara E-Revuo en Loveĉ, okazinta la 1–3 an de aprilo; (8. IV): informo pri la distingitaj e-istoj el la distrikto de Loveĉ dum la Revuo; (15. IV): informo pri la distrikta E-konferenco en Loveĉ.

En j. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca (12. II): informo de Lena Krumova pri partopreno de membroj de la lerneja E-Societo „Verda Raketo“ en Vraca en la solena celebros de la jubileo de E-societo „Eterna Amikeco“ en Plevna.

En la sama ĵurnalo: (22. II): artikolo „Amikeco trans landlimoj“ de Bojčo Mladenov.

En j. „Blagoevsko Zname“ — uzino „D. Blagoev“ en u. Ruse (22. II): artikolo „Esperanto“ de Stefka Ruseva.

En j. „Ĉerveno Zname“ — u. Vidin (28. II): informo pri solena vesperfesto en Vidin okaze de Semajno de Internacia Amikeco kun partopreno de pli ol 250 gejunuloj. Parolis Kunčo Válev, sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“.

En j. „Sumenska Zarja“ — u. Ŝumen (16. II): artikolo „Semajno de la Internacia Amikeco“ de Cvjatkodorov.

En la sama ĵurnalo (10. IV): informo de Cvjatkodorov pri la jarkunveno de E-Societo „Suno“ en u. Várba.

En j. „Kubratski Zov“ — u. Kubrat (18. II): intervjuo kun tri gastoj el Ĉeĥoslovakio — D. Kočvara, M. Kucin kaj L. Jurko. Krome informo de Anton Antonov pri VARE en u. Kubrat.

En j. „Partizanski Zavet“ — u. Pomorie (20. II): informo pri festarango omaĝe al la patrono de la loka E-Societo Trifon Hristovski.

„Veni Hayat“ — monata revuo en turka lingvo — Sofio (februaro): atriolo de Hristo Dimitrov pri la agado de la popola legejo en u. Kubrat. Oni detale mencias pri la E-kursoj de la legejo.

En la semajna gazeto „Zdraven Front“ — Sofio (1. III): informo pri kurso de la Medicinista E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“.

En j. „Podem“ — u. Vjatovo (24. II): artikolo de Jordan Kalinov el Ruse pri la neceso de restarigo de la loka E-societo „Aŭroro“ en Vjatovo.

En j. „Borba“ — u. V. Tarnovo (25. III): informo de Penka Gárbuzanova pri la jarkunveno de E-Societo „Progreso“ en u. Polski Trámbes.

En j. „Veĉerni Novini“ — Sofia (1. IV): informo de M. Mateev pri la 40a Jubilea Kongreso de BEA.

En j. „Oteĉestven Glas“ — u. Plovdiv (3. IV): sub-rubriko „Esperantaj Novaĵoj“ 3 priesperantaj informoj. La rubrikon aranĝis Kr. Sofroniev.

En j. „Dunavska Pravda“ — u. Ruse (5. IV): artikolo „80 jarojn E-movado en Ruse“ de Stefan Popov.

En la sama ĵurnalo (8. IV): informo pri la solenaĵo lige kun la 80-jariĝo de E-Societo „Libero“.

En j. „Naroden Drugar“ — u. Jambol (10. IV): informo de Dimo Trudoljubov pri la partopreno de la lokaj e-istoj en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en u. Loveĉ.

En la sama ĵurnalo (5. V): informo de Iljana Ilieva pri la distrikta E-konferenco en Jambol.

En la semajna gazeto „Narodna Kultura“ — Sofio (11. IV): ampleksa artikolo pri la bulgara kulturo kaj E-o de Nikola Aleksiev.

En j. „Orjaĥovska Tribuna“ — u. Orjaĥovo (30. IV): informo de Nadja Bosaska pri la partopreno de la lokaj junaj e-istoj en la Revuo en Loveĉ.

En j. „Veĉerni Omsk“ en u. Omsk, Sovetunio, aperis resumo de la rememoroj de Elena Dragolova kaj Todoraka Zagorska, kiujn ni publikigis en n-ro 1 de „BE“ 1979 j. Aparte oni substrekas la korespondadon de Zagorska kun maristo-esperantisto el Omsk kaj ĝenerale la rolon de E-o en la kontraŭ-faŝisma batalo kaj por la amikeco inter la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj.

ĤRISTO SMIRNENSKI

EKESTU TAG!

Sinistra, nigra nokt' alarma,
glacia nokt', sufer' sen fin!
Elfluas lante sango varma
el la ŝirita tera sin'.
En la ruinoj pulvumantaj
militdemono kun fier'
rabeme ŝvingas la stardardojn.
Malpaco regas sur la Ter'.
En la mallum' de l'nokto ŝtorma
reliefiĝas siluet'
de la stranga kruc' enorma.
Kaj homa ŝvarmo ku' impet'
frenze ĉiuloken kuras,
pelata de la dio ora. . .
Kaj plidensiĝas la obskuro.
La homoj, kun premita koro,
avidas forte la liberon;
l'okuloj lumon nur sopiras;
nur juston, pacon sur la Tero
senhalte la homar' aspiras.
Tra l'sangaj larmoj de l'epok',
tra la terur' de l'monda plag',
tondradas kri' el ĉiu lok':
«Ekestu tag! Ekestu tag!»

El la bulgara: S. M. SIMEONOV

La 6an de aŭgusto 1980 pleniĝis 35 jaroj depost la usona atombombado super Hiroŝima kaj Nagasaki. Nun estas amasigitaj tiom da tiaspecaj bomboj, kiuj povus nenigi la loĝantaron de la mondo 15-foje. NI GARDU LA PACON!

D-RINO MARJORIE BOULTON

EL « POEMOJ PRI HIRŜIMO »

STATISTIKO

Ducent kvardek sep miloj!
Ies ĝefatoj, ies ĝefiloj
Ducent kvardek sep miloj!
La sumo tro grandigis por signifi.
Sed ĉiu estis homo, kiu sentis,
kiu vundigis povis kaj soifi,
kiu kriegis, mortis kaj silentis.
Nek sangas statistikoj, nek kriegas;
Sumojn sen larmoj oni jam traegas.
Ducent kvardek sep miloj!
Malsamaj estis ili, kaj unika
estis ĉiu ununura i, i,
kaj ĉiu vundo nigra aŭ vezika
kaj ĉiu haŭtĉifono, ĉiu kri',
ĉiu brulvundo, ĉiu sangovomo,
povis ekzisti nur per homa homo.
Ducent kvardek sep miloj!
La ekbrilego sur la muro stampis
por ĉiam silueton de la viro,
kiu ombrante sidis; iu rampis
sur la pavimo, la militmartiro,
kiu per pusto, sango, ekfetoris,
kiu per la okuloj blindaj ploris:
Ducent kvardek sep miloj!
Antaŭ la bombo ĉiu havis sangon,
lipojn, okulojn, generajn organojn,
kaj ĉiu havis nazon, haŭton, langon,
multajn sentemajn nervojn kaj membranojn.
Ĉiu posedis homan nervsistemon.
Nun karbigitaj buŝoj kraĉis ĝemon:
ducent kvardek sep miloj!
Unika ĉiu kaj al iu kara —
anstataŭebla hom' neniam estis,
naskita per doloro mortamara,
amata kaj amanta — kio restis?
monstro tordigis sur inferofundoj,
larvoj tordrampis en la vivaj vundoj.
Ducent kvardek sep miloj!
Ciferoj, nuloj! Ĉiu estis homo,
sangantaj statistikoj, homaj nuloj!
Sen haŭto, vidkapablo, lipoj, nomo
iu kuŝigis — sumoj kaj formuloj!
Gepatroj kaj ĝefatoj kaj ĝefiloj:
ducent kvardek sep miloj!

SE NI MALSUKCESOS?


Iu diris,
per iomete kliŝa stilo:
«Vi, pacamant', kun via lingvo,
penas forpuŝi maron
per balailo!»
Kaj kun kapsvingo
li foriris,
lasis min penti tempmalŝaron.
Neniam li komprenos.
Li pepas, li mem, feble.
Ĉu lasta, monddetrua lukto venos?
Tre eble.
Sed estu mi trovita
kun balailo spita,
en batalordo,
droninta, mergita,
sur tiu mondmorbordo.
Ĉar oni povas morti aĉe, plore.
Aŭ — iom pli honore!

1953 j

1953 j

KRUCVORTENIGMO

Inĝ. Nikola UZUNOV



HORIZONTALE: 7. Unua E-gazeto, aperinta en 1889 en Bulgario, tuj post „Esperantisto“ de Zamenhof. 12. Propa nomo de mondfama fizikisto (1879—1955). 13. Silabo. 14. Inicialoj de bulgara esperantista produktkomerca entrepreno. 16. Organa korpo, produktita de la inoj de iuj animaloj. 17. Speco de arto. 18. Poezio kritikanta moka la ridindaĵojn aŭ malvirtojn. 21. Duoninsulo en la eŭropa parto de Sovetunio. 22. Propa nomo de usona verkisto (1878—1968). 23. Angla urbo (apostrofito). 25. Pronomo. 26. Helena diino, kiu inspiris la artistojn (apostr.). 28. Inicialoj de la organizo de la laboristoj-e-istoj en Bulgario. 29. Inicialoj de granda interŝtata organizo. 30. Egipta dancistino kaj kantistino (apostr.). 32. Festo de la helenoj kaj la romianoj honore al Bakho. 34. Precize difinita tempo, en kiu okazis, okazas, aŭ okazos io. 36. Irigi iun kun si al iu loko, direktante lin laŭ sia propra plaĉo (apostr.). 38. Loganto de eŭropa lando. 39. Parto de teatraĵo (apostr.). 40. Ceremonia vira vesto de la antikvaj romianoj (apostr.). 41. Inicialoj de la ĝenerala sekretario de Monda Turismo. 42. Pastro de la antikvaj keltoj. 45. Militisto, komisiita porti la standardon dum revuo aŭ batalo (pluralo).

VERTIKALE: 1. Persono, kiu interŝanĝas leterojn kun alia. 2. Pseudonimo de elstara bulgara esperantisto-veterano, eksprezidanto de BEA. 3. Populara hungara virnomo. 4. Ano de aktivaj triboj, el kiuj devenis finnoj, estonoj kaj hungaroj. 5. Muziknoto. 6. Bulgara esperantisto, aŭtoro de granda E-bulgara kaj bulgara-esperanta vortaroj. 8. Inicialoj de la kreinto de Esperanto. 9. Filoj de via frato aŭ fratino. 10. Inicialoj de bulgara urbo, kie okazis la Fonda Kongreso de BEA en 1907. 11. Karakteriza persona maniero esprimi siajn pensojn (apostr.). 15. Inicialoj de la bulgara transportkontrolo oficejo. 17. Insigno en formo de disketo aŭ banteto, kiun oni portas ĉe la ĉapelo (apostr.). 19. Legomo. 20. Gardena floro kun grandaj flavaj infloreskoj. 21. Nomo de bofrato de Edipo (apostr.). 24. Konjunkcio. 27. Inicialoj de konata bulgara E-veteranino. 31. Ekiri per movoj pli rapidaj ol marŝo (apostr.). 33. Akvero (apost.). 35. Heroino el romano de L. Tolstoj. 37. Granda birdo, vivanta sur stepoj en Afriko, Azio kaj Eŭropo. 39. Interna maro en Centra Azio (apostr.). 42. Inicialoj de la nevo de Vasil Drumev, unu el la unuaj en Bulgario, kiu lernis Volapukon. 43. Kemia prefikso, kiu signifas „havanta du atomojn de io“. 44. Peco de skeleto (apostr.). 46. Inicialoj de mondfama bulgara e-isto.

ABONU! ABONU VIN KAJ VIAJN AMIKOJN ALILANDE!

„BULGARA ESPERANTISTO“

MONATA ORGANO DE BULGARA

ESPERANTISTA ASOSIO

- Unu el la plej malnovaj E-Revuoj en la mondo — fondita en 1919 jaro.
- Granda formato, riĉe ilustrita
- Aktualaj problemoj de la E-Movado en Bulgario kaj aliaj landoj
- Libera tribuno de legantoj
- Anoncetoj, krucvortenigmoj, specialaj rubrikoj: „Tra la E-mondo“, „De lando al lando“, „Deziras korespondi“, „Tra la gazetaro“ ka.
- Literaturo, Poezio, Recenzoj
- Specialaj rubrikoj: „Juna esperantisto“, „Verdaj steletoj“ k. a.

Jarabono por 1981 — por Bulgario — 2.90 lv.

„ Socialismaj landoj — 5.42 l.

„ Ĉiuj ceteraj landoj — 5.90 l.

Ne prokrastu vian abonon por 1981!

Abonu tuj, ĉar la eldonkvanto estas limigita.

Esperantaj societoj, esperantaj aktivuloj — ni nepre plenumu la decidon de la 40 jubilea kongreso de BEA — ĉiu esperantisto — abonanto de

„BULGARA ESPERANTISTO“

deziras korespondi

Bulgario

Milen Emilov — 4300 Karlovo, str. Opalčenska 12 (19-jara — pri ĉt, kolektas insignojn kaj bk).

Petka Deneva — str. Bratja Denčevi 3, 5370 Drjanovo (34-jara, ekonomikistino, pm je temo literaturo kaj historio).

Nikola Ĥristov, v. Vlatinja, Loveŝko (30-jara).

Rosica Petrova — OZS, 5500 Loveĉ (18-jara — koloraj bk, fotoj de estradaj kantistoj).

Antoaneta Jordanova — str. Kiril i Metodi 110, 5500 Loveĉ (18-jara)

Violetka Dikova — str. Sevastopol 14, grad Marica, Ĥaskovsko (10-jara lernantino).

Ismail Aliev — str. Georgi Ivanov 14, 5500 Loveĉ (24-jara fraŭlo)

Ivanka Petkova — blok 107 vĥod II, etaĝo 5, 5500 Loveĉ (31-jara fraŭlino)

Ĉeĥoslovakio

E-gazetojn kolektas, duoblaĵojn interŝanĝas Z. Ĥrsel, str. Botaniska 28, 602 00 Brno.

Vladimir Pys — 723 00 Martinov ĉ. 13, Ostrava (34-jara)

GDR

Gerhard Zeidler — Ferststrasse 4, 9072 Karl-Marx-Stadt (37-jara fervojista inĝeniero, prefere kun bulgarino el Sofio).

Hungario

Kozma Terez — H-8468 Kjlontar, Tancsics ut. 41 (22-jara instruino de hungara lingvo kaj matematiko — kun gebulgaroj).

Sovetunio

Siberia E-klubo-membroj diversaj tutmonde. Adreso: SU-652870 Esperanto-klubo, ab/ja. 60, Mejdureĉensk — centro, Kemerovskaja obl.

45 novaj e-istoj, 15–60-jaraj (inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj, oficistoj, laboristoj, studentoj) deziras korespondi tutmonde, kolektive kaj individue, pri ĉt, internŝanĝi bk, pm, esperantaĵojn. Elektu korespondant(in)on laŭ la foto kaj vi certe ricevos respondon. Komuna adreso: Vadim Gruŝinski, Esperanto-klubo, „Amikeco“, ab/ja 9, 327 029 Nikolaev.

Ĝelernantoj el mezlernejo — tutmonde pri ĉt. Adreso: Esperanto-rondo ĉe KID, mezlernejo 61, Novosibirsk — 55, 630055 USSR.

Geknaboj 15–17-jaraj — kolektive kaj individue — kun samaĝuloj tutmonde: USSR, Litovio, 235 300 Panevezys, 4 vid. n-la, 10-a klaso Irna Peleckaitė.

Soroker Lilija — ul. Taŝkentskaja 98 kv. 17, 443/089 Kujbiŝev (23-jara bibliotekistino).

Alfiorova Elena — ul. Stara Zagora 149 kv. 87, 443 087 Kujbiŝev (23-jara bibliotekistino).

Fedorŝeva Olga — ul. Voronejskaja 228, kv. 2, 443084 Kujbiŝev (19-jara studentino).

Gajnulina Raja — ul. Voronejskaja 250, kv. 48, 443084 Kujbiŝev (20-jara studentino).

Prilepskaja Marija — ul. Sadovaja 92, kv. 4, 443020 Kujbiŝev (32-jara instruino de E-o, pri literaturo, pentroarto, vojaĝoj).

